1. Kiam oni ludos la matĉon?
(Morgaŭ matene)

La matĉo estos ludita morgaŭ matene.

2. Kiam oni trovis Amerikon?
(En 1492)

Ameriko estis trovita en mil kvarcent naŭdek du.

3. Kiam oni purigos la kunvenejon?
(Je lundo)

La kunvenejo estos pur

4. Kiam oni vendis la aŭtomobilon? La aŭto
(Hieraŭ)
5. Kiam oni inventis la televidon? La televido
(En 1923)
6. Kiam oni vokis la policon? La polico
(Je la 5a)
7. Kiam oni ligis la krimulon? La krimulo
(Neniam)
8. Kie oni trovis la rabiston? La rabisto
(En la vendejo)
9. Kien oni metos la kofron? La kofro
(En la kofrujon)
10. Kiel oni sciigis la policon? La polico
(Per telefono)

§3. More about compound tenses.

As noted in Lesson 9, compound forms of the verb are used less frequently in Esperanto than in English. The kinds of compound-verb sentences we've just been discussing, formed from the passive participle, are rather more common than the ones using active participles; this is because in real-life language we often find it convenient to say a thing was done, without having to say who (or what) did it. But even with this type of sentence, it is often clearer and simpler, and better style, to choose a more direct construction. One good way is to use **oni** ("they," "people in general," "some unspecified person or persons") as the subject. Another is to use the suffix **iĝ**, thus adding the idea of something *becoming done*. (You might want to review §9, Lesson 6, page 117.)

Oni trovis la rabiston
en la vendejo.

La rabisto troviĝis en
la vendejo.



The robber was found in
the store.

Oni ludos la matĉon morgaŭ.

La matĉo ludiĝos morgaŭ.



The match will be played
tomorrow.

Be aware too that Esperanto has no exact equivalent of our English compound tense called the past perfect (also known as the pluperfect) by which, using the words “had been,” we stress that an action was completed *before* the time being described. (For example: “The door *had been* closed” as opposed to “The door *was* closed.”) Esperanto accomplishes the same thing by an explanatory word or phrase, like **jam** or **antaŭ ol**:

**La krimulo estis jam kaptita,
kiam mi alvenis.**

The criminal had (already) been
caught when I arrived.

§4. How to say “anything at all,” “nowhere at all,” etc.

After a correlative beginning with **i-** or **neni-**, the little word **ajn** adds the idea of “at all”:

io anything, something
iam anytime, sometime
nenie nowhere

io ajn anything at all
iam ajn anytime at all
nenie ajn nowhere at all

Exercise #4: Using **ajn**, tell each person to do as he likes.

- | | |
|---------------------------------|-------------------------|
| 1. Kien mi metu la kofron? | Metu la kofron ien ajn. |
| 2. Kiam mi voku Roberton? | Voku Roberton iam ajn. |
| 3. Kion mi diru al Paŭlo? | Diru al |
| 4. Kiel mi baku la kukon? | Baku la |
| 5. Kie mi serĉu la krimulon? | Serĉu la |
| 6. Kion mi donu al la ĉefo? | Donu |
| 7. Kien mi metu viajn aĵojn? | Metu miajn |
| 8. Kiam mi skribu la leteron? | Skribu |
| 9. Kiun mi sendu al la vendejo? | Sendu |

§5. How to say “whoever,” “wherever,” etc.

After a correlative beginning with **ki-**, the little word **ajn** adds the idea of “ever”:

kio what
kie where
kiu who,
which

kio ajn whatever
kie ajn wherever
kiu ajn whoever,
whichever

Notice that there isn't really much difference in actual meaning between **io ajn** and **kio ajn**, or between **ie ajn** and **kie ajn**, etc. In fact, the expressions are just about interchangeable:

Metu la kofron ien ajn.	} Put the suitcase	{ anywhere at all.
Metu la kofron kien ajn.		

Li povas veni iam ajn.	} He can come	{ anytime at all.
Li povas veni kiam ajn.		

In fact, **ajn** can be used after just about any correlative, always emphasizing the indefiniteness of the word:

Mi serĉis lin ĉie ajn.	I looked for him every place (I could think of).
-------------------------------	---

Metu neniom ajn da sukero en mian kafon.	Don't put any sugar whatever in my coffee.
---	---

However **ajn** cannot be used with a correlative beginning **ti-**, because these words point out something that's *definite*: *that* one, *that* thing, *that* place, etc.

§6. More about ways to tell when things happen.

Suppose we want to say something happens on a certain day, for example "on Monday." We *could* say **je lundo**, etc. A better and more usual way, though, is to use the accusative **n** ending:

Mi ekflugos al Parizo je lundo.	} I'll take off for Paris
Mi ekflugos al Parizo lundon.	

Technically, this use of **n** shows that a preposition—in this case **je**—has been omitted. (More on this in the next section.) Or you might think of the accusative **n** here as pointing out the *one specific day* we are focusing on.

But if we want to say when something *generally* or *repeatedly* happens we use the adverbial **e** ending:

**La stevardino flugas al
Parizo lundon.**

The stewardess will fly to Paris
(on) Monday.

**La stevardino flugas al
Parizo lunde.**

The stewardess flies to Paris on
Mondays.

**Mi ŝatas resti hejme
vespere.**

I like to stay home evenings.

**Matene la birdoj kantas
bele.**

In the mornings the birds sing
prettily.

§7. About omitting prepositions.

Besides **je**, you can omit *any* preposition and replace it with the accusative **n** ending; but you shouldn't do this indiscriminately. The reason for this rule is to avoid a problem people often have when learning a new language. That problem is that some verbs may need to be used with a preposition in one language, but without a preposition in someone else's language. Why, for instance, do we say "Pay *for* the meal" while the French say "Pay the meal"? Why is it that we say "Help *me*!" and the Germans say "Help *to* me!" It is only a matter of custom anyway, so to avoid all worry, Esperanto lets you use either way:

Pagu la manĝon.

Pagu por la manĝo.

} Pay for the meal.

Helpu min!

Helpu al mi!

} Help me!

As a beginner, you can simply follow your natural inclinations, using prepositions when you would use them in English; just don't be confused when you find someone else doing it the other way. The "best" way to use prepositions (or not use them) is a question of style, and that is best learned by reading and listening to lots of good Esperanto.

§8. How to say “It’s warm,” “It’s nice,” “It’s important,” etc.

Back in Lesson 5 we learned that when English “it” doesn’t actually refer to some specific thing, “it” is omitted in Esperanto. Sometimes in English we use this same mythical sort of “it” with a form of “to be” and an adjective to make a statement like “It’s warm,” “It’s nice,” etc. In Esperanto, the “it” being omitted, the describing word has an **e** ending (not an **a** ending). The reason for this is that adjectives in Esperanto must apply to some specific noun or pronoun. If there is no noun or pronoun to refer to, the describing word must take the **e** ending and function as an adverb:

Estas varme hodiaŭ.	It’s warm today.
Estas bone, ke vi venis.	It’s nice that you came.
Estas grave esti amata.	It’s important to be loved.

(In the third example, **amata** has an **a** ending, even though no noun or pronoun is stated, because the meaning is that “you” or “one” or “a person” needs to be loved. But **grave** has the **e** ending because it describes “being loved” which is neither a noun nor a pronoun, but a verb phrase.)

Drill #1: Make your own sentences from this table.

Estas Ne estas Povus esti	bone interese grave tro frue danĝere eble	paroli pri tiu afero. studi la plej novan raporton. pardonu lin pro la eraro. korespondi kun fremdaj ĵurnalistoj.
---------------------------------	--	--

§9. Word building with **ge-** and **mis-**.

The prefix **ge** means “of both sexes”:

patro	father	patrino	mother	gepatroj	parents
frato	brother	fratino	sister	gefratoj	brother(s) and sister(s)
Sinjoro	gentleman	Sinjinoro	lady	gesinjoroj	ladies and gentlemen

The prefix **mis** means “wrong,” very much as in English:

kompreni	to understand	miskompreni	to misunderstand
decidi	to decide	misdecidi	to make a wrong decision
kalkuli	to calculate	miskalkuli	to miscalculate
paŝo	a step	mispaŝo	a false step

§10. Word building with -ĉj and -nj.

These prefixes form the affectionate or “short” versions of persons’ names. Unlike other suffixes, they may be added to just a *part* of the original word, to make a pleasing name:

Johano	John	Joĉjo	Johnnie
Karlo	Charles	Karĉjo	Charlie
Petro	Peter	Peĉjo	Pete
Vilhelmo	William	Vilĉjo	Bill
Elizabeto	Elizabeth	Elinjo	Liz, Lizzie
Anno	Anne	Anjo	Annie
Margareto	Margaret	Marnjo	Maggie
Katarino	Catherine	Kanjo	Cathy
patro	father	Paĉjo	Dad, Daddy, Papa, etc.
patrino	mother	Panjo	Mom, Ma, Mama, etc.

§11. Affixes are words, too.

Affixes (prefixes and suffixes) become words, with their own meanings, when you add appropriate endings. Some common uses of affixes as words are:

eta	tiny	ege	tremendously
aĵoj	things	ano	a member
iĝi	to become	igi	to cause
ilo	a tool	ree	over again, back
mala	opposite	ujo	a container
ulo	a fellow, guy	eble	possibly, maybe

§12. About “elision.”

In English we often shorten “It is” to “It’s” or “He is” to “He’s,” etc., replacing the omitted letter with an apostrophe. In Esperanto it is permissible to omit (or “elide”) certain letters, and replace them with apostrophes, as follows:

(1) The **a** in **la** can be omitted, provided the word is preceded or followed by a vowel sound, with which it can be smoothly pronounced.

(2) The **o** ending of a noun can be omitted, provided it is final. That is, the **o** cannot be omitted if followed by a plural **j** ending and/or accusative **n** ending.

Elision is not used very often in Esperanto except in poetry and songs:

Brilu, brilu, eta stel’,
Diamanto de l’ ĉiel’!
Tiel alta super ter’,
Kio estas vi, en ver’?

(Note that the stress falls on exactly the same vowel as though there were no elision: **ĉi-EL-o** or **ĉi-EL’**.)

Vortolisto

aer/voj/o	airway	brili	to shine
agi	to act	cetera	else
aĝo	age	ĉarma	charming
ajn	(See §§3-4.)	ĉielo	sky, heaven
alta	high	dankinde*	worthy of thanks
alveni	to arrive	demando	question
Ameriko	America	diamanto	diamond
angla	English	dogano	customs
Anno	Anne	edz/iĝ/i	to get married
anonci	to announce	el/ir/i	to go out, exit
anonc/ist/o	announcer	Elizabeto	Elizabeth
aparteni	to belong	enmigrado	immigration
atento	attention	eraro	error
aŭgusto	August		
bari	to bar, obstruct		
bar/il/o	barrier, fence	*Ne dankinde	= Don’t mention it, You’re welcome.
bon/ven/o	welcome		

Eŭropa	European	pafi	to shoot
filo	son	pagi	to pay
for/las/i	to leave, forsake	paki	to pack
frapi	to strike, hit	pak/aĵ/o	baggage
Ge/sinjor/o/j	Ladies and Gentlemen	pasporto	passport
inspekti	to inspect	paŝo	step
inspekt/ist/o	inspector	peti	to ask (for)
interesa	interesting	plezuro	pleasure
interpreti	to interpret	pro	for, on account of
interpret/ad/o	interpreting	promen/ant/o	stroller, walker
inventi	to invent	rimarko	remark, observation
jaro*	year	Roberto	Robert
Johano	John	sci/vol/i	to want to know, wonder
Katarino	Catherine	septembro	September
kies	whose	slipo	slip (of paper)
korekti	to correct	stampi	to stamp
krom	except, besides	stari	to stand
lasi	to leave	stelo	star
Londono	London	sub/skrib/i	to sign
mal/kovr/i	to discover	super	above, over
mangô	meal	tero	earth
Margareto	Margaret	tut/aĵ/o	whole thing
mil	thousand	vero	truth
momento	moment	Vilhelmo	William
monato	month	vizaĝo	face
naski	to bear (a child)	voĉo	voice
nask/iĝ/tago	birthday	vojaĝ/ant/o	traveler, voyager
nenie	nowhere		
neniom	no amount		
nomo	name		
ofte	often		

***Mi havas 52 jarojn = I'm 52**
years old.

Dialogo: Professor Miller is at the airport meeting his friend from Paris, Mr. Dupont.

Voĉo de anoncisto: Vian atenton, mi petas, Gesinjoroj. Eŭropaj Aervojoj anoncas la alvenon de sia flugo numero ducent naŭdek ok de Londono kaj Parizo. La pasaĝeroj eliros per la elirejo numero ses por inspekto de dogano kaj enmigrado. Mi dankas.

Prof. Miller: Pardonu, Sinjoro. Vi estas la doganisto, ĉu ne? Mi atendas amikon, kies alveno estis ĵus anoncita. Li ne tre bone parolas la anglan lingvon. Ĉu mi povas atendi ĉi tie? Estas eble, ke mi povos interpreti por vi.

Inspektisto: Mi bedaŭras, Sinjoro. Ne estas permesate resti tie ĉi. Vi devos stari ĉe la alia flanko de la barilo. Sed se mi bezonus helpon, tiam mi vokus vin.

Prof. Miller: Bone. Dankon. Ha, jen li venas nun. S-ro Dupont! Bonvenon al Usono! Kiel vi fartas? Ĉu vi havis bonan flugon? Estas bone, vidi vin denove.

Inspektisto: Unu momenton. Mi devas fari al vi kelkajn demandojn. Ĉu mi povus vidi vian pasporton?

S-ro Dupont: Kion? Mi ne komprenas. Kion li volas?

Prof. Miller: Li petas vian pasporton.

S-ro Dupont: Ho, kompreneble. Jen ĝi.

Inspektisto: Dankon. Kio estas via nomo?

S-ro Dupont: Kio? Mia nomo? Roberto Dupont.

Inspektisto: Kiam vi estis naskita?

S-ro Dupont: ??????

Prof. Miller: Li demandas vian aĝon.

S-ro Dupont: Mi havas kvindek-du jarojn. Mia naskiĝtago estas la kvina de tiu ĉi monato.

Inspektisto: Ĉu vi estas edziĝinta?

S-ro Dupont: Mi petas?*

Prof. Miller: Inspektisto, li havas ĉarman edzinon kaj tri belajn infanojn.

Inspektisto: Kiel longe vi restos en Usono, S-ro Dupont?

S-ro Dupont: Kiel longe? En Usono? Nur du semajnojn, malfeliĉe.

Inspektisto: Ĉu tio estas via tuta pakajo?

*Polite for "What did you say?"

S-ro Dupont: Jes, tiu pakaĵo apartenas al mi. Rigardu, mia nomo estas stampita sur ĝi.

Prof. Miller: Ne, li scivolas, ĉu vi havas alian pakaĵon, krom tio.

S-ro Dupont: Ho, mi miskomprenis. Pardonu al mi. Ne, tio estas la tutaĵo. Mi havas nenion ajn ceteran.

Inspektisto: Bone. Jen via pasporto. Bonvolu subskribi tiun ĉi slipon.

Dankon. Vi povas pasi. Kaj dankon al via amiko, pro la interpretado.

Prof. Miller: Ne dankinde! Estis mia plezuro. Nu, Roĉjo, ĉu ne estus multe pli facile por la vojaĝantoj, se ĉiuj inspektistoj de dogano kaj enmigrado povus paroli Esperanton?

S-ro Dupont: Mia juna amiko! Permesu al mi korekti tiun rimarkon iomete. Estus multe pli facile por la tuta mondo, se *ĉiu* povus paroli Esperanton! Ĉu vi konsentas?

“Ĉu tio estas via tuta pakaĵo?”



Carolina K. Smith MD / Shutterstock, Inc.

PART TWO

An
Esperanto
Reader

The reading selections that follow, with the accompanying articles on grammar and style, constitute an advanced course in Esperanto. The texts are drawn from a variety of sources including books and magazines published in various countries over a period of some years.

The texts, some of which have been edited for length or timeliness, present a wide range of writing styles and subject matter. They include personal letters, news items, history and travel accounts, poetry and serious fiction, etc.

Footnotes have been added to clarify, on their first occurrence, constructed words and others requiring special comment. Other words will be found in the dictionary at the back.

1. La Vetero en Svedlando¹

(From *Allas Andra Språk*, by Ernfrid Malmgren, Malmö, Sweden)

La vetero en Svedlando estas tre varia. En la norda parto de la lando la tagoj malvarmiĝas jam en novembro, sed ofte estas frosto kaj neĝo eĉ en oktobro. En la suda parto de la lando la vintro venas pli malfrue, kaj en kelkaj jaroj preskaŭ ne falas neĝo² en kelkaj partoj de Skanio.³ Sed kutime⁴ la vintro daŭras multajn monatojn en la tuta lando. La plej malvarma monato estas februaro. Tiam neĝo kovras la teron, kaj glacio ĉiujn lagojn. La junuloj povas glitkuri.⁵ Multaj ankaŭ ludas glitpilkon⁶ aŭ hokeon. Sur la neĝo en la arbaroj kaj sur la kampoj multaj sportistoj⁷ skikuras.⁸

En marto, aprilo aŭ majo venas la printempo. Tiam la tagoj longiĝas kaj varmiĝas. La arboj ricevas sian foliaron,⁹ la herbo verdiĝas kaj en la ĝardenoj la floroj ekkreskas.¹⁰ Kia bela sezono estas la printempo!

La somero en Svedlando kutime ne estas tre varma. Sed oni ĝojas des pli¹¹ pro varmaj someraj tagoj. Dum tiu sezono ĉiuj laboristoj kaj oficistoj¹² havas libertempon.¹³ Multaj veturas al somerdomoj¹⁴ en la kamparo¹⁵ kaj aliaj faras ekskursojn per siaj aŭtoj. Sed la kamparanoj¹⁶ devas labori multe dum tiu sezono.

¹Sved/land/o, Sweden ²preskaŭ ne falas neĝo, almost no snow falls
³Skanio, Skane, southernmost province of Sweden ⁴kutim/e, ordinarily
⁵glit/kur/i, go skating ⁶glit/pilk/o, a Swedish game similar to hockey
⁷sport/ist/o, sportsman, sports enthusiast ⁸ski/kur/i, go skiing
⁹foli/ar/o, foliage ¹⁰ek/kresk/i, start to grow ¹¹oni ĝojas des pli, one is all the gladder
¹²ofic/ist/o, official, office-holder ¹³liber/temp/o, vacation, time off
¹⁴somer/dom/o, summer house ¹⁵kamp/ar/o, farming land, "the country"
¹⁶kamp/ar/an/o, farmer

Dum la aŭtuno ofte estas pluvo kaj forta vento. Sed tiam la fruktoj ruĝiĝas, la greno maturiĝas kaj la foliaro flaviĝas. Tial oni ĝuas la aŭtunon malgraŭ la griza kaj nuba vetero.

2. Pri Zamenhof

(From *Allas Andra Språk*, by Ernfrid Malmgren)

Multaj personoj, kiuj faris al la homaro¹ gravajn servojn, vivis tre modeste aŭ eĉ mizere.² Ili tute oferis sin por plenumi sian taskon. Mi pensas ne nur pri la misiistoj³ sed ankaŭ pri multaj inventistoj.⁴ Mi bezonas mencii nur Gutenberg, kiu estas la patro de la presarto.⁵

Modeste vivis ankaŭ la verkinto⁶ de Esperanto. Lia nomo estas Ludoviko Zamenhof. Li naskiĝis⁷ en urbeto en Polujo.⁸ En tiu urbo oni parolis kvar lingvojn: la rusan, la polan, la germanan kaj la hebrean. La juna, serioza Ludoviko ofte rimarkis, ke la homoj sur la stratoj malpaciĝis⁹ pro tio, ke¹⁰ ili miskomprenis unu la alian. Ĉar li estis pacama¹¹ knabo, kaj ĉar en la harmonia hejmo li estis amata infano, li sentis grandan malĝojon.

Li komencis cerbumi¹² pri tio, ĉu ne estus eble¹³ krei facilan interpopolan¹⁴ lingvon, kiun ĉiu homo povus lerni flanke¹⁵ de la gepatra¹⁶ lingvo. Tia lingvo evidente estas bezonata, li pensis.

Tiu ideo tiom kaptis liajn pensojn, ke li komencis fari eksperimentojn. Kaj tiuj eksperimentoj post multaj jaroj donis kiel rezulton la libron kun la titolo *La internacia lingvo*. Li eldonis¹⁷ sian libron sub la pseŭdonimo “D-ro Esperanto.”

La kreo de Esperanto sekve¹⁸ estas produkto de realista¹⁹ persono, kiu volis doni al la homoj rimedon por facila interkompreno.²⁰ Kiel idealisto li ne celis gajni monon per la lingvo, sed li noble kaj grandanime²¹ publike deklaris, ke la lingvo ne estas lia sed ĉies propraĵo,²² ĉar ĝi apartenas al ĉiu, kiu uzas ĝin.

La lingvo nun estas ne nur parolata kaj komprenata sed ankaŭ ŝatata kaj amata de centmiloj²³ da homoj en ĉiuj kontinentoj sur la terglobo.²⁴



The plaque commemorating the birthplace of L.L. Zamenhof in Białystok, Poland

¹la hom/ar/o, humanity, mankind ²mizer/e, wretchedly ³misi/ist/o, missionary ⁴invent/ist/o, inventor ⁵la pres/art/o, the art of printing ⁶verk/int/o, author ⁷nask/iĝ/i, to be born ⁸Pol/uj/o, Poland ⁹mal/pac/iĝ/i, to quarrel ¹⁰pro tio, ke, for the reason that ¹¹pac/am/a, peace-loving ¹²cerbumi, rack one's brain, think hard ¹³pri tio, ĉu ne estus eble, about whether it wouldn't be possible ¹⁴inter/popol/a, inter-people ¹⁵flank/e de, at the side of, alongside of ¹⁶ge/patr/a, parental ¹⁷el/don/i, to issue, publish ¹⁸sekv/e, consequently ¹⁹real/ist/a, realistic ²⁰inter/kompren/o, mutual understanding ²¹grand/anim/e, magnanimously ²²propr/aj/o, property ²³cent/mil/o/j, hundreds of thousands ²⁴ter/glob/o, globe (of the world)

About "La"

Remember, **la** is sometimes used to denote a thing in general or in its totality: **La aŭtuno estas bela sezono**, Autumn (autumns in general) is a pretty season. **La homoj estas inteligentaj estaĵoj**, Human beings (not just certain ones, but humans in general) are intelligent beings. **La idealistoj havas grandan amon por la homaro**, Idealists have a great love for humanity.

3. Barbro kaj Eriko—I

(By Alois Schneider and Magda Carlsson, by kind permission of the authors and Eldona Societo Esperanto.)

Serio de leteroj inter du junaj geesperantistoj¹—aŭstro kaj svedino:

Hohenberg, la 10-an² de oktobro

Bonan tagon, kara knabino!

La hodiaŭa tago³ alportis⁴ al mi ĝojon grandegan: nia instruisto donis⁵ eksterlandajn⁶ adresojn kaj mi, feliĉulo, ricevis la vian.⁷

Mi esperas, ke la destino donis al mi bonan, fidelan amikino kaj ke mi ĉiam povos kontentigi⁸ vin per miaj leteroj.

Barbro, via belsona⁹ nomo, tre plaĉas al mi¹⁰ kaj vi certe ankaŭ estas ĝentila knabino. Mi vidas vin antaŭ mi, ridantan, kun demandanta mieno: “Kiu vi estas?”

Do: dudekdujara¹¹ junulo, granda, brunhara,¹² brunokula,¹³ aspirante ĉion belan kaj bonan sed agante plej ofte malsaĝe,¹⁴ malbone.

Antaŭ unu jaro¹⁵ mi finis post gajaj, petolaj studjaroj¹⁶ la mezan lernejon¹⁷ kaj faris instruistekzamenon.¹⁸ Instruinte poste¹⁹ dum kelkaj monatoj en privata lernejo, mi nun devas atendi, ĝis mi ricevos daŭran²⁰ oficon.

Dum tiu tempo mi daŭrigas²¹ mian studadon. Mi speciale interesiĝas²² pri literaturo kaj fremdaj lingvoj, de post²³ kelkaj semajnoj mi diligente lernas Esperanton, kiu ŝajnas al mi tiel facila, bela, kaj tre grava por ĉiuj popoloj.

En nia kurso kunvenas preskaŭ kvindek personoj, seriozaj gesinjoroj, gajaj gefraŭloj.²⁴ Nia instruisto estas entuziasma esperantisto, kiu multe ŝercas kaj ridas kun ni.

Ĉu vi jam delonge lernas Esperanton?²⁵ Ĉu vi ankaŭ kurson vizitas?²⁶

Skribu multe pri vi, pri viaj ĝojoj, malĝojoj, pri viaj laboroj,²⁷ plezuroj, deziroj, pri via vilaĝo kaj via lando belega.

Kun sopiro²⁸ mi atendas vian respondon.

Tre korajn salutojn²⁹

Eriko

¹**ge/esperant/ist/o/j**, Esperantists (of both sexes) ²**la 10-an**, (on) the 10th ³**la hodiaŭ/a tag/o**, the present day, this day ⁴**al/port/is**, brought ⁵**dis/don/is**, gave out (see DIS-, below) ⁶**ekster/land/a**, foreign (lit., outside the country) ⁷**la vi/a/n**, yours ⁸**kontent/ig/i**, to satisfy ⁹**bel/son/a**, sonorous, pretty-sounding ¹⁰**tre plaĉas al mi**, I like very much (see below) ¹¹**du/dek/du/jar/a**, 22-year-old ¹²**brun/har/a**, brown-haired ¹³**brun/okul/a**, brown-eyed ¹⁴**mal/saĝ/e**, foolishly ¹⁵**antaŭ unu jaro**, one year ago ¹⁶**stud/jar/o/j**, student years ¹⁷**mez/a lern/ej/o**, intermediate school (a kind of university) ¹⁸**instru/ist/ekzamen/o**, exam to become a teacher. Note that in Esperanto (as in many European languages) one “makes” rather than “takes” a test ¹⁹**post/e**, afterward ²⁰**daŭr/a**, continuous, permanent ²¹**daŭr/ig/i**, to continue, carry on ²²**interes/iĝ/i**, to be(come) interested ²³**de post**, since (**de post kelkaj semajnoj**, for the past several weeks) ²⁴**ge/fraŭl/o/j**, single people ²⁵**Ĉu vi...Esperanton?** Have you been learning Esperanto for a long time now? ²⁶**vizit/i**, here: to attend ²⁷**labor/o/j**, labors, work ²⁸**kun sopir/o**, longingly ²⁹**kor/a/j/n salut/o/j/n**, cordial greetings

DIS-

The prefix **dis** denotes separation into different parts or directions: **disdoni**, to give out, hand out; **dissendi**, to disseminate, send out, broadcast; **disiri**, to separate, go separate ways.

PLAĈAS

Although **ŝati** may be translated “to like” its exact meaning is “to appreciate,” “to have high regard for.” Another way to say “like” is with **plaĉi**, which, however, requires a turned-around construction like this: **Tiu libro plaĉas al mi**, I like that book (lit., “That book is pleasing to me”). **Via belsona nomo tre plaĉas al mi**, I like your pretty-sounding name very much. **Kiel plaĉas al vi la manĝo?** How do you like the meal?

JAM, JAM NE

Jam (“already”) is often used in the sense of “by now,” “up to now”: **Li jam kantadas tri horojn**, He’s been singing for three hours now. **Mi jam delonge sciis tion**, I’ve known that for a long time now. **Jam nun!** Right away! **Ĉu vi jam delonge lernas Esperanton?** Have you been learning Esperanto for a long time now?

Jam ne means “not now” in the sense of “not any longer”: **Jam ne pluvas**, It’s not raining now (it has been raining until now, but not any longer). **Mi jam ne amas vin**, I don’t love you any more.

BONAN TAGON

When someone says “Good morning” or “Good day” he is not speaking a complete sentence; but everyone understands the meaning: “*I wish you a good morning*,” “*Have a good day*,” etc. In Esperanto, the words **bonan tagon**, **bonan matenon**, etc., have the accusative ending because they are objects of a verb, even though that verb is not expressed.

More examples: **bonan vesperon**, good evening; **bonan nokton**, good night; **bonan apetiton**, good appetite (a common mealtime greeting like “enjoy your meal”); **sukceson** or **bonŝancon**, good luck; **bonvenon**, welcome (as in “welcome to my home,” not “you’re welcome”); **saluton**, hello, hi, greetings; **korajn salutojn**, cordial greetings.

PLEASE, THANK YOU, YOU’RE WELCOME

There are basically two ways to say “please” in Esperanto. One is with a form of **bonvoli** (literally: to have the good will to) which we’ve already met: **Bonvolu doni al mi la salon**, Please give me the salt. **Bonvole parolu pli malrapide**, Please speak more slowly.

The second way is with **mi petas**, “I beg,” “may I ask:” **Donu al mi la salon, mi petas**, Please give me the salt. **Mi petas, parolu pli malrapide**, Please speak more slowly.

There are several ways to say “thank you,” all using the verb **danki**: **dankon, dankojn, mi dankas, mi dankas vin.** “Thanks a lot” can be **multan dankon, multajn dankojn, dankegon, or kora(j)n danko(j)n.**

“You’re welcome” as a reply to “thank you” is variously **ne dankinde** (not worth thanking), and—again—**mi petas**, please, meaning “Please don’t mention it,” or “Please let me do even more for you.”

One further use of **mi petas** is to ask someone to repeat something you didn’t quite hear or understand. In this case you pronounce it as a question—**Mi petas?**—and the meaning is “I beg your pardon—please say that again?”



4. Du Leteroj

(From *A Key to Esperanto*.)

Kara Sinjoro,

En Esperanta gazeto mi vidis vian adreson, kun la rimarko, ke vi estas armea oficiro. Mi ankaŭ estas oficiro, kaj mi kredas, ke ni povus kun granda intereso korespondi inter ni pri multaj demandoj. Ĉu vi volas korespondi kun mi?

Kun kora saluto,

Estimataj¹ Sinjoroj,

Laŭ via peto ni sendas al vi ĉi-kune² nian prezliston, kiu montros al vi, ke niaj varoj ne estas multekostaj.³

Rilate al⁴ la kvalito, ni povas certigi⁵ al vi, ke ni estas firmo de bona reputacio, kaj ke ni produktas nur objektojn de la plej bona speco.

Atendante viajn mendojn, kiuj ricevos nian tujan⁶ atenton.

Viaj fidele,

¹estim/at/a, esteemed (see below) ²ĉi-kun/e, herewith ³mult/e/kost/a, expensive ⁴rilat/e al, in regard to ⁵cert/ig/i, to assure ⁶tuj/a, immediate

ESTIMATA

Estimata, “esteemed,” is the usual form of address for business or rather formal letters. **Kara** is more frequently used in informal letters, especially to friends.

5. Barbro kaj Eriko—II

Rud en la 16-a de oktobro

Malproksima amiko,

Koran dankon! mi tre ĝojis, kiam mi ricevis vian leteron. Kun intereso mi legis, kion vi tiel afable rakontis, kaj ankaŭ mi volas iomete paroli pri mi mem. Nur fremda, stranga nomo mi ja¹ ankoraŭ estas al vi!

Mia patro (kiu, cetere,² nun tre interese³ rigardas la belan poŝtmarkon⁴ aŭstran) estas kampulo.⁵ Post la morto de mia patrino kaj frato Gösta, mastrumadas⁶ kaj helpas al mia patro nur deknaujara knabino. Jes, vi ĝuste divenis: estas mi.

Ni loĝas en izolita bieno, kiu situas kvin kilometrojn okcidente⁷ de Karlstad, la plej proksima urbo. Tie mi vizitas depost du monatoj esperantan kurson, kiun gvidas juna germano. Multaj gelernantoj, preskaŭ kvardek, partoprenas⁸ la kurson: geedzoj, gefraŭloj, kaj infanoj.

Sed temis pri⁹ mia hejmo. Vi vidas dometon ruĝe-brunan¹⁰ kiun bele ĉirkaŭplektas¹¹ hedero. Kiel ordinare la biendomoj¹² svedaj,¹³ ĝi estas el ligno, ĉar riĉa je arbaroj estas nia lando. Inter la blankaj fenestrokadroj¹⁴ amike elrigardas¹⁵ floroj—pri kiuj mi iom fieras! Flanke de la domo troviĝas¹⁶ stalo por kvar bovinoj kaj unu ĉevalo. Kelkaj kampoj ĉirkaŭe¹⁷ apartenas al ni.

En tiu medio miaj tagoj trankvile pasas. Ne mankas al¹⁸ mi laboro, sed vespere mi ofte havas tempon por legi librojn aŭ studi Esperanton. De nun¹⁹ mi ja havos ankaŭ novan, agrablan okupon: korespondadi kun vi. Vere, tio estas granda plezuro, kaj mi petas—baldaŭ respondu!

Multajn salutojn de via sveda amikino,

Barbro

¹ja, indeed, after all ²ceter/e, “I might add” (see below) ³interes/it/e, interestedly ⁴poŝt/mark/o, postage stamp ⁵kamp/ul/o, farmer
⁶mastr/um/i, to keep house ⁷okcidente de, west of ⁸part/o/pren/as, take part in
⁹tem/is pri, the subject was ¹⁰ruĝe-brun/a, reddish brown
¹¹ĉirkaŭ/plekt/as, twines around ¹²bien/dom/o, farmhouse
¹³kiel...svedaj, as Swedish farmhouses usually (are) ¹⁴fenestr/o/kadr/o, window frame
¹⁵el/rigard/as, look out ¹⁶trov/iĝ/as, is found ¹⁷ĉirkaŭ/e, roundabout
¹⁸mank/as al (see below) ¹⁹de nun, from now on



JA

This little word is used for emphasis and means “indeed,” “assuredly,” “after all,” “you know,” etc: **Li ja kantas belege**, He certainly does sing beautifully. **Tiu aŭto ne estas nova, sed ĝi ja estas mia**, That car isn’t new, but it *is* mine.

CETERA, CETERE

Cetera means “the rest,” “the part left over”: **Kelkaj el la knaboj pilkludis, kaj la ceteraj iris hejmen**, A few of the boys played ball and the rest of them went home.

Cetere means “as for the rest,” “additionally,” “besides,” “I might add,” “moreover,” “on the other hand,” “by the way.” **Kaj cetere**, and so on, and more besides.

MANKAS

In Esperanto no person ever lacks a thing; the thing has to be lacking to the person: **Mankas al mi la tempo por fari tion**, I lack the time (in order) to do that. **Ne mankas al mi laboro**, I don’t lack for work.

TEMAS PRI

Temo is a theme, a topic, a subject under discussion: **La temo de mia libro estas la arto**, The subject of my book is art.

Temi means “to have as its subject,” “to be about:” **Mia libro temas pri la arto**, My book is about art.

With no subject expressed, **temas pri** means “the subject is,” “it is a question of:” **Temas nun pri la prezo de viaj varoj**, The question now has to do with the price of your goods. **Pri kio temas?** What are we talking about? **Ne temas pri manko de mono**, It is not a matter of lack of money.

6. Trans la Lingvajn Barilojn—I

(By Francis Helmuth, from *North American Esperanto Review*)

Unu jaron post kiam ili komencis lerni Esperanton, Francis kaj Bonnie Helmuth lasis sian hejmon en San Diego, California, por longa vojaĝo tra Eŭropo, uzante la lingvon kiel bileton al multaj aventuroj kaj novaj amikecoj.¹

Le Havre, Francujo,² 16 oktobro

La S.S. Alblaserdijk alvenis ĉe la haveno de Le Havre, je la 10a ptm.,³ la 15an de oktobro, kaj estis tro malfrue por elŝipiĝi,⁴ do ni devis atendi ĝis merkreda mateno. Tiun matenon la vetero estis bela, la suno brilis, kaj ne estis malvarme ekstere.⁵ Antaŭ la matenmanĝo,⁶ je 7:30 atm.,⁷ viro atendis min en la ripozejo⁸ de la pasaĝeroj. Kiam mi proksimiĝis⁹ al li, mi vidis verdan steleton sur lia jaketo,¹⁰ kaj kiam mi estis staranta apud li, li salutis min per la belaj, bonaj vortoj, “Bonan matenon, Sinjoro.”

La viro estis Jean Gibaux, membro de la Esperanta grupo en Le Havre. Li diris al mi ke la delegitino¹¹ tie ricevis mian leteron el New Orleans, Usono, kaj ke li volas konduki min kaj mian edzinon al la domo de Hélène Amiard, instruistino.

Hélène Amiard estas ĉarma, afabla virino kiu diris ke ŝi volas prezenti nin al siaj gesamideanoj¹² en Le Havre, ĉe kunveno tiunokte.¹³ Bedaŭrinde, ni devis foriri, ŝipe, je la tria ptm. la saman tagon, do ni ne havis la okazon por renkonti la aliajn geesperantistojn tie. Almenaŭ, ni babiladis dum unu horo, Esperante (ŝi ne povis paroli angle), kaj tiam Samideanino Amiard montris al ni diversajn partojn de sia urbo.

¹amik/ec/o, friendship (see -EC below) ²Franc/uj/o, France (see -UJ below) ³ptm. = post/tag/mez/e, p.m. ⁴el/ŝip/iĝ/i, to debark ⁵ekster/e, outside ⁶maten/manĝ/o, breakfast ⁷atm. = antaŭ/tag/mez/e, a.m.

⁸ripoz/ej/o, lounge ⁹proksim/iĝ/i, to approach ¹⁰jak/et/o, jacket

¹¹delegit/in/o, delegate (female) representing that city for the U.E.A.

¹²ge/sam/ide/an/o/j, fellow Esperantists (see SAMIDEANO below)

¹³tiu/nokt/e, that night

Le Havre estas bela urbo kie multaj ŝipoj haltas por ŝarĝi kaj malŝarĝi varojn kaj pasaĝerojn ĉiutage. Ĝi estis parte detruita dum la dua mondmilito¹⁴ kaj oni konstruas multajn belajn novajn konstruaĵojn: ĉambrarojn¹⁵ kaj konstruaĵojn por komercaj aferoj. La novaj konstruaĵoj estas modernaj kaj belaj, kaj havas tri aŭ kvar etaĝojn super allogaj¹⁶ butikoj. En la plej malnova parto de la urbo estas la malnovaj butikoj kaj magazenoj kaj sur la larĝa trotuaro estas budaroj,¹⁷ kie oni vendas ĉiajn aĵojn.¹⁸ Tie la loĝantoj¹⁹ aĉetas manĝaĵojn, vestaĵojn,²⁰ juvelojn, bombonojn, ktp.²¹

Ankaŭ la delegitino nin helpis trovi la oficejon de la Amerika Ekspreso²² kaj la poŝtoŭicejon,²³ kaj ni sendis poŝtkartojn²⁴ kaj leterojn al niaj geamikoj en Usono. Je la 12a ni aĉetis Svisan fromaĝon, ŝinkon, vinon, kaj panon, kaj portis ilin al la domo de Samideanino Amiard por nia tagmeza manĝo. Post la manĝo ni denove babiladis Esperante, kaj post du bonaj horoj de interesa interparolo²⁵ ni devis adiaŭi²⁶ kun la espero ke denove ni vizitos la urbon Le Havre kaj eble renkontos la aliajn geesperantistojn tie.

¹⁴**mond/milit/o**, world war ¹⁵**ĉambr/ar/o**, apartment ¹⁶**al/log/a**, attractive ¹⁷**bud/ar/o**, group of vending stalls, bazaar ¹⁸**ĉiaj aĵoj**, all sorts of things ¹⁹**loĝ/ant/o**, inhabitant ²⁰**vest/aĵ/o**, clothing ²¹**ktp. = kaj tiel plu**, etc., and so on ²²**Amerika Ekspreso**, American Express Co. ²³**poŝt/ofic/ej/o**, post office ²⁴**poŝt/kart/o**, post card ²⁵**inter/parol/o**, conversation ²⁶**adiaŭ/i**, to say farewell

-EC

The suffix **ec**, rather like *-ness* in English, names an abstract quality: **bona**, good, **boneco**, goodness; **pura**, clean, **pureco**, cleanliness; **feliĉa**, happy, **feliĉeco**, happiness. The English equivalents do not always end in *-ness*, however: **amiko**, friend, **amikeco**, friendship; **alta**, high, **alteco**, height; **saĝa**, wise, **saĝeco**, wisdom.

-UJ

This suffix, which we first met in Lesson 7, means container: **inko**, ink, **inkujo**, ink-well, etc. It is also commonly used, with roots denoting nationality or race, to form the names of countries: **franco**, a Frenchman, **Francujo**, France; **belgo**, a Belgian, **Belgujo**, Belgium; **anglo**, an Englishman, **Anglujo**, England; **polo**, a Pole, **Polujo**, Poland.

Another use for **uj**, which you will probably only see in older texts, names trees from their fruits: **pomo**, apple, **pomujo**, apple tree; **ĉerizo**, cherry, **ĉerizujo**, cherry tree. Current usage has all but discarded these forms in favor of **pomarbo**, **ĉerizarbo**, etc.

SAMIDEANO

The literal translation of **sam/ide/an/o** is “a person associated with the same idea.” The word is used of Esperantists and for all practical purposes means “fellow Esperantist.”

ADIAŬ—ĜIS LA REVIDO

There are two ways to say “goodbye” in Esperanto. **Adiaŭ** (like French *adieu*, or Spanish *adiós*) indicates a rather final or long-time parting: **Adiaŭ, karulino mia, mi foriras militon**, Farewell, my darling, I’m off to war. **Ĉu mi adiaŭu ĉiujn miajn esperojn?** Must I say goodbye to all my hopes? **Adiaŭa parolado**, farewell address.

For a shorter time, one says “goodbye” with **Ĝis la revido**, Until we meet again (lit., “until the re-seeing”). This is sometimes shortened to just **Ĝis revido**, **Ĝis la**, or even **Ĝis!**

POR—PRO

Both of these words are generally translated “for” but they are usually not interchangeable. **Por** (for the purpose of) looks ahead to some goal; **pro** (on account of) looks backward to a reason: **Tiu donaco estas por Paĉjo**, That gift is for Papa. **Dankon pro la konsilo**, Thanks for the advice. **Ni enŝipiĝis por Le Havre**, We embarked for Le Havre. **Ni ne elŝipiĝis pro la malfrua horo**, We didn’t get off the ship because of the late hour.

Por preceding an infinitive usually means “in order,” or “for the purpose of,” though in English these words are not always expressed: **Ŝi venis por viziti siajn infanojn**, She came (in order) to visit her children. **Mi haltis por vidi ion**, I stopped (in order) to see something. **Mi havas multon por fari**, I have a lot to do. (It helps to remember the old song: “I’m going to Louisiana, my true love for to see.”) Watch for numerous instances of this use of **por** plus the infinitive, in the following selection.

7. Trans la Lingvaj Barilojn—II

Bonnie kaj mi devis elŝipiĝi en Antverpeno, Belgujo, ĉar la vaporŝipkompanio¹ ne volis ke ni restu surŝipe.² Ili pagis por biletoj al Rotterdam per vagonaro,³ kaj ni ne povis halti por kontakti la esperantis-tojn en Antverpeno. Estis bedaŭrinda afero, sed eble baldaŭ en la estonteco⁴ ni povos rehalti tie.

Pluvis dum la vagonara veturo al Rotterdam, kaj kiam ni atingis la urbon ankoraŭ estis pluvante. Ni trovis hotelĉambron apud la centra parto de la urbo. La horo estis la tria, posttagmeze, kaj Bonnie estis tro laca por vagi tra la urbo, do ŝi enlitiĝis⁵ kaj mi iris al la centra parto de la urbo.

Oni povas trovi la oficejon de la Universala Esperanto-Asocio tre facile, ĉar ĝi estas sur la konata⁶ strato Eendrachtsweg.* Estas bela kanalo en la centro de Eendrachtsweg, kaj ĉe ĉiu flanko estas larĝa herbejo⁷ kaj multaj belaj arboj. La vojoj iras laŭlonge⁸ de ĉi tiuj herbejoj kaj kanalo, kaj

* The office of UEA has since moved to a newer building nearby at Nieuwe Binnenweg 176.

la oficejo estas lokita kie oni povas vidi la belajn parketon kaj kanalon de la oficejo.

Kiam mi iris apud la pordon de la oficejo mi vidis du montrofenestrojn⁹ ĉe la maldekstra flanko kaj mi haltis por vidi iliajn enhavojn.¹⁰ Estis ekzpozicio de esperantaĵoj!¹¹ Jen estis bonega afero, ĉar miloj da personoj piedpasas¹² ĉi tiujn fenestrojn ĉiutage kaj multaj el ili devas vidi la propagandaĵojn¹³ pri Esperanto: libroj kaj libretoj, turistprospektoj,¹⁴ broŝuroj, ktp. Ankaŭ, sur la muro de la konstruaĵo estis la vortoj “Universala Esperanto-Asocio,” kaj super la pordo estis granda verda stelo.

Interne¹⁵ mi trovis koridoron kun du pordoj ĉe ĝia maldekstra flanko. Kiam mi malfermis la unuan pordon mi vidis du virinojn kiuj laboris ĉe skribmaŝinoj.¹⁶ Ambaŭ portis verdajn stelojn, do mi diris, “Bonan tagon.” Ili rigardis al mi kaj unu el ili respondis, “Saluton, Sinjoro. Ĉu ni povas helpi vin?” Tiam mi prezentis min, kaj post taso da teo kaj kelkaj afablaj vortoj alia virino eniris. Ŝi estis fraŭlino Vermaas, kaj ŝi invitis min en sian oficejon por interparolo.¹⁷ Ni marŝis el la unua oficejo, tra ĉambro inter la du oficejoj, kie estis bretaroj¹⁸ kun multaj libroj, aĵoj por poŝto kaj oficejlaboro¹⁹ ktp. Ĉi tio montris al mi, ke memevidente²⁰ oni laboregas ĉe ĉi tiu oficejo por disvastigi²¹ librojn, gazetojn, reklamojn kaj informojn²² al la diversaj partoj de la mondo.

Kiam mi foriris el la oficejo de UEA mi havis bonan senton, ĉar mi jam trovis geamikojn per la verda stelo, kvankam mi estis en fremda lando, kie oni parolas alian lingvon. Ili invitis min kaj mian edzinon al la oficejo por pli da interparolo dum la venontaj tagoj, kaj ankaŭ diris al mi ke, se ni bezonos helpon pri ia afero, ili ŝatus helpi nin.

¹vapor/ŝip/kompani/o, steamship company ²sur/ŝip/e, on board

³vagon/ar/o, train ⁴est/ont/ec/o, future ⁵en/lit/iĝ/is, went to bed

⁶kon/at/a, (well) known ⁷herb/ej/o, grassy place ⁸laŭ/long/e de, along (the length of) ⁹montr/o/fenestr/o, show window ¹⁰en/hav/o, content

¹¹esper/ant/aĵ/o/j, Esperanto things, Esperantiana ¹²pied/pas/as, pass by on foot ¹³propagand/aĵ/o, publicity material ¹⁴turist/prospekt/o, travel folder ¹⁵intern/e, inside ¹⁶skrib/maŝin/o, typewriter

¹⁷inter/parol/o, conversation ¹⁸bret/ar/o, set of shelves

¹⁹ofic/ej/labor/o, office work ²⁰mem/evident/e, obviously

²¹dis/vast/ig/i, spread abroad, promulgate ²²inform/o/j, information.

8. Trans la Lingvaj Barilojn—III

Rotterdam, Nederlando, 20 oktobro

Por sabato vespere ni estis invititaj al granda afero en Rotterdam kiam la Esperanto-grupo “Merkurio” festis sian oran jubileon. Unue estis akcepto¹ de la grupo, je la dua posttagmeze, en Salono Beatrix apud la centra stacidomo,² kie ĉeestis³ pli ol cent personoj: ĵurnalistoj, viroj kun gravaj pozicioj en la urbo, amikoj de Esperantistoj, ktp. Ni renkontis kelkajn geesperantistojn kaj babiladis kun ili, kaj dum la tuta vespero ni ne havis okazon por uzi unu vorton de la angla lingvo. La akcepto finiĝis⁴ je la kvina kaj kelkaj neesperantistoj foriris, kaj la aliaj personoj eniris alian ĉambron por la bankedo.

Ĉe la bankedo ni renkontis multajn esperantistojn—estis proksimume sesdek da ili tie. S-ro J. D. Brakel, prezidanto de Merkurio, lia edzino, kaj ges-roj Isbrucker sidiĝis ĉe la ĉeftablo⁵ en la bankedĉambro. Ni havis bonan interparolon kaj post bongustaj⁶ manĝaĵoj S-ro Brakel faris paroladon, kaj ankaŭ⁷ F-ino⁸ Vermaas kaj S-ro Driesen.

Mi lernis pri kelkaj aferoj rilate al Esperanto kaj la organizaĵoj⁹ esperantaj en Nederlando. Unue, estas pli ol tricent geesperantistoj en la urbo Rotterdam,¹⁰ sed oni havas kvar grupojn en tiu urbo. Estas la grupo “Merkurio,” la klubo “La Espero,” kaj ankaŭ grupo de kristanaj esperan-



tistoj kaj grupo de laboristoj. Kvankam ili havas siajn proprajn kunvenojn, ili tamen estas bonaj amikoj kaj laboras en harmonio por la movado.¹¹

Mi ankaŭ lernis ke multaj Esperantistoj ĉi tie, kaj ankaŭ tra la mondo, ne estas membroj de la Universala Esperanto-Asocio. Mi opinias,¹² ke la tuta esperantistaro¹³ devas aparteni al unu internacia, neŭtrala grupo, por kreskigi¹⁴ la Esperantan movadon, aŭ la movado ne havos sufiĉan forton por kreski. La lokaj grupoj ankaŭ estas gravaj por la movado, sed unue ni devas havi fortan internacian asocion. (Daŭrigota)¹⁵

¹**akcept/o**, here: reception ²**staci/dom/o**, (railway) station house
³**ĉe/est/i**, to be present ⁴**fin/iĝ/is**, came to an end ⁵**ĉef/tabl/o**, head table
⁶**bon/gust/a**, tasty ⁷**kaj ankaŭ...**, and so did... ⁸**F-ino = Fraŭlino**
⁹**organiz/aĵ/o**, organization ¹⁰**la urbo Rotterdam**, the city of Rotterdam (see below) ¹¹**mov/ad/o**, movement ¹²**opini/as**, believe (see below)
¹³**esperant/ist/ar/o**, all Esperantists, the “Esperanto world” ¹⁴**kresk/ig/i**, to make grow ¹⁵**daŭr/ig/ot/a**, to be continued

LA URBO ROTTERDAM

When a proper name is used with its category also expressed, the word **de** is generally not used, and the proper name usually comes second: **la urbo Ĉikago**, the City of Chicago; **la rivero Misisipi**, the Mississippi River; **monto Everest**, Mount Everest; **la monato novembro**, the month of November.

OPINIAS—PENSAS

Mi opinias means “I think” when one is offering a firm opinion. **Mi pensas** means “I am thinking,” “It is running through my mind.” Compare: **Mi opinias, ke ĉiuj esperantistoj devas aparteni al unu grupo**, I think all Esperantists need to belong to one group; **Mi pensas, ke mi iros al Parizo en aprilo**, I think I will go to Paris in April.

9. Barbro kaj Eriko—III

Hohenberg, la 25-an de oktobro

Kara amikino,

Koregan dankon pro via letero, kiu multan ĝojon faris al mi. Mi vidas vin en mia imago, mi vidas vian dometon ruĝbrunan, mi preskaŭ havas la senton, ke mi iam estis ĉe¹ vi.

Leginte, ke vi jam perdis vian fraton kaj vian karan patrinon, mi tre malĝojiĝis. Bedaŭrinda knabino!² Sed mi sentas, ke vi majstrante la sorton estas bona filino al via patro kaj trovas en la laboro, en la zorgo por li multan kontenton. Ĉu ne, amikino?

Ankaŭ miaj gepatroj havis malgrandan bienon, patro krome³ ĉiam laboris en la fabriko. Nun ili estas maljunaj kaj donis sian posedon al bofrato⁴ Johano, ĉe kiu ili kaj mi loĝas; miaj aliaj gefratoj vivas en lokoj diversaj.

Ankaŭ nia bieno situas flanke de la domaro.⁵ Ĉirkaŭe estas montoj, herbejoj, arbaroj. Mia patro estas pasia ĉasisto.⁶ Li ankoraŭ estas tre sana, tre vigla, la patrino bedaŭrinde malsanetas de post kelkaj jaroj.

Vi certe volas scii pli multe pri nia urbeto.

Hohenberg troviĝas en 470-metra absoluta alteco,⁷ kelkaj pintoj ĉirkaŭe atingas 1300 kaj 1400 metrojn. Tie sude,⁸ la unua montego salutas el la malproksimo. La dorso jam estas nuda, baldaŭ neĝo ĝin kovros.

Iru kun mi sur tiun monton, kiu portas la ruinojn de mezepoka⁹ kastelo! Rigardu la valon belegan. Sub niaj piedoj situas bela lageto kaj nia urbeto, norde, sude, kaj en la flankvaloj¹⁰ diversaj aliaj partoj de la komunumo.¹¹

Nun estas aŭtuno—la aŭtuno estas la plej bela sezono en nia montaro. Preskaŭ ĉiutage ni havas la same bluan ĉielon, ankoraŭ brilas sufiĉe¹² varme la suno.

Jam tre frue malaperas¹³ la suno sub la montarhorizonto.¹⁴

Mi estas sola en mia ĉambreto, mi skribas kaj revas.

Respondu baldaŭ, skribu tre multe!

Tutkore¹⁵ salutas

Eriko

El Heroldo de Esperanto

Saĝa vorto. Orson Wells foje¹⁶ diris: “Komplimentado¹⁷ estas la arto diri al aliaj tion, kion ili mem pri si pensas.”

La geedzoj. Post la fianĉigo:¹⁸ li parolas, ŝi aŭskultas; dum la miela monato:¹⁹ ŝi parolas, li aŭskultas; dek jarojn poste: ambaŭ parolas, la najbaroj aŭskultas.

¹**ĉe vi**, at your house ²**bedaŭrinda knabino!** poor girl! ³**krom/e**, besides that ⁴**bo/frat/o**, brother-in-law (see BO- below) ⁵**dom/ar/o**, cluster of houses, settlement ⁶**ĉas/ist/o**, hunter ⁷**absolut/a alt/ec/o**, height above sea level ⁸**sud/e**, in the south ⁹**mez/epok/o**, middle ages ¹⁰**flank/val/o**, side valley ¹¹**komun/um/o**, community (see -UM below) ¹²**sufiĉ/e**, here: rather (see below) ¹³**mal/aper/as**, disappears ¹⁴**mont/ar/horizont/o**, mountain range skyline ¹⁵**tut/kor/e**, wholeheartedly, most cordially ¹⁶**foj/e**, on one occasion, once ¹⁷**kompliment/ad/o**, giving compliments ¹⁸**fianĉ/iĝ/o**, becoming engaged, engagement ¹⁹**miel/a monat/o**, honeymoon

BO-

The prefix **bo** denotes relationship by marriage: **bofrato**, brother-in-law; **bopatrino**, mother-in-law; **bofilo**, son-in-law.

SUFIĈE

Sometimes **sufiĉe** (“enough”) is used in the sense of fairly, rather, pretty: **Li kantas sufiĉe bone**, He sings fairly well. **Ankoraŭ brilas sufiĉe varme la suno**, The sun is still shining pretty warmly.

-UM

The suffix **um** is called the “indefinite suffix” and is used to change the meaning or function of a word when none of the other suffixes quite fit. Words with **um** are easier to demonstrate than to explain. Some common ones are: **aero**, air, **aerumi**, to air out, aerate; **akvo**, water, **akvumi**, to water (a lawn, etc.); **folio**, a leaf, **foliumi**, to leaf through (a book); **okulo**, an eye, **okulumi**, to “eye” someone, ogle; **butiko**, a shop, **butikumi**, to go shopping; **plena**, full, **plenumi**, to fulfill; **malvarma**, cold, **malvarmumo**, a cold; **proksima**, near, **proksimume**, approximately; **komuna**, common, **komunumo**, a community; **cerbo**, brain, **cerbumi**, to rack one’s brain, think hard about something.

10. En Skotlando¹

(From *Esperanto en Skotlando*, a bulletin published by the Scottish Esperanto Federation)

En Skotlando, same kiel² en multaj aliaj landoj, la enloĝantoj³ uzas pli ol unu lingvon. En la norda kaj okcidenta regionoj la antikva gaela estas la hejmlingvo. En la suda parto la angla parolmaniero⁴ unue aŭdiĝis, kaj iom post iom⁵ disvastiĝis ĉien. Kio pri la skota lingvo? Eble iu kompetentulo⁶ verkos por ni artikolon pri tiu temo en nia bulteno.

La skota lingvo certe estas pli ol dialekto. La poezio de Robert Burns donas al ni klasikan stilon kaj vortaron.⁷ Multaj el la vortoj de Burns estas jam neuzataj⁸ kaj forgesitaj. Nun iu skota skolo⁹ klopodas redoni ilin al ni. Kompreneble, en diversaj partoj de la lando nesamaj¹⁰ terminoj estas uzataj por la sama objekto. Ekzemple,¹¹ antaŭ kelkaj jaroj¹² mi kamploĝis¹³ kun skoltina¹⁴ trupo ĉe farmbieno.¹⁵ La farmista familio ĵus translokiĝis¹⁶ de la graflando¹⁷ Ayr el Fife; la du filinetoj parolis riĉan dialekton plenan je¹⁸ vortoj kiujn mi neniam antaŭe¹⁹ aŭdis.

Ĉu ni perdas nian lingvan heredaĵon?²⁰ En multaj familioj la “Broad Scots” estas la hejmlingvo, sed en la lernejo, la oficejo, la mondumo,²¹ la angla lingvo estas la modo. Ĉu “fremda supo allogas, propra brogas?”—aŭ ĉu ni vere hontas pri la propra dialekto? Leganto, kion vi opinias?

Mi bone memoras unu tagon en la lernejo kiam mi estis ĉirkaŭ dekunu-jara; ni devis deklami parkere la poemon de Burns, “A man’s a man for a’ that,”—“*La homo vera*.”²² Nu, estis privata lernejo, kaj iuj el la knabinoj estis etaj snoboj. Do ili deklamis kiel eble plej²³ anglamaniere.²⁴ Sed venis la vico de mia dekjara fratino. Ŝi ekstaris²⁵ kaj laŭte deklamis la tutan poemon en sia plej riĉa dialekto. Kiel mi admiris ŝian kuraĝon!

—M.C. Fraser

¹**Skot/land/o**, Scotland ²**sam/e kiel**, the same as ³**en/loĝ/ant/o** = **loĝanto** ⁴**parol/manier/o**, manner of speaking ⁵**iom post iom**, little by little ⁶**kompetent/ul/o**, expert, connoisseur ⁷**vort/ar/o**, vocabulary ⁸**ne/uz/at/a**, unused ⁹**skota skolo**, a group of people devoted to the Scottish language ¹⁰**ne/sam/a**, different, unlike ¹¹**ekzempl/e**, for example ¹²**antaŭ kelkaj jaroj**, several years ago ¹³**kamp/loĝ/i**, to camp out ¹⁴**skolt/in/o**, girl scout ¹⁵**farm/bien/o**, farm ¹⁶**trans/lok/iĝ/i**, to move, change residence ¹⁷**graf/land/o**, county (territory formerly administered by a count) ¹⁸**plen/a je**, full of ¹⁹**neniam antaŭ/e**, never before ²⁰**hered/aĵ/o**, heritage ²¹**mond/um/o**, high society (the world of “important people”) ²²**La homo vera...**, first words of Esperanto translation of the poem ²³**kiel eble plej**, as...as possible ²⁴**kiel eble plej anglamaniere**, in as English a manner as possible ²⁵**ek/star/i**, to stand up



fama skota
poeto Robert
Burns

11. Barbro kaj Eriko—IV

Rud 7.11.19..¹

Mia tre kara, malproksima amiko,

Mi ĵus venis per biciklo el la kurso. Kelke da junaj gekursanoj akompanis min al mia barilpordo.² Estas tre gaje dum la lecionoj, ni multe ŝercas kaj ridas; ni sentas, kvazaŭ ni de longe konus unu la alian. Vere, mi dezirus, ke mi povu diri al ĉiuj, kiuj loĝas izole: “Lernu Esperanton, kaj ne plu³ vi estos izolitaj!”

Nu, dum mi ankoraŭ, pro la leciono, havas en mia kompatinda⁴ cerbo la vortojn “varmaj,”⁵ mi volas skribi al vi. —Ĉi tie estas tiel kviete: patro legas gazeton, mia griza kateto sidas sur benko apud la forno. Gaja fajreto brulas, ĉar ekstere blovas akra vento el nordo; jam venas la frosto.

Ho, mi ankoraŭ ne dankis pro via letero kun la interesa rakonto pri hejmmregiono via; jes, mi eĉ malfermis la karan (!?) lernolibron⁶ geografian ĉe la loko, kie estas presite: Österrike (Aŭstrujo). Paĉjo tre miris pro tiu malofta atako de lernemo.

Vi rakontis pri via familio, kaj mi tre ĝojas, ĉar ankoraŭ vivas viaj gepatroj. —Kaj nun vi volas iom pli ekscii⁷ pri via sveda amikino. Nu, mi ne estas tiel alta kiel la plimulto⁸ de svedaj knabinoj, sed mi estas blonda kaj havas bluajn okulojn, kaj en miaj vejnoj certe fluas la sango de la Vikingo—maltrankvila kaj vojaĝema⁹ mi estas. Sed mi amas mian maljunan patron kaj restas ĉe li. De du jaroj¹⁰ li havas en la tuta mondo nur min, mi jam diris, ke mia frato, kiu estis iomete pli aĝa¹¹ ol mi, mortis. Tial mi devis forlasi la mezan lernejon, kiun mi vizitis en Karlstad, kaj reiri hejmen por tie labori. Mi devis rezigni miajn dezirojn kaj celojn, sed nun mi tamen estas kontenta. —Nur tro longa estas la vintro.

Ĉu vi volos¹² baldaŭ skribi?

En fidela amikeco mi restas via

Barbro



Vintro en Svedlando

¹Nov. 7, 19.. The order is: day, month, year ²**bar/il/pord/o**, gate ³**ne plu**, no longer ⁴**kompat/ind/a**, pitiful, poor ⁵while I still have the words warm (i.e., fresh) in my poor brain ⁶**lern/o/libr/o**, textbook ⁷**ek/sci/i**, get to know, find out ⁸**pli/mult/o**, majority ⁹**vojaĝ/em/a**, inclined to travel a lot (see -EM below) ¹⁰**de du jaroj**, for two years ¹¹**pli aĝ/a**, older ¹²**Ĉu vi vol/os...**, Won't you...

-EM

This suffix indicates a tendency or inclination: **labori**, to work, **laborema**, industrious; **aventuro**, adventure, **aventurema**, adventurous; **dormi**, to sleep, **dormema**, sleepy; **vojaĝi**, to travel, **vojaĝema**, inclined to travel a lot; **helpi**, to help, **helpema**, helpful; **drinki**, to drink (to excess), **drinkema**, given to drinking a lot.

12. La Songô

(From *Boletín*, published by Spanish Esperanto Federation, Zaragoza)

En malgranda nederlanda vilaĝo—Osterlittens—vivis iam ŝufaristo.¹ La enloĝantoj de tiu vilaĝo sendube² ne multe uzis siajn ŝuojn, ĉar nia ŝuisto devis pene³ labori kaj tamen restis malriĉa.

Iun nokton⁴ li havis strangan sonĝon. Voĉo diris al li: —Iru al Amsterdamo kaj tie sur la Papen-ponto vi trovos trezoron.⁵

La sekvintan⁶ matenon nia ŝulaboristo rakontis al sia edzino pri la sonĝo. La edzino—saĝa virino—nur respondis: —Sonĝoj mensogas. Ne kredu pri⁷ ili.

Sur la Papen-ponto



Tamen la sekvintan nokton ree la sama sonĝo revenis; kaj eĉ trian fojon ĝi turmentis la edzon tiel, ke post forpaso de la nokto li diris al sia edzino:

—Mi iros al Amsterdamo, ĉar nun mi volas vidi ĉu mia sonĝo efektiviĝos!¹⁸

Malgraŭ la plendoj de sia edzino pri la multekosta vojaĝo, li forveturis al la ĉefurbo.⁹ Tie li trovis post unuhora promenado kaj pridemandado¹⁰ la ponton, kie li trovos sian feliĉon. “Eble mi nun estos riĉa” meditis la ŝufaristo. Sur la ponto tamen nenio eksterordinara¹¹ estis videbla. Nur maljuna almozulo¹² sidis tie, ludante akretonan¹³ violonon. Du tagojn la ŝuisto pasigis¹⁴ en la najbareco¹⁵ de la ponto. La trian tagon li decidis reveturi hejmen se nenio okazos. Sed ankaŭ la tria tago forpasis. Je la vespero la almozulo alparolis¹⁶ lin:

—Diru al mi, mia kara,¹⁷ kion vi serĉas tie ĉi? Vi migras sur tiu ĉi ponto jam dum tri tagoj. Ĉu vi atendas iun?

Nia malfeliĉulo rakontis pri sia sonĝo.

—Nu—komentis la maljunulo.— Ne kredu pri sonĝoj. Ankaŭ mi havis sonĝon. Mi sonĝis ke mi iru¹⁸ al Osterlittens. Tie malantaŭ la domo de ŝufaristo mi fosu sub fosto kaj mi trovos poton da oro! Sed ne kredu ke mi iru tien! Mi eĉ ne scias kie tiu vilaĝo kuŝas! Estu saĝa kaj iru hejmen!

—Ho jes, mi tuj iros hejmen—gaje respondis la ŝuisto kaj jam li estis for.

Hejmen veturinte li apenaŭ salutis la edzinon, prenis fosilon¹⁹ el la laborejo kaj fervore ekfosis sub la fosteto malantaŭ la domo. Kaj vere, post duonhora fosado, kupra kuirpoto²⁰ kaptis la taglumon.²¹ Ĝoje la

¹su/far/ist/o, shoemaker ²sen/dub/e, undoubtedly ³pen/e labor/i, work hard ⁴iu/n nokt/o/n, one night ⁵The dash indicates a quotation (see below) ⁶sekv/int/a, following ⁷kred/i pri, believe in ⁸efektiv/iĝ/i, come true ⁹ĉef/urb/o, capital city ¹⁰pri/demand/i, make inquiries ¹¹ekster/ordinar/a, out of the ordinary ¹²almoz/ul/o, beggar ¹³akr/e/ton/a, sharp-toned, piercing ¹⁴pas/ig/i, to pass, spend ¹⁵najbar/ec/o, neighborhood ¹⁶al/parol/is, addressed, spoke to ¹⁷mia kara, my good fellow ¹⁸ke mi ir/u, that I should go ¹⁹fos/il/o, shovel ²⁰kuir/pot/o, cooking pot ²¹tag/lum/o, daylight

ŝuisto konstatis ke la enhavo konsistas el oraj moneroj. Kompreneble lia nekredema edzino partoprenis²² lian feliĉon. La monon ili transportis²³ al la plej proksima urbo kie juvelisto rekompence²⁴ donis al ili multe da banknotoj.²⁵ Nun feliĉaj tagoj alvenis por nia ŝuisto kaj lia familio. La poton li purigis kaj pendigis super la fajrujon.²⁶

Iun tagon la pastro venis viziti lin kaj vidis la malnovan kaldronon. La pastro ŝatis tiajn antikvaĵojn²⁷ kaj demandis:

—De kie venas tiu poto?

—Mi aĉetis ĝin en vendejo—ruze respondis la ŝuisto, ĉar li ne volis malkaŝi la sekreton de sia neatendita²⁸ prospero.

La pastro, rigardante la poton de pli proksime, vidis fremdlingvan surskribon²⁹ parte forviŝitan³⁰ pro la tempo.

—Ah—li diris—mi legas latinan surskribon sur tiu ĉi poto. Tre strange! Jen mi legas: “Sub tiu ĉi poto kuŝas alia.” Mi ne komprenas tion. Ĉu vi?

—Ne, ankaŭ mi ne komprenas—gaje respondis la ŝuisto.

Post la foriro de la pastro, dua persono forlasis la domon. Estis la ŝuisto kiu rapide iris al la laborejo, prenis fosilon kaj denove faris truon sub la fosto—kaj vidu—jen dua poto! Ankaŭ tiu estis plena je oro. Nun la ŝuisto kaj lia edzino estis riĉaj.

Anstataŭ la ligna fosto la ŝuisto metis ŝtonon sur la lokon, kie li trovis oron...kaj feliĉon. Mi ne scias ĉu tiu ŝtona fosto ankoraŭ staras en Osterlittens, sed la historio montras al ni ke:

Songoj povas realiĝi.³¹ Kaj ankaŭ estas fakto ke ni ofte serĉas la feliĉon malproksime, dum ĝi kuŝas apud nia domo. Ni nur eklaboru por trovi ĝin!

J. C. van Twuiver (laŭ popolrakonto³²)

²²part/o/pren/is, took part, shared ²³trans/port/is, conveyed, took over

²⁴rekompenc/e don/is, gave for it ²⁵bank/not/o/j, paper money

²⁶fajr/uj/o, fireplace ²⁷antikv/aj/o, antique ²⁸ne/atend/it/a, unexpected

²⁹sur/skrib/o, inscription ³⁰for/viŝ/it/a, wiped away, obliterated

³¹real/iĝ/i, to come true ³²popol/rakont/o, folk tale

QUOTATION MARKS

The manner of indicating quotations varies throughout the world. Various systems are used in Esperanto, as follows:

“Ho jes,” diris la pastro.

„Ho jes,” diris la pastro.

«Ho jes,» diris la pastro.

—Ho jes,—diris la pastro.

—Ho jes, diris la pastro.

TRANSITIVE AND INTRANSITIVE VERBS: -IG

A transitive verb is one capable of acting upon some person or thing, i.e., one which can have a direct object. **Legi** (legi libron), **trovi** (trovi oron), **vidi** (vidi la sunon), **posedi** (posedi bienon), **sendi** (sendi leteron) are transitive verbs; while **esti**, **marŝi**, **kuŝi**, **povi**, etc., are intransitive verbs.

A normally intransitive verb may be made transitive by means of the suffix **ig**: **La tago pasis** (intr.) **malrapide**, The days passed slowly; **Li pasigis** (tr.) **du tagojn sur la ponto**, He passed two days on the bridge. (Lit.: He made two days to pass...) **La poto pendas** (intr.) **super la fajrujo**, The pot is hanging over the fireplace; **Li pendigis la poton super la fajrujon**, He hung the pot (lit., made the pot to hang) over the fireplace.

13. Barbro kaj Eriko—V

Hohenberg, la 18-an de novembro

Amikino, tre kara!

La vintro sendis siajn heroldojn: venton, nebulon—malgajan veteron. Malaperis la helaj suntagoj,¹ malaperis la kantbirdoj,² senfoliaj³ estas la arboj—griza, grizega domaro, kamparo, montaro, seriozega la tuta naturo.

Sed tamen nun en mia koro brilas la suno—ĉar via letero alvenis, alportis feliĉon kaj ĝojon.

Vi do estis en Hohenberg—jes mi vin vidis! Promenante hodiaŭ en la aŭtuna arbaro, mi subite rimarkis ĉarman knabinon, ne grandan, bluokulan, iomete petolema ŝi ŝajnis. Ho, tro baldaŭ neniiĝis⁴ la bela revbildo.⁵

Mi volas rakonti al vi, kara amikino, hodiaŭ pri aŭstraj festotagoj⁶ en la monato novembro. La unuan de novembro katolikoj festas la “Tagon de Ĉiuj Sanktuloj.” Multaj personoj, kiuj ŝatas ankoraŭ la kutimojn malnovajn, donas strange plektitajn farunaĵojn,⁸ “sanktulfarunaĵojn,” al la infanoj. La duan, la Tagon de la Mortintoj,⁹ ĉiu, kiu havas parencojn en la tombejo,¹⁰ tien iras kaj restas kelktempe,¹¹ absorbita en memoro, malĝoja. Floroj ornamas la tombojn, lumoj brilas en malgrandaj lanternoj.

La dekduan ni festis la naskiĝtagon¹² de la respubliko. La domoj estis dekoritaj per flagetoj kaj floroj, oratoroj parolis pri la signifo de la tago, laboristoj faris belan teatraĵon.

Vi certe scias, ke en la dekdua de novembro de 1918, post la unua mondmilito, la aŭstra respubliko estis fondita.

Malgajajn tempojn ni jam devis travivi.¹³

Kiel feliĉaj estas vi, svedoj, ke vi ne konas la terurojn de la milito—mi amas la pacan svedan popolon kaj mi esperas, ke eterna paco venos ankaŭ por ĉiuj popoloj.

Kaj Esperanto certe al eterna paco preparas la vojon.

Koran manpremon¹⁴ de via

Eriko

¹**sun/tag/o**, sunny day ²**kant/bird/o**, song bird ³**sen/fo/i/a**, leafless
⁴**neni/iĝ/is**, became nothing, “went poof” ⁵**rev/bild/o**, dream (lit., dream
picture) ⁶**fest/o/tag/o**, holiday ⁷**Tago de Ĉiuj Sanktuloj**, All Saints
Day ⁸**farun/aĵ/o**, pastry (here, a kind of fried cake) ⁹**Tago de la**
Mort/int/o/j, All Souls Day ¹⁰**tomb/ej/o**, cemetery ¹¹**kelk/temp/e**, a
little time ¹²**nask/iĝ/tag/o** = **naskotago** ¹³**tra/viv/i**, to live through
¹⁴**man/prem/o**, handshake

PREPOSITIONS AS PREFIXES

Many compound words use prepositions as prefixes: **en/ir/i**, to enter, go in; **el/ir/i**, to exit, go out; **tra/viv/i**, to live through, survive; **sen/fort/a**, feeble, without strength; **for/pren/i**, to take away; **for/pas/i**, to pass away; **for/vetur/i**, to drive away, etc.

Prepositional prefixes are liberally used with verbs expressing motion—**iri**, **veni**, **veturi**, **marŝi**, **porti**, etc.—even to a point that may seem redundant at times: **Li eniris en la domon** = **Li iris en la domon** = **Li eniris la domon**. **Ŝi elvenis el la vendejo** = **Ŝi venis el la vendejo**. **Eriko suriris la monton** = **Eriko iris sur la monton**. **Oni forprenis la flagon for de la teatro** = **Oni prenis la flagon for de la teatro** = **Oni forprenis la flagon de la teatro**.

ANTAŬ OL—POST KIAM

When **antaŭ** is followed by a verb, **ol** is usually inserted: **antaŭ la milito**, before the war; but **antaŭ ol la milito finiĝis**, before the war ended. **Antaŭ la somero**, before summer; but **antaŭ ol la somero venos**, before summer comes.

Similarly when **post** is followed by a verb, **kiam** is usually inserted: **post la milito**, after the war; but **post kiam oni deklaris militon**, after they declared war.

14. Bali, La Insula Paradizo

(From *Ĉirkaŭ la Mondon kun la Verda Stelo*, by Joseph R. Scherer.)

Bali! Vorto magia inter la malmultaj mondvojaĝantoj, al kiuj ĝis nun estis eble viziti la feliĉan insuleton oriente de Javo.

Bali! Nomo menciata kun mistera respekto; prononcata kvazaŭ ĝi signifus “Eterna Feliĉejo.”

Kiam en Surabajo¹ mi aĉetis mian ŝipbileton al Bali, mi sentis kvazaŭ mi akiris ŝlosilon al la paradizo. Ĉar tiom mi estis leginta pri la feliĉa popolo, pri la feinaj virinoj, pri la senkomparaj² pejzaĝoj, ke certe nur surtera³ paradizo povas instigi je⁴ tiom da entuziasmaj kaj laŭdaj vortoj.

Mi timetis, ke eble mi estos seniluziigata.⁵ Kaj tiel timis aliaj vojaĝantoj. Sed du glob-trotuloj,⁶ kiuj jam estis tie, nur diris litaniojn de glorkantoj.⁷ Kiu do ankoraŭ kuraĝus⁸ dubi, ke ni staras antaŭ “Pordego⁹ de la Paradizo”?

Sep altaj vulkanoj leviĝas¹⁰ sur la insulo. La plej alta, sur kies 3 000¹¹ metroj loĝas la dioj de la mondo, ĵus kaptis la unuajn sunradiojn.¹² Ĝi estis la reĝo de la montoj: estis la glora “Pinto de Bali”.¹³ Tuj poste lumiĝis ankaŭ la aliaj pintoj. Ili aperis kiel arĝentaj piramidoj naĝantaj sur orumitaj¹⁴ nuboj.

Ni devis alteriĝi¹⁵ en remboatoj,¹⁶ kaj en la momento, kiam mi metis mian dekstran piedon sur la teron de Bali, mi forgesis mian banalan skribmaŝinon kaj la kofrojn, kiujn mi postlasis¹⁷ en Surabajo; mi forgesis ĉiujn zorgojn; mi lasis malantaŭ mi la tutan mondon. Komenciĝis¹⁸ dektaga libertempo, komenciĝis revo senfine bela, en revolando¹⁹ ne fantazia, sed vera.

Kompreneble multaj el la 30 000 insuloj, kiuj ornamas la Pacifikan Oceanon, estas belegaj. Ĉiuj havas palmajn marbordojn,²⁰ ĉarmajn montetojn; multaj havas spegulantajn rizokampojn,²¹ glorajn pintojn, miraklajn sunleviĝojn,²² sed mi estas certa—kaj ĉiuj, kiuj iam vizitis la insulon, samopinias,²³ ke Bali estas la reĝino de la insulaj perloj, ne nur pro la natura beleco, sed ankaŭ pro la plej feliĉa popolo en la mondo.

Nia vivo inter la enlandanoj²⁴ estis unu konstanta feliĉa ĉarmo. La popolo vivas laŭ la malnova ordo de la bibliaj tagoj. Ŝajnas, ke la tempo flugis malantaŭen je 3 000 jaroj, kaj ni vidas la vivon, kia ĝi estis²⁵ en patriarkaj tagoj, kvankam materie plibonigita.²⁶ La filoj prenas la edzinojn

en sian patriarkan familiogrupon, kaj la filinoj edziniĝante foriras. La patro restas estro de la familiogrupo ĝis la morto. La tero estas posedata ne de unuopaj²⁷ personoj, sed de tiaj familiogrupoj. Tiuj, kiuj ne havas multan teron, helpas la aliajn, kontraŭ²⁸ porcio de la rikoltaĵo. En Bali oni laboras nur unu monaton el ĉiuj kvar, aŭ tri monatojn el la jaro. Oni rikoltas dum du semajnoj kaj plantas dum du semajnoj, kaj sekvas tri monatoj, kiam la dioj de Bali zorgas pri la resto. Tiam la feliĉaj insulanoj libertempas. Ili festas, faras procesiojn al temploj, aranĝas kokbatalojn,²⁹ dancas, kaj manĝas dolĉaĵojn sub la banjan-arbegoj.

La vivo moviĝas³⁰ laŭ bova rapideco³¹ sur la sunaj, ĉielgloraj³² deklivoj, kiuj falas de la piramidaj pintoj al la bordoj de la bluega oceano. Mi trovis la indiĝenojn tre afablaj, graciaj, iom timemaj,³³ iom fieraj. Same fidelaj, kiel ili restis al sia religio, ili restas al la vivkutimoj.³⁴ Ili manĝas rizon, trifoje³⁵ ĉiutage, kaj multegajn fruktojn, kiel kokosojn, ananasojn, papajojn, bananojn, mangostanojn kaj rambutanojn. Mi ne vidis eĉ unu ladan skatolon kun eŭropaj konservaĵoj.³⁶

Ĉiutage mi pasigis kelkan tempon en la vilaĝoj. Kiam, en la malproksima montaro, mi eniris en patriarkan kabangrupon,³⁷ ĉirkaŭitan³⁸ de

¹Surabajo, Surabaya ²sen/kompar/a, incomparable ³sur/ter/a paradizo, paradise on earth ⁴instigi je, bring about, urge (people) on to ⁵sen/iluzi/ig/at/a, disillusioned ⁶glob/trot/ul/o, globe-trotter ⁷glor/kant/o, paean (song of glory) ⁸kuraĝ/us, would dare to ⁹pord/eg/o, gate(way) ¹⁰lev/iĝ/as, rise up ¹¹3 000 = 3,000 ¹²sun/radi/o, ray of the sun ¹³Pinto de Bali, Bali Peak ¹⁴or/um/i, to gild ¹⁵al/ter/iĝ/i, to land ¹⁶rem/boat/o, rowboat ¹⁷post/las/is, left behind ¹⁸komenc/iĝ/is, (there) began ¹⁹rev/o/land/o, dreamland ²⁰mar/bord/o, seashore, beach ²¹riz/o/kamp/o, rice field ²²sun/lev/iĝ/o, sunrise ²³sam/opini/as, agree ²⁴en/land/an/o, inhabitant ²⁵kia ĝi estis, such as it was ²⁶pli/bon/ig/i, to improve ²⁷unu/op/a, single, individual (see -OP below) ²⁸kontraŭ, here: in return for ²⁹kok/batal/o, cock fight ³⁰mov/iĝ/i, to move (intr.) ³¹laŭ bova rapid/ec/o, ploddingly (lit., “at ox speed”) ³²ĉiel/glor/a, heavenly-glorious ³³tim/em/a, timid ³⁴viv/kutim/o/j, customs, mores ³⁵tri/foj/e, three times ³⁶konserv/aĵ/o, canned food, preserves ³⁷kaban/grup/o, group of cabins, settlement ³⁸ĉirkaŭ/i, to surround

teraj muroj, la enloĝantoj kelkfoje malaperis kvazaŭ leporoj. Sed mi sidiĝis sur ŝtupeton aŭ ŝtonon kaj ekdesegnis dometon kun palmo, kaj iom post iom la plej junaj infanoj scivoleme³⁹ proksimiĝis. Mi nenion diris kaj daŭrigis la desegnadon. Iom post iom sekvis la pli aĝaj infanoj kaj, fine, la plej aĝaj—la gepatroj—kaj faris grandan rondon ĉirkaŭ mi.

Mi daŭrigis mian laboron, ĝis kiam iu knabo aŭ virino diris “bagus, bagus,” kio signifas “tre bela.” Tuj mi donacis mian “artlaboron” al la laŭdinto kaj, montrante al li aŭ ŝi, diris “bagus, bagus” kio signifis: “Ankaŭ vi estas bela.” Granda ridado kaj tuja interamikiĝo. Tuj oni alportis al mi manĝaĵojn, kaj amikeco estis memkomprenebla.⁴⁰ Ofte mi manĝis, ne estante malsata, nur por malaperigi ĉiun timemon.

La knabino, kiam ŝi edziniĝas, ne havas grandajn respondecojn.⁴¹ Ŝi ne devas alporti la pantoflojn al la edzo, ĉar li tiajn ne havas; ŝi ne devas lavi la telerojn, ĉar ne ekzistas tiaj en la domoj de Bali; se ŝi havas infanetojn, ne estas vindotukoj⁴² por esti lavataj. En Bali la gejunuloj sin elektas sen helpo de la gepatroj, tute kontraŭe⁴³ al la kutimo en la cetera Azio.

La virinoj cetere ricevas la ĉefan admiron de la fremduloj. Ili nombras 700 000, dum la viroj nombras nur 300 000 en Bali. Ili estas videblaj ĉie, irantaj al aŭ venantaj de proksima templo aŭ vilaĝa vendejo. La inoj havas naŭ ŝancojn el dek, esti naskitaj belegaj. Iu klarigis,⁴⁴ ke Bali estas paradizo por la virinoj. Mi preferus diri, ke Bali estas paradizo por la viroj—ĉar la virinoj faras la plej multan laboron.

La virinoj estas nudaj de la ŝultroj ĝis la talio; sed ili modeste kovras siajn krurojn ĝis la piedoj per longaj sarongjupoj.⁴⁵ Kiam ili iras al danco, ili kovras ankaŭ la mamojn per belkoloraj tukoj. Do la balianinoj⁴⁶ estas plimulte vestitaj por danco ol por la strato—ĝuste kontraŭe al la kutimo en Ameriko kaj Eŭropo. La viroj portas ĝenerale maldikan⁴⁷ jakon sed, kiel la virinoj, ne uzas ŝuojn.

Ĉiuj banas sin ofte dum la tago, en la riveretoj kaj kanaloj. La viroj ĉe unu flanko, kaj la inoj ĉe la alia flanko. Ĉio estas en ordo tiom longe, kiom⁴⁸ neniu iras trans la mezon de la rivero, kiu tamen ofte mezuras nur kvar aŭ kvin metrojn.

En Bali oni ne trovas perlojn aŭ aliajn riĉaĵojn. Tio estas granda feliĉo. Ĉar se perloj estus trovitaj en Bali, la blankaj komercistoj⁴⁹ estus venintaj jam antaŭ multaj jaroj por interŝanĝi⁵⁰ la perlojn kontraŭ brando, kiel okazis en multaj aliaj tropikaj insuloj, pli multe “favoritaj” de la juvel-dioj. Tiel en Bali estis permesite daŭrigi sian paradizan sonĝon komencitan antaŭ multaj jarcentoj.⁵¹

Unu vesperon mi sekvis noktan procesion. Dekoj da maskitaj dioj kaj centoj da indiĝenoj. Torĉoj, kantoj, preĝoj, kostumoj, ensorĉiga⁵² muziko, incenso, sankta akvo; nenio mankis. Malrapide la procesio moviĝis⁵³ tra la vilaĝeto. Estis la festo de la plenluno.⁵⁴ La luno mistere brilis inter nuboj kaj tra la foliaro de la graciaj palmoj. La aero estis varmete dolĉa.

Sekvis baliaj dancoj sub la steloj. Knabinoj, kiuj laboras en la rizokampoj, dancis en oraj vestaĵoj! Ili dancis ne nur per la piedoj sed ankaŭ per la manoj kaj per ĉiuj fingroj, ŝultroj, kapo kaj eĉ per la okuloj. La efekto estis tre artisma,⁵⁵ kaj kun la torĉoj, la palmoj, la templomuroj kaj la lunlumo la tuto estis nepriskribeble⁵⁶ fantazia.

³⁹sci/vol/em/e, inquisitively ⁴⁰mem/kompren/eb/l/a, self-evident; "it goes without saying that..." ⁴¹respond/ec/o, responsibility
⁴²vind/o/tuko, diaper ⁴³kontraŭ/e, contrary ⁴⁴klar/ig/i, to explain
⁴⁵sarong-jupo, sarong ⁴⁶bali/an/in/o, woman of Bali ⁴⁷mal/dik/a, thin
⁴⁸tiom longe kion = tiel longe, kiel, as long as ⁴⁹komerc/ist/o, merchant
⁵⁰inter/ŝanĝ/i, to trade ⁵¹jar/cent/o, century ⁵²en/sorĉ/ig/a, enchanting
⁵³mov/iĝ/is, moved (see below) ⁵⁴plen/lun/o, full moon
⁵⁵art/ism/a, artistic ⁵⁶ne/pri/skrib/eb/l/e, indescribably (pri/skrib/i, to describe)



Eugene Huxley / Shutterstock, Inc.

Sekvis aliaj dancistinoj, kaj dancistoj, kiuj sidante en granda kvadrato prezentis dancon kun mirinda⁵⁷ harmonio kaj precizeco.⁵⁸ Ili ŝajne ne laciĝis,⁵⁹ kaj mi ne sentis dormemon. Kiam je noktomezo⁶⁰ mi fine forlasis la vilaĝon, la dolĉa muziko sonis ankoraŭ longe en miaj oreloj. Mi iris dormi kun la gamelan-muziko⁶¹ en la oreloj, kaj mi eksongis pri revaj bildoj kaj fantaziaj melodioj. Kaj ĝis la hodiaŭa tago mi ne ĉesis revi pri Bali, la insula paradizo.

⁵⁷**mir/ind/a**, wonderful ⁵⁸**preciz/ec/o**, precision ⁵⁹**lac/iĝ/i**, to get tired
⁶⁰**nokt/o/mez/o**, midnight ⁶¹**gamelan-muziko**, gamelan music
 (A gamelan is an Indonesian ensemble of mostly percussive instruments.)

TRANSITIVE AND INTRANSITIVE VERBS: -IĜ

Transitive verbs may be made intransitive by means of the suffix **iĝ**: **La insulano movis** (tr.) **la boaton per unu remilo**, The islander moved the boat with one oar; **La boato moviĝis** (intr.) **malrapide laŭ la rivero**, The boat moved slowly along the river (lit., The boat became moved....). **Ni dividis** (tr.) **la rizon en tri porciojn**, We divided the rice into three portions; **Ni dividiĝis en tri grupojn**, We divided (intr.) into three groups (lit., We became divided into....). **La boatisto levis** (tr.) **sian remilon**, The boatsman raised his oar; **Tri vulkanoj leviĝas** (intr.) **sur la insulo**, Three volcanoes arise on the island (lit., Three volcanoes become raised....).

-ISM

This suffix, much as in English, denotes a doctrine or movement, a way of looking at or doing things: **katoliko**, a Catholic, **katolikismo**, Catholicism; **kristano**, a Christian, **kristanismo**, Christianity; **alkoholo**, alcohol, **alkoholismo**, alcoholism; **fatalo**, inevitable Fate, **fatalismo**, fatalism; **angla**, English, **anglismo**, an anglicism.



-OP

The suffix **op** makes the collective sense of numbers: **deko****pe**, by tens, ten at a time; **Ili envenis duope**, They entered in pairs, by twos; **La policanoj marŝis kvarope**, The policemen were marching in groups of four; **unuope**, singly, one at a time.

3 000 METROJ

When figures of 1000 or more are written, the custom in some countries is to separate thousands with a comma; in others a period is used; and sometimes only a space. All of the following mean three thousand:

3,000

3.000

3 000

163

15. ANTAŬPAROLO:¹ EVANĜELINO

(By Henry Wadsworth Longfellow.)

Jen la arbaro pratempa:² la murmurantaj pinarboj³
Staras en verdaj vestaĵoj, en la krepusko malluma,
Kiel druidoj antikvaj, voĉoj malĝojaj, profetaj,
Kiel harpisto blankharaj, longaj la barboj sur brusto.
De la kavernoj profundaj la oceano najbara
Raŭka per voĉo respondas, de la arbaro ĝemadon.⁴

Jen la arbaro pratempa. Kie nun estas la koroj
Kiuj sub ĝia branĉaro⁵ kiel cervido⁶ eksaltis,⁷
Kiu sub arbo ekaŭdas⁸ de la ĉasanto⁹ la voĉon?
Kie vilaĝo humila, hejmo de la kamparanoj,
Homoj de kiuj la vivoj kiel rivero iradis,¹⁰
Kies trankvilaj fluadoj¹¹ pasas tra paca arbaro,
Sub la branĉaro de l' tero, ankaŭ sub bildoj ĉielaj?

Estas dezerta la lando, kaj disigitaj¹² por ĉiam¹³
Ĝiaj antaŭaj loĝantoj, for de la hejmoj pelitaj,
Kiel folioj kaj polvo kiam la fortaj ventegoj
De la kolera oktobro ilin ekkaptas kaj ĉasas,
Kaj malproksimen portinte, sur oceanon disĵetas.¹⁴
Nur tradicio nun restas de la vilaĝo de Grand-Pré.

Se vi la kredon posedas, kredon pri amo konstanta,
Kiu esperas kaj daŭras, kaj pacience atendas,
Se vi la fidon posedas pri la beleco kaj forto
De la virina animo, koro fidela, amanta,
Aŭdu la kanton malĝojan, kiun ankoraŭ kantadas
De la arbaro la pinoj,¹⁵ la historion de amo
En Akadio la bela, lando de homoj feliĉaj.

—Trad.¹⁶ William George Adams

¹**Antaŭ/parol/o**, foreword, introduction ²**pra/temp/a**, primeval, of ancient times (see PRA- below) ³**pin/arb/o**, pine tree
⁴**Raŭka...ĝemadon = Respondas per raŭka voĉo (la) ĝem/ad/o/n** (moaning) **de la arbaro** ⁵**branĉ/ar/o**, network of branches ⁶**cerv/id/o**, fawn (see -ID below) ⁷**ek/salt/i**, leap, spring up (see EK- below)
⁸**ek/aŭd/i**, catch the sound of ⁹**ĉas/ant/o**, hunter ¹⁰**ir/ad/is**, went along
¹¹**flu/ad/o/j**, flowings ¹²**dis/ig/it/a**, dispersed ¹³**por ĉiam**, forever
¹⁴**dis/jet/i**, to scatter ¹⁵**kiun...pinoj = kiun la pinoj de la arbaro ankoraŭ kantadas** ¹⁶**Trad.** = Traduk/it/a de

PRA-

This prefix denotes separation in time, as follows:

1. With specific relationships, it is equivalent to English “great” or “grand”: **onklo**, uncle, **praonklo**, great-uncle; **nevo**, nephew, **pranevo**, grandnephew; **avo**, grandfather, **praavo**, great-grandfather; **nepo**, grandson, **pranepo**, great-grandson; **prapranepino**, great-great-granddaughter, etc.

2. With all other words the connotation is always that of time long past: **pratempoj**, primitive times; **prapatroj**, forefathers, ancestors; **prahomo**, primitive man; **praarbaro**, primeval forest; **prahistorio**, prehistory; **prabesto**, prehistoric animal; **pratipo**, prototype.

EK-

In Lesson 4 we learned that this prefix focuses on the start of an action. The meaning may be “to begin -ing,” as we have seen; or it may mean an abrupt, startling kind of action: **salti**, to jump, **eksalti**, to spring up abruptly; **brili**, to shine, **ekbrili**, to flash; **krii**, to yell, **ekkrii**, to cry out; **aŭdi**, to hear, **ekaŭdi**, to catch the sound of.

-ID

The suffix **id** names the offspring or descendant of persons and animals: **reĝo**, king, **reĝido**, prince; **cervo**, deer, **cervido**, fawn; **kato**, cat, **katido**, kitten; **Izraelo**, Israel, **izraelidoj**, Israelites.

-ESTR

This suffix denotes the chief person: **urbo**, town, **urbestro**, mayor; **ŝipestro**, master of a vessel; **policestro**, chief of police.

16. Barbro kaj Eriko—VI

Rud la 30-an de novembro

Plej bona amiko,

Dankon, koran dankon pro via letero!

Vi rakontis iomete pri la malfeliĉa milito; mi same malamas ĝin. Via popolo certe estas egale pacama kiel la nia,¹ kaj mi kredas, ke la plimulto de la homoj ne deziras militi.

Ŝajnas al mi,² ke mi iufoje³ legis pri la bela kutimo, meti lanternojn sur la tombojn. Ankaŭ en nia kalendaro la 1-a de novembro konservas de post la katolika tempo⁴ tiun nomon: Tago de Ĉiuj Sanktuloj.

Mi jam multe aŭdis pri via popolo, kaj mi ŝategas la aŭstran muzikon. Per nia kvarlampa⁵ aparato⁶ ni ofte aŭskultas la ondon⁷ vian: Wagner, Beethoven, Mozart, Schubert kaj Strauss ĉiam entuziasmigas⁸ min. Ĉu ankaŭ vi ŝatas la muzikon? Kaj—ĉu vi ŝatas danci? En Svedujo oni dancas tre multe. En ĉiu urbo troviĝas bela, granda popolĝardeno.⁹ Dum la somero, sabate kaj dimanĉe multaj gejunuloj kunvenas tie por amuziĝi,¹⁰ por vidi teatraĵojn, por danci. Ankaŭ mi ŝatas danci, sed Paĉjo ne permesas al mi partopreni publikan dancon. “Nur ĉi tie kaj en la hejmoj de viaj geamikoj vi dancu,” diras la kara tirano.

De kelkaj tagoj jam neĝas. Blanka estas la tegmento de nia eta domo, super la blankaj ondoj de niaj kampoj flugas, manĝaĵon serĉante, mal-lumaj vaguloj:¹¹ la kornikoj. Paseroj sidas antaŭ nia fenestro, malsataj sed ne malĝojaj, atendante panerojn; la karaj paruoj fervore pikmanĝas¹² sebon. Kelkfoje ili danke rigardas min, kun la kapo oblikve tenata. Ĉu ili estas koketaj?

La tagoj jam estas mallongaj. Baldaŭ, dum Kristnasko,¹³ la suno leviĝos nur post la naŭa matene kaj malaperos jam je la dekkvara.¹⁴ Sed—ho, kiel belegaj estas vintre la noktoj! Mil steloj sur la ĉielo—pala luno—longaj, larĝaj strioj kaj flamanta drapiro de la norda lumo brilas en mirinda beleco.

Mi rigardas la stelojn, miaj pensoj migras al malproksimaj landoj kaj al la venonta tempo¹⁵....

Mi salutas vin!

Via amikino

Barbro

¹la nia, ours ²ŝajnas al mi, it seems to me ³iu/foj/e, at some time
⁴la katolika tempo, Catholic times ⁵kvar/lamp/a, four tube ⁶aparato,
 (radio) set ⁷ondo, (radio) wave(length) ⁸entuziasm/ig/i, to enthuse,
 inspire ⁹popol/ĝarden/o, public park ¹⁰amuz/iĝ/i, to have fun
¹¹vag/ul/o, tramp, vagabond ¹²pik/manĝ/i, eat by pecking
¹³Krist/nask/o, Christmas ¹⁴la dek/kvar/a, 2 o'clock in the afternoon
 (24-hour system) ¹⁵la ven/ont/a temp/o, coming times, times to come

FALSE FRIENDS

Not all Esperanto words that look like English words may be trusted to have exactly the same meaning. In the previous selection, for example, **larĝa** does not mean “large,” but wide; **kapo** isn’t “cap,” but head; and **domo** is not a “dome”, it’s a house. Such words, which can lead the unwary student astray, are known as “false friends.” Here are some common ones:

Adulta, adulterous. *Adult*: plenaĝa.

Agonio, death-throes. *Agony*: dolorego, angoro.

Aktuala, of current interest, topical, present-day. *Actual*: efektiva.

Akurata, punctual, on time, prompt. *Accurate*: preciza, senerara.

Apologio, vindication, justification. *Apology*: pardonpeto,
bedaŭresprimo.

Atendi, to wait. *Attend (meeting, etc.)*: ĉeesti, vizitadi.

Averti, to warn. *Avert*: forturni, forklini.

Balanci, to swing up and down, sway, rock, nod. *Balance*: ekvilibri,
bilanci.

Bedo, a patch or bed for plants. *Bed*: lito.

Bordo, bank, shore, edge. *Board*: tabulo; komitato, estraro.

Brava, valiant, gallant. *Brave*: kuraĝa.

Buklo, curl, lock (of hair). *Buckle*: buko.

Demandi, ask. *Demand*: postuli.

Drinki, drink to excess. *Drink (normally)*: trinki.

Efektiva, real, actual. *Effective*: efika.

Eventuala, contingent, possible in the future. *Eventual*: fina.
(*Eventuale* = in case of need)

Favorata, favored, privileged. *Favorite (book, etc.)*: preferata.

Festo, a festival or celebration. *Feast (banquet)*: festeno.

Frazo, sentence. *Phrase*: frazero, esprimo, vortgrupo.

Fundo, bottom. *Fund*: kaso, fondaĵo, fonduso.

Gipso, gypsum, plaster of Paris. *Gypsy*: cigano.

Granda, big, great. *Grand*: grandioza, impona.

Ĝenerala, in general, common to all or most. *General: (usual)* kutima; *(military)* generalo.

Infano, child. *Infant:* infaneto, bebo.

Instanco, level of official authority, especially judicial. *Instance:* okazo, ekzemplo.

Ĵurnalo, newspaper. *Journal: (diary)* taglibro; *(magazine)* gazeto, revuo.

Karto, card. *Card:* ĉaro.

Kasko, helmet. *Cask:* barelo.

Kojno, wedge. *Coin:* monero.

Kondiĉo, a stipulation, prerequisite. *Condition (state):* stato.

Konkreta, real and not abstract. *Concrete:* betono.

Konsekvenca, consistent, something that follows in sequence. *Consequence:* rezulto, sekvo.

Kontroli, to check, verify, oversee. *To control:* regi, direkti.

Konvena, suitable, proper, fitting, appropriate. *Convenient:* oportuna.

Krajono, pencil. *Crayon:* paŝtelo.

Largâ, wide, broad. *Large:* granda.

Lokusto, grasshopper. *Locust:* akrido.

Magazeno, a large store or storehouse. *Magazine:* gazeto, revuo.
(Also **magazino** is a large, popular magazine, especially when illustrated and featuring articles on many subjects.)

Medicino, the science of medicine. *Medicine:* medikamento.

Mendi, to order (something). *To mend (repair):* ripari, senpaneigi.

Novelo, short story. *Novel:* romano.

Oferi, offer up, sacrifice. *Offer:* proponi, prezenti.

Okaze, by chance, accidentally. *Occasionally:* kelkfoje, de tempo al tempo (**Okazo:** chance, occurrence.)

Oportuna, convenient, handy. *Opportunity (chance):* okazo.

Parenco, a relative. *Parent:* patro, patrino. (*Parents:* gepatroj)

Pego, woodpecker. *Peg:* keĵlo.

Placo, public square. *Place:* loko.

Planko, floor. *Plank:* tabulo.

Porko, a pig. *Pork*: porkaĵo, porka viando.

Praktiki, put into practice. *To practice (exercise, train)*: sin ekzerci, ekzerciĝi.

Presi, to print (with type). *To press*: premi. *The press*: la gazetaro.

Pretendi, to claim, assert a right to. *Pretend*: ŝajnigi, preteksti.

Proceso, a law suit. *Process (procedure)*: procedo.

Pruno, plum. *Prune*: sekigita pruno, sekpruno.

Rento, income from property or investments. *Rent*: lupago, luprezo.
(**Lui** is to rent something from someone; **luigi** is to rent something to someone.)

Rezigni, to give up claim to, relinquish, waive. *To resign (from a position)*: demisii, eksiĝi, abdiki.

Rimarki, to notice, observe, note. *To remark*: komenti, rimarkigi.

Rimedo, means, way, resource. *Remedy*: kuracilo; korekti, rebonigi.

Sentenco, a wise saying, proverb. *Sentence*: frazo.

Sorto, fate, destiny, luck. *Sort (kind)*: speco.

Subskribi, to sign. *Subscribe*: aboni.

Triviala, vulgar, crude, boorish. *Trivial*: bagatela, malgrava.

Verso, a line of poetry, or Bible verse. *Verse (stanza of song or poem)*: strofo.

Vulgara, everyday, run-of-the-mill, of or for the common people.
Vulgar: triviala, kruda, maldeca.

17. Trans la Lingvajn Barilojn—IV

Frankfurto, Germanujo, 9 novembro

En la centra parto de Frankfurto staras multaj grandaj modernaj konstruaĵoj, kie iam ekzistis malnovaj, historiplenaj.¹ Kiam la dua mondmilito venis, la detruado² estis terura; miloj da bomboj falis el la ĉielo kaj detruis la plejparton³ de la grandaj komercaj konstruaĵoj. Nuntempe⁴ oni rekonstruis la urbon, kaj nun ekzistas grandaj modernaj stratoj kun novaj butikoj kaj magazenoj.

Kiam la vagonaro alvenis en la stacidomon, S-ro Franz Rabl atendis nin. Li estas maljuna viro, ekspoŝtisto,⁵ kiu havis dum la tago tempon por

montri al ni sian urbon. Ni promenis laŭlonge la riveron Maino, kie estas bela parketo kun multaj benkoj por la laculoj. Ni transiris⁶ la riveron per malnova kaj interesaspekta⁷ ponto al malnova parto de la urbo. Tie ankoraŭ staris la malnovaj domoj, gastejoj⁸ kaj malgrandaj komercaj konstruaĵoj, ĉar la bomboj ne tuŝis ĉi tiun parton de la urbo. Ni iris al malnova gastejo por trinki la faman lokan trinkaĵon, pomvinon.⁹ Multaj loĝantoj en ĉi tiu parto de la urbo kolektiĝas¹⁰ en la gastejoj por trinki la malmultekostan kaj bongustan vinon kaj por interparoli pri gravaj kaj malgravaj aferoj.

Post nia trinkado ni vizitis kelkajn novajn grandajn magazenojn kaj la magazenoj rememorigis¹¹ min pri niaj en Usono, ĉar ili kaj la vendataj aĵoj, kaj ankaŭ la aĉetantoj, aspektis samaj, kiajn oni vidas en nia propra urbo. S-ro Rabl gvidis nin laŭlonge la ĉefstratojn,¹² kaj ankaŭ por vidi kelkajn malnovajn konstruaĵojn, preĝejojn, la urbdomon,¹³ ktp. Tiam ni devis reiri al la stacidomo por renkonti alian samideanon, kiu atendis nin tie je la kvara kaj duono.

Kiam ni alvenis ĉe la stacidomo, altstatura,¹⁴ mezaĝa¹⁵ viro atendis nin ĉe la enirejo.¹⁶ Estis S-ro Puff, peranto¹⁷ por la Sennacieca¹⁸ Asocio Tutmonda¹⁹ en Germanujo, kaj li gvidis nin al restoracio por manĝi, kaj poste ni ĉeestis la monatan kunvenon de lia grupo.

¹**histori/plen/a**, full of history, historic ²**detru/ad/o**, destruction

³**plej/part/o**, greatest part ⁴**nun/temp/e**, at the present time

⁵**eks/poŝt/ist/o**, ex-postman (see EKS- below) ⁶**trans/ir/is**, crossed

⁷**interes/aspekt/a**, interesting-looking ⁸**gast/ej/o**, inn, Gasthaus

⁹**pom/vin/o**, apple wine ¹⁰**kolekt/iĝ/as**, collect, get together

¹¹**re/memor/ig/is**, reminded ¹²**ĉef/strat/o**, main street ¹³**urb/dom/o**,

town hall ¹⁴**alt/statur/a**, tall (lit., of high stature) ¹⁵**mez/aĝ/a**, middle-aged ¹⁶**en/ir/ej/o**, entrance ¹⁷**per/ant/o**, agent ¹⁸**sen/naci/ec/a**, without

(consideration for) nationality ¹⁹**tut/mond/a**, worldwide **Sennacieca**

Asocio Tutmonda = a world-wide organization of Esperantists

Wiesbaden, Germanujo, 16 novembro

En ĉi tiu urbo ekzistas bona Esperanta kurso vespere, kaj S-ro Schorr estas la instruisto. Bonnie kaj mi ĉeestis la klason kaj, kvankam la instruisto kelkfoje²⁰ uzis la germanan lingvon, plejparte²¹ li uzis Esperanton kaj ni vere povis ĝui la klason kaj lernis pri kelkaj gramatikaj aferoj.

Sabaton ni havis okazon por renkonti du malnovajn, fervorajn geesperantistojn, la gesinjoroj Bertram Potts el Wellington, Nov-Zelando. Li estas eksĵurnalisto²² kaj malnova esperantisto, kaj dum sabata vespero li paroladis al speciala kunveno de la Esperanta klubo en Wiesbaden pri sia hejmo kaj la geesperantistoj tie. Li estas lerta, interesa paroladisto, kaj mi estas certa ke la tuta grupo ĝuis lian paroladon. Ĉiuj opiniis ke la vespero forflugis tro rapide.

S-ino Opperman, esperantistino en Wiesbaden, invitis nin al sia domo por vidi alian parton de la urbo kaj por paroli kune.²³ Ni promenis tra belaj arbaroj kiuj estas ĉirkaŭ la urbo, kaj ni vidis en la ĉirkaŭaĵoj²⁴ de la urbo multajn apartajn domojn. Kutime, en Eŭropo la urboj estas konstruitaj same kiel urboj en Usono, kun grandaj apartamentaroj²⁵ kaj loĝejoj²⁶ apud la centra parto de la urbo, kaj en la ĉirkaŭaĵoj oni konstruis apartajn domojn kaj malgrandajn apartamentarojn.

Ĵaŭdon ni foriris el la bela banurbo,²⁷ kaj veturis vagonare al Parizo.

Parizo, Francujo, 19 novembro

Ekzistas en la Jarlibro²⁸ de la Universala Esperanto-Asocio reklamo por la Hotelo Felix, Rue Molière 26, Parizo, Francujo. Kiam Bonnie kaj mi vidis ĉi tiun reklamon ni decidis viziti la Hotelon Felix dum nia vizito en Parizo.

Ni alvenis en Parizon je la sepa, vendredan matenon. Ni tuj iris al la Hotelo Felix, per taksio, ĉar la reklamo en la Jarlibro ankaŭ enhavas²⁹ la vortojn "Esperanto parolata." Estis nur mezaĝa virino en la hotelo, kiu ne povis paroli aŭ Esperante aŭ angle, kvankam ŝi montris al ni per signa lingvo, ke la esperantisto alvenos je la dekdua, tagmeze. Ni lasis niajn valizojn ĉe la hotelo kaj promenis tra kelkaj stratoj en la bela, fama kaj interesa urbo, Parizo.

Post trihora promonado ni revenis al la Hotelo Felix kaj tiam estis en la oficejo de la hotelo viro kiu salutis nin per la vortoj "Bonan tagon." Estis S-ro Jean Thierry, juna viro kiu estas duonposedanto³⁰ de la malgranda hotelo. Li ankaŭ estas vic-delegito por UEA kaj prezidanto de la Pariza Esperanto-Asocio. S-ro Thierry montris al ni ĉambron kaj ĝi

tre plaĉis al ni, do ni decidis resti ĉe la Hotelo Felix dum nia restado de tri tagoj en Parizo.

Post kvarhora dormeto³¹ ni vestiĝis, iris al restoracio por vespermanĝi, kaj tiam revenis al la hotelo por renkontiĝi³² kun S-ro Thierry je la oka. Kune ni veturis, per aŭtobuso, al la kunveno de la Pariza Esperanto-Asocio. Oni kunvenas ĉiuvendre, en la fama Universitato Sorbonne, en la geografia prelega ĉambro. Ĉeestis la kunvenon ĉirkaŭ tridek geesperantistoj kaj ni aŭskultis interesan paroladon pri Louis de Beaufront, la fama kaj unua franca esperantisto.

²⁰kelk/foj/e, sometimes ²¹plej/part/e, for the most part

²²eks/jurnal/ist/o, former newspaperman ²³kun/e, together

²⁴ĉirkaŭ/aĵ/o/j, surroundings, environs ²⁵apartament/ar/o, apartment

building ²⁶loĝ/ej/o, residence ²⁷ban/urb/o, spa (town known for its

mineral baths) ²⁸Jar/libr/o, yearbook, annual (see p. 48) ²⁹en/hav/as,

contains ³⁰du/on/posed/ant/o, half-owner ³¹dorm/et/o, nap

³²renkont/iĝ/i, to meet together



majeczka / Shutterstock, Inc.

Estis iomete da tempo post la parolado, do mi havis la tempon por paroli nur kelkajn vortojn al la grupo pri Usono, Kalifornio, kaj ankaŭ pri la movado en San Diego kaj Los Angeles. Ni renkontiĝis en kafejo post la kunveno, kaj tie ni renkontis S-ron Schwartz, malnovan esperantiston kiu diris ke li volos renkonti nin ĉe la kongreso en Marseille dum aŭgusto.

London posttagmeze ni iris al la biblioteko de la Ĉambro de komerco³³ ĉar ni legis en la Jarlibro de UEA pri “Grava Esperanto-fako” tie. Ni trovis en la biblioteko multajn librojn kaj gazetojn, pli ol du mil, pri Esperanto kaj diversaj grupoj tra la mondo ekde³⁴ la komenco de Esperanto. Ni rigardadis la librojn dum du horoj kaj tiam ni devis iri al la stacidomo por iri per vagonaro al Barcelono, Hispanujo.

(Daŭrigota)

³³Ĉambro de komerco, Chamber of Commerce ³⁴ek/de, right from

EKS-

As in English, this prefix means “former”: **eksprezidanto**, ex-president; **ekspoŝtisto**, former or retired postman; **eksigi**, to put out of office, fire; **eksiĝi**, to leave office, resign.

APERI—ASPEKTI

Although both of these words mean “to appear,” they are not alike. **Aperi** is to make an appearance; **aspekti** is to appear (look) in a certain way: **Mia edzino aperis subite en la pordo**, My wife appeared suddenly in the doorway; **Ŝi aspektis kolera**, She looked angry; **Ŝia apero feliĉigis min, sed ŝia aspekto maltrankviligis min**, Her appearance (showing up) cheered me, but her appearance (the way she looked) made me uneasy.

NAMES OF COUNTRIES

There are three ways of deriving country names in Esperanto:

1. From the word for its inhabitants, a country name can be formed by means of the suffix **uj**: **anglo**, an Englishman, **Anglujo**, England; **dano**, a Dane, **Danujo**, Denmark; **germano**, a German, **Germanujo**, Germany.

(Sometimes the word **lando** is used instead of **uj**: **Angllando**, **Danlando**, **Germanlando**, **Svedlando**, etc.)

2. Some younger countries have their own root-word: **Kanado**, **Aŭstralio**, **Bolivio**, **Brazilo**, **Usono**, etc. In this case the inhabitants are named with the suffix **an**: **Kanadano**, **Aŭstraliano**, **Boliviano**, **Brazilano**, **Usonano**.

3. In some cases there are Esperantized forms of internationally understood country names ending in **-io**: **Latvio**, **Hungario**, **Jugoslavio**, etc. In fact many people use **-io** as a suffix parallel to **-ujo**, so that one frequently sees **Anglio**, **Danio**, **Germanio**, etc.

THE ESPERANTO ALPHABET

The Esperanto alphabet has 28 letters: **Aa, Bb, Cc, Ĉĉ, Dd, Ee, Ff, Gg, Ĝĝ, Hh, Ĥĥ, Ii, Jj, Ĵĵ, Kk, Ll, Mm, Nn, Oo, Pp, Rr, Ss, Ŝŝ, Tt, Uu, Ŭŭ, Vv, Zz**. To name them (as in reciting the alphabet), give vowels their usual sound and add the **-o** ending to the consonants: **A, Bo, Co, Ĉo, Do**, etc.

Ŭ is named like the English word "woe" or by some, "**U-hoko**." This letter is occasionally used initially like English **W**, by the way, mostly in proper names like **Ŭuhan** (Wuhan, the city in China), or **Ŭato** (for Watt).

The non-Esperanto letters **Q, W, X, and Y** are called **kuo**, or **kŭo** or **kvo**; **duobla-u** or **duobla-vo**; **ikso**; and **i-greka** or **ipsilono**.

In radio and telegraph messages, etc., where supersigns are not available, **Ĉ** may be spelled **CH**, **Ĝ** as **GH**, etc., and **Ŭ** may be sent as **U**. This system is, however, very rarely used in practice.

18. La Espero

(This poem by L. L. Zamenhof, set to music by F. Ménil, is a kind of “national anthem” of Esperantists.)

En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko;
Perflugiloj de facila vento
Nun de loko flugu ĝi al loko.¹
Ne al glavo sangon soifanta²
Ĝi la homan tiras familion;³
Al la mond’ eterne militanta
Ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l’ espero
Kolektiĝas pacaj batalantoj,
Kaj rapide kreskas la afero
Per laboro de la esperantoj.
Forte staras muroj de miljaroj⁴
Inter la popoloj dividitaj;
Sed dissaltos⁵ la obstinaj baroj,
Per la sankta amo disbatitaj.⁶

Sur neŭtrala lingva fundamento,
Komprenante unu la alian,
La popoloj faros en konsento⁷
Unu grandan rondon familian.
Nia diligenta kolegaro⁸
En laboro paca ne laciĝos,
Ĝis la bela sonĝo de l’ homaro
Por eterna ben’ efektiviĝos.

¹= Nun ĝi flugu de loko al loko ²= Ne al glavo, soifanta sangon ³= Ĝi
 tiras la homan familion ⁴mil/jar/o, millenium (a thousand years)
⁵dis/salt/i, to burst apart ⁶dis/bat/i, to knock apart ⁷en konsento, in (by)
 agreement ⁸koleg/ar/o, band of coworkers

19. El Japanaj Novaĵoj¹

(From *La Revuo Orienta*.)

La rezulto de la ĝenerala elekto de la Domo de Reprezentantoj en la 20a de novembro montris sufiĉan konfidon de la publiko al la Ikeda reĝimo. Do estas evidente, ke Ĉefministro² Ikeda estos denove elektita kiel la estro de la nova kabineto, kiam oni kunvokos³ la specialan sesion de la Parlamento en la 5a de decembro por nomi ĉefministron.

Eksjuĝisto⁴ al Hago

En la 17a de novembro D-ro⁵ Kotaro Tanaka estis elektita de la Ĝenerala Kunsido⁶ kaj la Sekureca⁷ Konsilantaro⁸ de la Unuiĝintaj⁹ Nacioj por servi kiel la juĝisto de la Internacia Juĝejo¹⁰ de Justeco¹¹ en Hago. Antaŭ nelonge li kompletigis¹² la 10-jaran servon kiel la ĉefjuĝisto de la Supera¹³ Juĝejo de Japanujo.

Li diris, ke li estas tre danka al la Estro kaj funkciuloj¹⁴ de la Ministrejo¹⁵ de Eksteraj Aferoj, kaj ke je la nova ofico li humile kaj sindone¹⁶ laboros por la honoro de sia patrujo¹⁷ kaj por la monda paco.

Vizito de Studentoj el Suda Koreujo

40 membroj de la Sud-Korea Studenta Kultura Misio alvenis al Tokio per aeroplano vespere de la 29a de novembro. Ili restos 10 tagojn. La grupo konsistas el gestudentoj de diversaj gradoj, de elementaj lernejoj al universitatoj.

Dum la restado, ili prezentos filmojn, fotografiaĵojn,¹⁸ kaj faros prelegojn kune kun¹⁹ korea muziko kaj danco. Samtempe ili interŝanĝos opiniojn pri diversaj temoj kun japanaj studentoj.

¹nov/aĵ/o/j, news ²ĉef/ministr/o, prime minister ³kun/vok/i, call together, convoke ⁴eks/juĝ/ist/o, former judge ⁵D-ro = Doktoro
⁶kun/sid/o, session, meeting ⁷sekur/ec/o, security ⁸konsil/ant/ar/o, council ⁹Unu/iĝ/int/a/j Naci/o/j, United Nations ¹⁰juĝ/ej/o, court
¹¹just/ec/o, justice ¹²komplet/ig/i, to complete ¹³super/a, supreme
¹⁴funkci/ul/o, functionary ¹⁵ministr/ej/o, ministry ¹⁶si/n/don/e, devotedly, dedicatedly ¹⁷patr/uj/o, fatherland ¹⁸fotograf/aĵ/o, photograph
¹⁹kun/e kun, together with

20. Barbro kaj Eriko—VII

Hohenberg, la 10-an de decembro

Amikino,

En mia imago mi venas al vi. Mi vidas svedajn arbarojn kaj lagojn, mi rimarkas vian domon ruĝbrunan. Mi eniras, premas vian manon, mi babilas kun vi.

Estante¹ infano mi legis belan rakonton de Selma Lagerlöf, via famega verkistino,² “Nils Holgerson” ĝi estas nomata. Mi tiam enviis la migrantan etulon,³ mi nun lin denove envias. Sur la dorso de anseroj sovaĝaj ankaŭ mi volus veni al vi.

Ni havas similajn interesojn. Ankaŭ mi ŝatas muzikon, aŭskultas ofte radiokoncertojn kaj mem ludas violonon kaj fortepianon. La plej grandan plezuron faras al mi la legado,⁴ preskaŭ ĉiutage ĝis meznokte mi legas.



canadastock / Shutterstock, Inc.

Vintro ankaŭ ĉe ni, neĝo kovras stratojn, tegmentojn, kampojn, herbejojn, montarojn.

Ĉu vi jam aŭdis pri sankta Nikolao⁵ kaj pri Krampuso, la nigra diablo, kiu venas la sesan de decembro, por rekompenci kaj puni? Sankta Nikolao estas episkopo kun blanka mantelo, kun mitro kaj kurba bastono; Krampuso, tute nigra, havas longan voston, longan ruĝan langon kaj kornojn. Sur la dorso li portas sakon, destinitan⁶ por malbonaj infanoj.

Ĉu mi iam povos sendi Krampuson al vi?—

Tiu maskado⁷ estas malnova kutimo, sed multaj homoj al ĝi kontraŭas,⁸ ne volante timigi⁹ malgrandajn infanojn.

Dum Kristnasko ĉiu infano, malriĉa aŭ riĉa, ricevas kristarbon,¹⁰ malgrandan abion, sur kies branĉetoj estas falsbrilaĵoj,¹¹ orumitaj pomoj, nuksoj, bakaĵoj, sub ĝi aliaj donacoj: libroj, vestoj, ktp. Kristnasko estas vere familia festo, preskaŭ ĉiuj familianoj donas al si reciproke¹² donacojn. Kristnasko estas la sopiro¹³ de ĉiuj infanoj.

Dum Kristnasko ni ŝatas glacion kaj neĝon.

Je Kristnasko ni deziras al ni reciproke feliĉon—mi ankaŭ deziras feliĉon al mia malproksima knabino malgranda kaj sendas mian fotografaĵon al vi. Mi estus feliĉa, se mi ricevus la vian.¹⁴

Kun kora manpremo mi salutas vin,

Via

Eriko

¹est/ant/e, (while) being, when I was ²verk/ist/o, writer ³et/ul/o, little fellow ⁴La plej...legado, reading is my greatest pleasure

⁵Ĉu...Nikolao, Have you ever heard of St. Nicholas ⁶destin/it/a por, intended for ⁷mask/ad/o, masquerade ⁸kontraŭ/i, to oppose, be against ⁹tim/ig/i, to frighten ¹⁰krist/arb/o, Christmas tree ¹¹fals/bril/aĵ/o, tinsel ¹²al si reciproke, to one another ¹³sopiro, here: thing to be longed for

¹⁴la via, yours

21. Trans la Lingvaj Barilojn—V

Barcelono, Hispanujo, 28 novembro

Ni ofte scivolis¹ en kia maniero oni povus vivi kaj vojaĝi en Eŭropo sen Esperanto. Kvankam la loĝantoj de la diversaj landoj povas aĉeti manĝaĵojn kaj aliajn aĵojn kaj lui ĉambrojn per malgrandaj sumoj, turisto ne povas fari same. Mi kaj mia edzino ricevas malgrandajn monatajn enspezojn,² kaj sen la helpo de la esperantistoj ni certe ne povus vivi kaj vojaĝi per niaj enspezoj. La turisto en Eŭropo devas pagi multe pli da mono por vivi, por aĉeti manĝojn en la restoracioj kaj por lui hotel-ĉambrojn, kaj por aliaj vojaĝaj aferoj.

Por ni estas pli facile ĉar, ekzemple, kiam ni alvenas en urbo ni telefonas al la esperantistoj tie kaj ili povas sciigi nin pri malmultekostaj lokoj por resti kaj manĝi. Kompreneble, la lingva barilo ne ekzistas por ni esperantistoj, sed la ordinaraĵoj turistoj devas iri al la grandaj hoteloj kaj restoracioj, por trovi personojn kiuj povas paroli angle. Do, mi opinias, ke mi kaj Bonnie havas grandan ŝuldon al nia lingvo, Esperanto, kaj en la estonteco, kiam kaj kie ni povos, ni laboros por la movado.

En Barcelono ni tuj ricevis helpon de la esperantistoj por trovi bonan ĉambron en pensiono³ en la malnova kvartalo de la urbo. La personoj ĉe nia hotelo ne povas paroli angle, sed esperantisto, S-ro Gisbert, helpis nin, per telefono, por lui la ĉambron kaj aranĝi la diversajn aferojn kun la hotelistoj. Ni alvenis mardon, la 20an de novembro, dum la vespero kaj, ĉar pluvis kaj ni estis sufiĉe lacaj post unu-kaj duontaga⁴ vojaĝo de Parizo, ni enlitiĝis frue kaj ne havis tempon por kontakti la geesperantistojn.

La venontan⁵ tagon, ankoraŭ pluvis do ni restis en nia ĉambro ĝis la sesa vespere, kiam la pluvo ĉesis. Ni marŝis al la oficejo de Prof. Dalmau, ĉefdelegito de UEA en Hispanujo, por renkonti lin kaj sciigi⁶ pri la urbo Barcelono. S-ano Dalmau estas afabla, amika viro, profesoro de lingvoj, kiu sciigis nin pri la Esperanto-movado en Barcelono kaj Hispanujo, kaj pri la urbo.

Dum la sekvantaj tagoj ni estis tre okupataj⁷ ĉar multaj geesperantistoj akompanis nin je diversaj tempoj por vidi la urbon kaj la vidaĵojn en la ĉirkaŭaĵoj. Ni renkontis pli da esperantistoj ĉi tie ol en aliaj urboj, ĉar ili ĉiam serĉas la okazon por paroli kun alilandanoj,⁸ kaj precipe kun usonanoj.

Por la unua fojo mi havis la okazon por renkonti blindan esperantiston. En Hispanujo estas malpermesate almozepeti kaj la blinduloj devas, anstataŭe,⁹ vendi loteriajn biletojn por vivteni¹⁰ sin. Ni renkontis Jorge Fernández dum lia vendado proksime al la placo de Cataluña. S-ro Tomás Punet, ano de la grupo “Stelo de Paco,” prezentis nin al Jorge, kaj dufoje ni havis bonajn interparolojn kun li ĉe la stratangulo.¹¹ Li sciigis nin pri la blindula Esperanta grupo kaj ankaŭ montris al ni Esperantan gazeton presitan en Esperanto kaj brajlo.

Palma de Majorko, Hispanujo, 30 decembro

Bonnie kaj mi alvenis al ĉi tiu urbo matene, la 7an de decembro, per ŝipo el Barcelono post nokta vojaĝo trans la belan Mezmaron.¹² Ni trovis bonan ĉambron en unuaklasa¹³ pensiono. Sammatene¹⁴ ni telefonis al S-ro Miguel Arbona, la UEA-delegito en Palma. Ni renkontiĝis ĉe malgranda butikio kiu apartenas al lia filo. S-ro Arbona estas afabla viro, kiu gvidis nin dum unu horo por montri al ni vidindaĵojn¹⁵ de la urbo. Poste ni iris kune al la domo de alia esperantisto, S-ro Mariano Jaquotot, kiu montris partojn de la urbo al ni kaj helpis nin trovi la bankon kaj poŝtoficejon.

S-ro Jaquotot invitis nin al sia bieno la venonatan dimanĉon. Li posedas grandan domon kaj vinberejon¹⁶ proksimume dudek kilometrojn de Palma, en bela kamparo, kie oni povas spiri libere kaj ĝui tipajn kamparvidaĵojn. Lia bieno situas ekster la malnova vilaĝo Biniali, kaj en la domo estas trezoro de antikvaj mebloj,¹⁷ religiaj pentraĵoj¹⁸ kaj aĵoj (malgrandaj statuoj kaj vazoj) el la tempo kiam la Romanoj loĝis en la Balearaj Insuloj. Li montris al ni sian kolekton de moneroj kaj poŝtmarkoj, kaj ankaŭ sian kolekton de Esperantaj libroj. Ni restis ĉe lia

¹sci/vol/i, to want to know, wonder ²en/spez/o, income (see below)

³pension/o, a *pension*, European boarding house ⁴unu- kaj

du/on/tag/a, one-and-a-half-day ⁵la ven/ont/a/n, the coming, next

⁶sci/iĝ/i, to find out, learn ⁷okup/at/a, occupied, busy ⁸ali/land/an/o,

foreigner ⁹anstataŭ/e, instead ¹⁰viv/ten/i, support ¹¹strat/angul/o,

street corner ¹²Mez/mar/o, Mediterranean Sea ¹³unu/a/klas/a, first

class ¹⁴sam/maten/e, the same morning ¹⁵vid/ind/aĵ/o/j, the sights

¹⁶vin/ber/ej/o, vineyard (vin/ber/o, grape) ¹⁷mebl/o/j, furniture

(mebl/o, a piece of furniture) ¹⁸pentr/aĵ/o, painting

bieno dum la tuta tago, gustumis¹⁹ diversajn botelojn de vino kaj ĝuis bongustan tagmanĝon.

Unu tagon ni iris al la strando por ĝui la belan, varman aeron kaj la vidaĵon de la maro. Tie ni renkontis mezaĝajn geedzojn, Ges-rojn Willard North, el nia urbo San Diego, kaj eltrovis²⁰ ke ilia hejmo estas malpli ol duonmejl²¹ de la nia.²² Ni interparolis unue pri San Diego, kaj tiam pri Hispanujo kaj la simileco²³ inter la du lokoj. Kiam S-ro North diris ke li povas paroli hispane, mi diris ion pri Esperanto. (Mi ĉiam faras tion kiam mi havas la okazon.) Tuj li demandis, ĉu mi konas S-ron Scherer de Los Angeles, ĉar ili estas amikoj dum dudek jaroj. Jen stranga okazaĵo,²⁴ renkonti personojn el nia urbo, kiuj ankaŭ konas esperantistojn en Los Angeles.

(Daŭrigota)

¹⁹**gust/um/i**, to taste (see below) ²⁰**el/trov/i**, to find out, discover
²¹**du/on/mejl/o**, a half mile ²²**la nia**, ours (see below) ²³**simil/ec/o**, similarity
²⁴**okaz/aĵ/o**, occurrence

ENSPEZO—ELSPEZO

Spezi can mean either to “pay out” or “take in” money. Often **en-** or **el-** is therefore prefixed to specify the meaning: **Mi elspezis ok dolarojn por nova ĉapelo**, I spent \$8 for a new hat. **Nia butiko enspezis tri mil dolarojn dum unu semajno**, Our shop took in \$3,000 in one month. **Enspezo** (or **enspezoj**), income; **elspezo** (or **elspezoj**), expenditures.

GUSTI—GUSTUMI

Gusti is intransitive and means to taste a certain way: **Tiu ĉi torto gustas bonege**, This pie tastes excellent. **Tiuj vinberoj havas malbonan guston**, Those grapes have a bad taste. **Pasigu la salon**

—**la supo estas sengusta**, Pass the salt—the soup is tasteless.

Gustumi is transitive and means to taste something: **Gustumu la kukon kaj diru al mi, ĉu ĝi bongustas**, Taste the cake and tell me if it tastes good.

LA MIA, LA VIA, etc.

When a possessive pronoun stands alone, i.e., the thing possessed is not stated, the article **la** is often placed before it. Thus expressions like **la mia**, **la via**, are equivalent to English “mine,” “yours,” etc.: **Ĉu vi perdis vian libron? Do prenu la mian**, Did you lose your book? Then take mine. **Mia edzino posedas ĉapelon precize similan al la via; ĉu vi estas certa, ke tiu ĉi ne estas la ŝia?** My wife owns a hat exactly like yours; are you sure this one isn’t hers?

22. Ŝercoj el *Heroldo de Esperanto*

“Inter la aĵoj, kiujn oni tre ofte malfermas erare, estas—la buŝo.”

Privata sekretariino: “Do, f-ino Lemke, viaj atestoj kaj referencoj estas unuarangaj.¹ Vi konsideru vin dungita kiel mia privata sekretariino. Sed nun mi bezonas ankoraŭ kiel eble plej malbelan foton de vi.” —Ĉu malbelan foton?— “Jes, por montri ĝin al mia edzino!”

Dompurigo:² “S-ro direktoro, ĉu mi povos havi vian permeson resti hejme morgaŭ antaŭtagmeze? Mia edzino deziras mian helpon ĉe la dompurigado.” — “Ne, s-ro Berger, tio tute ne estas ebla!” — “Multan dankon, s-ro direktoro!” ĝoje respondis Berger, “mi ja sciis, ke mi povas fidi je³ via komprenemo.”⁴

¹**unu/a/rang/a**, first-rate ²**dom/pur/ig/o**, housecleaning ³**fidi je**, rely on
⁴**kompren/em/o**, understanding

23. Barbro kaj Eriko—VIII

Rud 27.12.19..

Bonan vesperon!

Kiel vi fartas, kara amiko? Ĉu vi estas gaja kaj petolema kiel miaj amikinoj kaj mi? Jes, mi tion kredas, sed laŭ la foto, profunde en vi loĝas ankaŭ seriozo—kaj tio plaĉas al mi. Tre kore mi dankas pro la bildo. La mian mi almetas,¹ kaj ankaŭ eltondaĵon² el la *Sveda Esperanto-Gazeto*. Pli bone ol mi povus, ĝi rakontos pri niaj Kristnaskaj kutimoj. (Rigardu, kia bona knabino mi estas; do ne sendu al mi la teruran Krampuson! Mi tre timas lin.)

Hodiaŭ mi faris viziton. Se vi gastos iun³ en Svedujo, vi preskaŭ ĉiam devas manĝi dum la vizito. Sur la tablon venas manĝaĵoj ĉiuspecaj⁴—ho mi eĉ ne provos ilin nomi—ĉiaokaze⁵ oni regalas vin per kafo. “La sveda kafo estas tre bona,” ĉiuj fremduloj diras. “La sveda kafo estas bonega,”

Stockholm, la ĉefa urbo de Svedujo



Andrey Shcherbukhin / Shutterstock, Inc.

diris aŭstro, kiu iam estis gasto ĉe miaj amikoj. Mi preskaŭ fieriĝis, ĉar li multe laŭdis Svedujon.—Lin tre mirigis⁶ niaj manĝejoj, kie oni rajtas manĝi, kiom oni volas,⁷ laŭ antaŭe fiksita prezo. (Kompreneble oni ankaŭ povas mendi “laŭ la karto,”⁸ do pagi laŭ variaj prezoj.)

Via samlandano⁹ ankaŭ tre miris, ĉar niaj kampuloj lasas sitelojn sur tabletoj apud la ŝoseoj; ĉar la leterkestojn,¹⁰ ankaŭ apud la vojo, ni ne ŝlosas, kaj ĉar dum ekskursoj ni kelkfoje lasas biciklojn sur la vojo sen ies gardo. Cetere, multaj kamparanoj trankvile dormas kun neŝlosita pordo. Ĉu ankaŭ vi tion trovas strangea?

Jen vera historieto pri la sama temo. Iufoje, kiam mi kun kamaradino eniris la vagonaron elektran en la urbo Djursholm (apud Stockholm), ni en la senhoma¹¹ kupeo ekvidis ion, kio igis nin larĝe malfermi la okulojn. Sur benko, apud sako plenplena¹² de gazetoj kaj ĵurnaloj, staris cilindroj¹³ el moneroj, ĉiu speco aparte. Jes, sub la bela amaseto da arĝentaj “dukronoj”¹⁴ eĉ vidiĝis kelkaj bankbiletoj.¹⁵ Nun venis la konduktoro. Ni iomete ŝercis pri la granda tento, kaj li diris, ke la “gazetknabo” sidas en alia kupeo kaj trankvile babilas kun vojaĝanto. Kiam ni eliris el la vagono, li ankoraŭ ne estis reveninta.

Mi nun multe laŭdis mian popolon. Jes, mi amas ĝin, sed mi amas ĉiujn naciojn; ĉie ekzistas homoj kun grandaj, bonaj ideoj, kun vasta animo kaj koro noblega, ĉiu popolo povas lerni de la aliaj.—Se mi ne estus nur sensperta,¹⁶ malsaĝa knabino! Se mi povus ion bonan fari! Mi estas birdeto kun lamaj flugiloj, mi volus alten¹⁷ flugi sed ne povas....

Nun, por la nova jaro—ĝojon kaj feliĉon al vi!

Via fidela amikino

Barbro

¹al/met/i, to attach (lit.: put onto) ²el/tond/aĵ/o, a clipping ³gastos iun = estos gasto ĉe iu ⁴ĉiu/spec/a/j, of all kinds ⁵ĉia/okaz/e, in all (kinds of) cases, in any event ⁶mir/ig/is, astonished, amazed ⁷kiom oni volas, as much as one wishes ⁸laŭ la karto, à la carte

⁹sam/land/an/o, compatriot, countryman ¹⁰leter/kest/o, mailbox

¹¹sen/hom/a, empty (of people) ¹²plen/plen/a, chock-full

¹³cilindroj, cylinders, stacks ¹⁴du/kron/o, 2-crown piece (Swedish coin) ¹⁵bank/bilet/o = banknoto ¹⁶sen/spert/a, inexperienced

¹⁷alt/e/n, into the heights

24. Du Poemoj

(By L. L. Zamenhof)

Pluvo

Pluvas kaj pluvas kaj pluvas kaj pluvas
Senĉese,¹ senfine,² senhalte,³
El ĉiel' al la ter', el ĉiel' al la ter'
Are⁴ gutoj frapiĝas⁵ resalte.⁶

Tra la sonoj de l' pluvo al mia orelo
Murmurado penetras mistera,⁷
Mi revante aŭskultas, mi volus kompreni,
Kion diras la voĉo aera.

Kvazaŭ la sopir' en la voĉo kaŝiĝas⁸
Kaj aŭdiĝas⁹ en ĝi rememoro¹⁰...
Kaj per sento plej stranga, malĝoja kaj ĝoja,
En mi batas konfuze la koro.

Ĉu la nuboj pasintaj, jam ofte viditaj,
Rememore¹¹ en mi reviviĝis,¹²
Aŭ mi revas pri l' sun', kiu baldaŭ aperos,
Kvankam ĝi en la nuboj kaŝiĝis?

Mi ne volas esplori la senton misteran,
Mi nur revas, mi ĝuas, mi spiras;
Ion freŝan mi sentas, la freŝo min logas,
Al la freŝo la koro min tiras.

Ho, Mia Kor'

Ho, mia kor', ne batu maltrankvile,
El mia brusto nun ne saltu for!
Jam teni min ne povas mi facile,
Ho, mia kor'!

Ho, mia kor'! Post longa laborado
Ĉu mi ne venkos en decida¹³ hor'!
Sufiĉe! Trankviliĝu de l' batado,
Ho, mia kor'!

¹sen/ĉes/e, ceaselessly ²sen/fin/e, endlessly ³sen/halt/e, without
stopping ⁴ar/e = en aroj ⁵frap/iĝ/i, to strike (intr.) ⁶re/salt/i, to jump
back, rebound ⁷= penetras mistera murmurado ⁸kaŝ/iĝ/i, to hide
(intr.) ⁹aŭd/iĝ/i, to be heard ¹⁰re/memor/o, recollection ¹¹re/memor/e
= en rememoro ¹²re/viv/iĝ/i, return to life, be resurrected
¹³decid/a, decisive

D-ro Zamenhof en 1887



25. Trans la Lingvaj Barilojn—VI

Valencio, Hispanujo, 9 januaro

Ni alvenis per la ŝipo “Ciudad de Ibiza,” je 7:30 atm., la 1-an de januaro. Tagmeze ni renkontis S-ron Tudela, UEA-delegiton, kaj li akompanis nin dum du horoj, al la centro de la urbo kaj al la nova stadio kie oni ludas la nacia ludon, piedpilkon.¹ La bela, moderna stadio kapablas enteni² sesdek mil personojn. Vespere Bonnie kaj mi vizitis tipan valencian restoracion kie ni manĝis la valencian manĝaĵon *paella*, bongustegan manĝaĵon el rizo, rostita kokino,³ artiŝokaj koroj, helikoj kaj spicoj. Per helpo de botelo da vino, ni manĝis grandan kaserolon da *paella*.

La sekvantajn tagon D-ro Herrero venis por bonvenigi⁴ nin al la bela urbo Valencio. Li estas prezidanto de la Hispana Esperanto-Federacio, tre vigla, sperta Esperantisto. En lia aŭtomobilo, inter liaj vizitoj al klientoj kaj pacientoj, ni interparolis Esperante kaj li montris al ni vidindaĵojn en la urbo.



Ĵaŭdon ni translokiĝis⁵ al la hotelo Munich, rekomendita de D-ro Herrero ĉar nia alia restloko⁶ estis malkomforta. Matene, S-ro Tudela akompanis nin al la banko por traduki por ni pri monaj aferoj. Posttagmeze ni iris al la hejmo de D-ro Herrero, kie ni renkontis lian edzinon, kiu estas studanta Esperanton, kaj ilian sepjaran filinon.

La sekvantan tagon D-ro Herrero gvidis nin, aŭtomobile, al la kamparo por montri al ni vilaĝon kie la domoj estas subteraj.⁷ La vilaĝanoj loĝas en domoj fositaj el la malmola tero; tre komfortaj, vastaj kaj puraj hejmoj. Ni trinkis vinon en trinkejo konstruita per la sama metodo kiel la domoj, kaj ankaŭ ĝi estis vasta, tre pura ejo. Ĉi tiu vilaĝo, Paternia, enhavas proksimume mil subterajn domojn. Laŭvide⁸ ĝi konsistas el nur fosaĵoj⁹ por la enirejoj kaj blankaj kamentuboj¹⁰ por ventoli la domojn.

Sabaton okazis la kunveno de la valencia Esperanto-grupo, ĉe kafejo en la centra parto de la urbo. Tie ni renkontis kelkajn valencianjn esperantistojn, kiuj demandis al ni pri niaj urbo kaj lando kaj pri la Esperanta movado en San Diego. Je la sesa okazis radio-programo kaj dum duonhoron D-ro Herrero faris demandojn kaj ni parolis pri nia vojaĝo en Eŭropo. Estis bona propagando por Esperanto ĉar pli ol ses aŭ sep mil personoj aŭdis pri Esperanto per la radio. Post la programo S-ro Ernesto Hurtado gvidis nin al la ĉefa placo por rigardi paradon. Estis la Tago de la Tri Reĝoj,¹¹ kaj multaj infanoj estis laŭlonge de la stratoj kiam la longa procesio pasis. En Hispanujo la infanoj ricevas multajn donacojn je la 6a de januaro, la Tago de la Tri Reĝoj, anstataŭ je Kristnasko.

Valencio, Hispanujo, 17 januaro

Trifoje semajne D-ro Herrero gvidas Esperantan kurson ĉe la universitato dum la vespero. Merkredon ni vizitis la klason por renkonti la gestudentojn, kaj mi feliĉe rimarkis ke la plimulto el la tridek studentoj estas junaj, ĉar la estonteco de la movado estas ĉe la gejunuloj.¹² S-ano

¹pied/pilk/o = futbalo ²en/ten/i, to hold, contain ³kok/in/o, chicken
⁴bon/ven/ig/i, to welcome ⁵trans/lok/iĝ/i, to move, change residence
⁶rest/lok/o, place to stay ⁷sub/ter/a, underground ⁸laŭ/vid/e, according to appearance, as far as can be seen ⁹fos/aĵ/o, excavation, pit
¹⁰kamen/tub/o, chimney, "stack" ¹¹Three Kings Day, Epiphany
¹²estas ĉe la gejunuloj, belongs to (depends upon, is closely connected with) the youth (see below)

Herrero komencis la kurson antaŭ monato kaj duono, kaj jam kelkaj studentoj povis paroli kun ni post la klaso.

Dimanĉon ni iris kun Ges-roj Ernest Hurtado al ilia domo por trinki kafon kaj babiladi Esperante. Ni manĝis nuksojn kaj kukojn kaj provis vinon nomitan "Verda Stelo." Sur la enhavmarko¹³ de la botelo oni uzas nur nian lingvon. Tiam mi promenis al la domo de iliaj parencoj, kie ni renkontis afablajn geedzojn kiuj estas la fratino kaj bofrato de S-ino Hurtado. Ŝia bofrato ne povis paroli Esperanton, sed li studis la anglan lingvon dum kvin jaroj, kaj li provis interparoli kun mi angle. Ni ne povis interkompreniĝi, ĉar li ĉiam uzis la malĝustajn vortojn kaj li ne komprenis min eĉ kiam mi estis parolanta malrapide. Kvankam S-ino Hurtado lernis Esperanton antaŭ nur dek monatoj, ŝi helpis nin kiel tradukistino, per Esperanto. Por mi ĉi tiu okazaĵo estis, denove, pruvo ke Esperanto estas multe pli facila ol la naciaj lingvoj.

Kvin geesperantistoj venis al la aŭtobushaltejo¹⁴ por adiaŭi nin merkredon, je la deka kaj duono matene. Kiam la aŭtobuso estis foriranta de la haltejo ni bedaŭre mansignis¹⁵ al la kvin bonaj geesperantistoj, kiuj estis kvazaŭ niaj parencoj dum la restado en Valencio.

(Finota)

¹³en/hav/mark/o, label ¹⁴aŭtobus/halt/ej/o, bus stop

¹⁵man/sign/i, to wave

ĈE

Ĉe indicates a close relationship in place or time: **ĉe la tablo**, at the table; **ĉe mia onklo**, at my uncle's (house); **ĉe vi**, with you, at your house, in your country, etc.; **Ĉe la romanoj, oni faras tion alie**, With the Romans, that is done differently; **Venu ĉe ni morgaŭ**, Come to our house tomorrow; **ĉe nia foriro**, upon our departure; **ĉe la sunsubiro**, at sunset; **ĉe enlitigo**, upon going to bed.

Ĉe also indicates close relationships of more subtle kinds: **dormi ĉe malfermitaj fenestroj**, to sleep with the windows open; **koro ĉe koro**, heart to heart; **brako ĉe brako**, arm in arm; **La estonteco estas ĉe la gejunuloj**, The future is in the hands of the young people.

26. Barbro kaj Eriko—IX

Hohenberg, la 10-an de januaro

Kara Barbro,

Unue multan dankon pro via bildo kaj la interesa gazeto. Vi estas bela, ĉarma knabino.

Ofte mi legis vian interesan leteron, en kiu vi rakontis multe pri via bela nordlando kaj pri viaj kutimoj. Mi tre dankas, amikino.

Malvarma vintro estas en nia montaro, blanka nun estas la koloro de nia urbeto. Blanka drapego¹ kuŝas malsupre de blua ĉielo.

Estas tempo de sporto.

Ofte ni toboganas. Infanoj kaj plenkreskuloj.² Malrapide ni tiras monten la toboganon, sed la peno rekompenciĝas: de la altaĵo de iu deklivo ni rapidegas malsupren. Kelkfoje la tobogano de iu mallertulo renversiĝas,³ li ruliĝas en neĝo, li aspektas kiel neĝhomo.⁴ Ĉu vi volas glitveturi kun mi malsupren de la deklivoj?

Neĝhomojn konstruas infanoj en kortoj, ĝardenoj.⁵ Rigardu sur ĉi-kuna bildeto, kiel malĝoja li estas. Liaj okuloj estas karboj, lia nazo ligneto, en sia buŝo li havas malgrandan pipon malnovan. Lian kapon kovras malnova ĉapelo, en la mano⁶ granda bastono minacas. Ĉu via infanaro ankaŭ konas similajn amuzojn?

La knaboj ankaŭ ŝatas neĝbuli.⁷ Tiamaniere⁸ ili ofte militas en du partioj, tiel longe, ĝis unu serĉas savon en la fuĝo.⁹ Malbonaj kavaliroj ofte ankaŭ knabinojn pritraktas¹⁰ per neĝbuloj.¹¹

Plezuro por mal- kaj junularo¹² estas ankaŭ skiado. Preskaŭ ĉiu infano, preskaŭ ĉiu Hohenbergano estas skiisto. Multaj deklivoj ja donas la plej

¹**drap/eg/o**, heavy woollen cloth ²**plen/kresk/ul/o**, grown-up
³**renvers/iĝ/i**, to turn over ⁴**neĝ/hom/o**, snowman ⁵**kortoj, ĝardenoj**, yards (see below) ⁶**en la mano**, in his hand (see below) ⁷**neĝ/bul/i**, to throw (or play with) snowballs ⁸**tia/manier/e**, in that way ⁹**tiel longe...fuĝo**, until one (side) seeks salvation in flight ¹⁰**pri/trakt/i**, to treat, act toward ¹¹**ankaŭ...neĝbuloj**, give girls the snowball treatment, too ¹²**mal- kaj junularo** = **maljunularo kaj junularo**, young and old

bonan okazon.¹³ Fremduloj, precipe vienanoj, venas ĉiudimanĉe, por ĝui tiun sporton belegan. Mi mem entuziasme skias.

Sur nia lageto ni ankaŭ glitkuras—do sportemuloj dum la vintro havas multan plezuron.

Dum la Silvestro-vespero, la vespero de la 31-a de decembro, oni amuzas sin, ĵetante fandiĝantan plumbon en malvarman akvon. La plumbo prenas formojn diversajn kaj el tiuj formoj oni volas profeti la estontecon. La imago de la knabinoj vidas dekoraciojn, fianĉinbukedojn¹⁴ kaj la heroojn de iliaj revoj, la imago de junuloj ŝipojn, aeroplanojn kaj belajn fraŭlinojn. Kvankam kelkaj superstiĉaj homoj kredas efektive al¹⁵ similaj antaŭsignoj,¹⁶ la plimulto uzas tiun kutimon kompreneble nur por povi ŝerci kaj ridi.

En la unua de januaro ni deziras al ni¹⁷ bonan novjaron.¹⁸ Ni sendas ankaŭ bondezirbiletojn¹⁹ al niaj konatoj. En kelkaj vilaĝoj malriĉaj geknaboj iras de domo al domo, dirante siajn bondezirojn kaj atendante iun moneron.

La 6-an de januaro ni festas la tagon de la Tri Reĝoj. En kelkaj regionoj maskitaj junuloj, “stelkantantoj,”²⁰ kantas siajn kantojn en ĉiu domo de la vilaĝo....



Nun mi finas. Jam estas noktomezo.

Dormu bone, songû dolçe, malproksima knabino.

Via
Eriko

¹³**Multaj...okazon**, (The fact that there are) many hills, after all, do provide the best kind of opportunity (for that). ¹⁴**fianĉ/in/bukedo**, bridal bouquet ¹⁵**kredi al**, to believe in ¹⁶**antaŭ/sign/o**, portent ¹⁷**ni deziras al ni**, we wish each other ¹⁸**nov/jar/o**, New Year ¹⁹**bon/dezir/bilet/o**, greeting card (**bon/dezir/o/j**, good wishes) ²⁰**stel/kant/ant/o**, star-singer (refers to the star which led the Three Kings to Bethlehem)

KORTO—ĜARDENO

These words have their European sense. **Korto** (court) is an open area surrounded by walls or buildings. **Ĝardeno** (garden) is an open place where growing things are cultivated for food or beauty. The American “yard” with its lawn, shrubs and flowers is usually translated **ĝardeno**. What we call the “lawn” is **gazono** or **razeno**.

Kortego, however, is not always a large courtyard. It is also a royal court—the body of high-ranking persons attending a king or other dignitary. And a **kortumo** is a “high court” of justice with a panel of especially distinguished judges. (Any other court is a **tribunalo**; while a courtroom is a **juĝejo**.)

“EN LA MANO”

Parts of the body and clothing are often mentioned with **la** rather than the possessive, when it is clear from the context who the owner is: **Divenu, kion mi havas en la mano**, Guess what I have in my hand; **Forigu la ĉapelon antaŭ sinjorino**, Take your hat off in front of a lady.

27. La Neĝbulo

(By Johan Hammond Rosbach, in *Norda Prismo*.)

La urbeto vekigis¹ kaj trovis kun surprizo, ke la nokto kovris ĝin per mola blanka tapiŝo el neĝo. Ĉiuj devis aktivi pli ol kutime tiun matenon. La neĝo kunportis² ne malmulte da kromaj farotaĵoj,³—kaj la tempo estis matene jam tro malabunda. Estis ja dolĉe tiri la lanugan kusenegon⁴ ĝismentone⁵ kaj resti ankoraŭ iomete en la lito, resti en la lito la dek minutojn, kiujn oni intencis uzi por io.

Estas dolĉe tiri la lanugan kusenegon ĝismentone, kaj vere senti, ke oni dormas, konscii, ke oni dormas;—sed post heroa decido oni ĵetas la kusenegon flanken⁶—kaj la nova tago estas realaĵo. Tiam oni ekvidas, ke multe da neĝo falis dum la nokto.

Vigliĝas ĉiudome. Oni devas balai ŝtuparojn,⁷ oni devas fari irvojetojn⁸ al la hejtlignejo⁹ kaj al la necesejo,¹⁰ sed kie estas la neĝoŝovelilo—kien oni metis ĝin pasintjare?¹¹ Kaj kie estas la balailo, kiu ankoraŭ hieraŭ staris en la ilarejo¹² sub la ŝtuparo?

En la tuta urbeto regis vigla tempomanko, kaj multaj rapidegis al la laborejo tiun matenon. Cetere oni povis iri nur pene,¹³ ĉar la neĝo atingis ĝis la genuoj, kaj kie la vento amasigis¹⁴ la neĝon, estis preskaŭ neeble travadi. Sed travadi oni ja devis.

Vestita per gabardina pantalono kaj krurvindaĵoj,¹⁵ Rektoro Tander aperis en la lernejo. Kaj tio estis tre komika. Ĉar Rektoro Tander estis solena sinjoro, kiu alte taksis sian dignon. Li ne havis longan vojon de sia hejmo al la lernejo, kaj tiun matenon li atendis, ĝis la sonorilo¹⁶ vokis al la unua leciono. Estis ja ankoraŭ mallume, sed por lia digno estus neri-parebla¹⁷ damaĝo, se iu el la gelernantoj ekvidus lin trapenetri la neĝamasojn de la strato—vestitan per krurvindaĵoj kaj gabardina pantalono. Estis pli bone surprizi la klason, veni tri minutojn tro malfrue al la leciono, scii, ke la gelernantoj estas ĉe siaj pupitroj, silente okupitaj¹⁸ de kroma tralegado¹⁹ de la pitagora teoremo²⁰—kio certe estas necesa—kaj tiam paŝi en la klason, sur la katedron, sciante, ke ĉiuj samtempe ekvidos, ke rektoro Tander hodiaŭ surhavas gabardinan pantalonon kaj krurvindaĵojn.

Rektoro Tander petis la gelernantojn eksidi.

“La pitagora teoremo, Rolf!”

Rolf ekstaris. Ĉiuj aliaj sentis grandan senŝarĝiĝon.²¹ Ne estis ŝerco,

kiam Kalle* ekzamenis. Estis kvazaŭ inkubo. Kalle estis tirano—iam oni eĉ provis bapti lin Nero, sed tio ne daŭris longe. Kalle estis bona, malnova nomo, kiun konis ĉiu.

Rektoro Carl Tander estis tre kontenta pri si mem tiun matenon. Li denove venkis. Li estis forta, la malvarma, la malmola. Li povis hodiaŭ permesi al si esti ŝercema.²² Kaj kiam Kalle estis ŝercema, la klaso estis plena de danko pri tio, ke²³ li moŝte²⁴ komplezis²⁵ ŝerci, komplezis montri, ke en li malgraŭ ĉio estis eta kvanto da homeco,²⁶ kiun la malvarmo kaj la malmolo ne kovris kaj mortigis.

“Nu, Rolf, la pitagora teoremo!”

Rolf tre malbone fartis. Li ruĝiĝis. Li sciis eĉ ne unu vorton.

“La pitagora teoremo, Rolf? Ĉu ni ne konas la teoremon de la granda filozofo?”

Rolf senesperigis.²⁷

“Nu, ĉu ni ne havis tri kromajn minutojn por rigardi la pitagoran teoremon, antaŭ ol la rektoro venis hodiaŭ?”

Rolf ne povis plu elteni²⁸ la rigardon de la rektoro. Li rigardis tra la fenestro—la neĝo ĉie blanke tentis, kaj tagiĝis²⁹ jam.

¹vek/iĝ/i, to wake up ²kun/port/is, brought with it ³far/ot/aĵ/o, thing to be done, chore ⁴kusen/eg/o, a thick comforter used as a bed covering ⁵ĝis/menton/e, up to the chin ⁶flank/e/n, aside ⁷ŝtup/ar/o, stairs ⁸ir/voj/et/o, path ⁹hejt/lign/ej/o, woodpile ¹⁰neces/ej/o, toilet, privy ¹¹pas/int/jar/e, last year ¹²il/ar/ej/o, tool closet ¹³pen/e, with difficulty ¹⁴amas/ig/i, to pile up ¹⁵krur/vind/aĵ/o/j, leggings, gaiters ¹⁶sonor/il/o, bell ¹⁷ne/ripar/eb/a, irreparable ¹⁸okup/it/a, occupied, busy ¹⁹tra/leg/i, to read through, peruse ²⁰pitagora teoremo, Pythagorean theorem (law of right-angle triangles) ²¹sen/ŝarĝ/iĝ/o, relief ²²ŝerc/em/a, witty ²³pri tio, ke, for the fact that ²⁴moŝt/o, a person of high rank (see below) ²⁵moŝt/e komplez/is, condescended (did a favor in the manner of a very lofty person) ²⁶hom/ec/o, humanity, human-ness ²⁷sen/esper/iĝ/i, to lose hope, despair ²⁸el/ten/i, to hold out, withstand ²⁹tag/iĝ/i, to become day(light)

*Kalle: short for Carl, i.e., “Charlie” in Norwegian. The students’ use of the rector’s pet name was a mark of disrespect.

“Ke ni estu tie,³⁰ Rolf! La pitagoran teoremon ni ne povas lerni, sed rigardi tra la fenestro kaj revii pri neĝviroj kaj amuzo, tion ni povas!³¹ Ho! Tie ni devus esti, Rolf!”

Kaj rektoro Carl Tander rigardis la klason kun la vizaĝesprimoj, kiuj ĉiuj tiel bone konis, la vizaĝesprimon, kiu signifis, ke oni ridu pri la amuzaĵo,³² kiun la rektoro diris. La klaso ridis laŭdeve.³³

Sidigu vin, Rolf! Ni scias la rekompencan por prezentado kiel la via. Ni devus nun koncentri nin!”³⁴

La leciono malrapide limakis³⁵ al sia fino. Ne estas kredeble,³⁶ ke 45 minutoj povas esti tiom longaj. Sed fine sonoris. Estis kvazaŭ liberiĝo, kiam oni venis sur la lernejan korton.



Paolo Bona / Shutterstock, Inc.

La ĉevala neĝplugilo³⁷ preterpasis³⁸ sur la strato. Kaj la pedelo de la lernejo faris vojeton sur la korto. Dum la tago li devis forigi la neĝon de la korto, sed provizore plej bezoniĝis vojetoj, kie la inspektanta instruisto iru tien kaj reen³⁹ dum la paŭzo. Feliĉe la lernantoj piedpremis⁴⁰ la neĝon dum la antaŭtagmezo, kaj tiel grave faciligis⁴¹ la laboron por la pedelo, ĉar la premitan neĝon li ja ne bezonis forigi. Sed la vojeto devis esti preta. Espereble “la maljunulo” ne venos sur la korton almenaŭ en la unua paŭzo. Feliĉe ne, ĉar jen Arsell. Neniu danĝero, dum inspektas lektoro⁴² Arsell!

Lektoro W. H. Arsell estis la plej populara persono en la lernejo. Li staris momenton sur la ŝtuparo, antaŭ ol iri sur la korton. Kun la manoj en la surtutaj poŝoj li staris tie, kun petola rideto sur la buŝo, kaj certe iu ŝerca rimarko—la pedelo ŝatus aŭdi tion; li vidis laŭ la vizaĝoj de la lernantoj, ke lektoro Arsell diris ion amuzan. Certe ion duone ironian! Jen li malsupreniris. La knabaro cedis. Certe tiel la maro ambaŭflanken cedis antaŭ Moseo, pensis la pedelo. Kiom da diferenco inter Arsell kaj la “maljunulo”! Kompreneble la lernantoj flanken cedas ankaŭ antaŭ “la maljunulo,” ili ne kuraĝus⁴³ ne cedi. Ili timas lin. Sed kio gravas, estas, ke la lernantoj ne timas lektoron Arsell—kaj tamen flanken cedas! Tamen Arsell certe ne koleriĝus,⁴⁴ se ili ne estus cedintaj!

Lektoro Arsell haltis kaj babiletis kun la pedelo—multe da kroma laboro pro tiu neĝo, vi devus igi la ĉevalan neĝplugilon fari viziton ankaŭ sur la lerneja korto! Kaj Arsell pluen iris, ankoraŭ kun la petola rideto sur la buŝo.

Neĝbulo siblis tra la aero. Ĝi ne estis malmola, sed ĝi trafis lektoron Arsell sur la brusto. Ĝi lasis blankan makulon sur la nigra surtuto de la lektoro.

Estis malpermesite ĵeti neĝbulojn sur la lerneja korto. La rektoro antaŭ du tagoj severe instrukciis pri tio en ĉiuj klasoj. La lernejo havas la respondecon, se ies okulo estos trafita de neĝbulo—aŭ se iu fenestro

³⁰**Ke ni estu tie!** (Oh) that we were there! ³¹**tion ni povas,** that we can (do) ³²**amuz/aĵ/o,** funny thing ³³**laŭ/dev/e,** obediently ³⁴**koncentri sin,** to concentrate ³⁵**limak/i,** to go at a snail’s pace ³⁶**kred/abl/e,** believable ³⁷**ĉeval/a neĝ/plug/il/o,** horse-drawn snowplow ³⁸**preter/pas/i,** to pass by ³⁹**tie/n kaj re/e/n,** back and forth ⁴⁰**pied/prem/i,** to tread down ⁴¹**facil/ig/i,** to facilitate ⁴²**lektor/o:** a professional title ⁴³**ili ne kuraĝus,** they wouldn’t dare ⁴⁴**koler/iĝ/i,** to get angry

estos frakasita. La lernejo havos la kulpon. Estis severe malpermesite ĵeti neĝbulojn.

Jen la rektoro staris malantaŭ sia kurteno, kaj vidis, kio okazas sur la korto. Li vidis la neĝbulon. Li ankaŭ vidis, kiu ĵetis ĝin. Kaj li vidis, ke lektoro Arsell ne povis vidi, kiu estas la pekinto. Rektoro Tander ĝojegis. Li ne ŝatis, ke Arsell estas tiel populara, kaj ke li malgraŭ sia malsevero estas tiel respektata de la lernantoj. Neniam okazis pekoj kontraŭ la disciplino en la lecionoj de lektoro Arsell. Ankaŭ ne, kiam li inspektas dum la paŭzoj. Fakte la rektoro sentis, ke tio okazis tute hazarde,—estas ja ŝatinda knabo, tiu, kiu ĵetis, knabo, kiun oni dum tri jaroj povis nur laŭdi. Domaĝe, ke tiun neĝbulon hazarde ĵetis ĝuste li!⁴⁵ Aŭ eble tamen ne domaĝe—fakte estis feliĉa hazardo, ĉar nun lektoro Arsell devos solvi la aferon; lektoro Arsell devos zorgi, ke la knabo ricevos sian punon. Tio ja estas evidenta rompo de la respekto, la reputacio de la lernejo suferas, kiam tia afero okazas. Tian aferon oni nepre riproĉu.⁴⁶ La rektoro ĝojegis. Estos interese vidi, kiel lektoro Arsell reagos⁴⁷ al tio; kiel li eltrovos,⁴⁸ kiu estas la pekinto.

Lektoro Arsell malrapide turnis sin, liaj manoj ankoraŭ estis en la surtutaj poŝoj, kaj li aspektis tre petola. Li rigardis ĉiujn knabojn, kiuj staris en la neĝamaso, ĝis super la genuoj en la neĝo. Unu el la knaboj aspektis tiel kulpita, ke la lektoro tion rimarkis. Li vokis la knabon, kiu tuj venis al li.

La rektoro malantaŭ sia kurteno observis la epizodon. Li rimarkis, kiel sagace Arsell tuj trovis la pekinton.

Kiam la knabo estis proksime al Arsell, la lektoro tre malrapide levis la dekstran manon el la poŝo kaj montris al la neĝmakulo sur sia brusto.

“Forigu!” li mallonge diris. La knabo deprenis⁴⁹ la gantojn, kaj forigis la neĝon de la lektora surtuto.

Tio estis ĉio.

Malantaŭ sia kurteno rektoro Tander terure ĉagreniĝis⁵⁰ pro la efika riproĉo. La reago de lektoro Arsell certe sentiĝis en la konscio de la knabo multe pli ol kiu ajn ordinara puno. Tiom bone la rektoro konis la lernantojn. Kaj precipe tiun ĉi knabon.

Ĉar lektoro Arsell tiel reagis, ne plu ekzistas ia peko kontraŭ la disciplino, raportenda⁵¹ al la rektoro. Malbenite!⁵² Duoble⁵³ malbenite, ĉar tio estis nova venko por lektoro Arsell; lia aŭtoritato ne estis malfortigita, li perdis neniom da digno, kaj en la okuloj de la rektoro li fariĝis⁵⁴ ankoraŭ pli granda psikologo—bedaŭrinde.

Postpaŭze sonoris. La lernantoj rapide vicigis⁵⁵ sin sur la korto. Ankaŭ tio rapide funkcias, kiam Arsell inspektis! La lernantoj bruis en la koridoro ekster la pordo de la rektora oficejo—estis nur unu balailo, kaj ĉiuj bezonis ĝin por forigi la neĝon, antaŭ ol ili supren bruis⁵⁶ en la ŝtuparejo.⁵⁷

Rektoro Tander prenis siajn librojn kaj iris al la dua leciono. Ve al⁵⁸ tiu, kiu ne scios respondi nun!

⁴⁵**ĝuste li**, exactly he, he of all people ⁴⁶**tian aferon...riproĉu**, such a matter one must unfailingly (deal with by a) rebuke ⁴⁷**re/ag/i**, to react ⁴⁸**el/trov/i**, to find out ⁴⁹**de/pren/i**, to take off ⁵⁰**ĉagren/iĝ/is**, was vexed ⁵¹**raport/end/a**, which must be reported (see below) ⁵²**mal/ben/it/e!** damn! ⁵³**du/obl/e**, doubly ⁵⁴**far/iĝ/is**, became ⁵⁵**vic/ig/is si/n**, lined up ⁵⁶**supr/e/n bru/i**, to go noisily up ⁵⁷**ŝtup/ar/ej/o**, stairwell ⁵⁸**ve al**, woe to

MOŜTO

Titles of respect vary so much from country to country, and from one language to another (“your grace,” “your highness,” “your honor,” etc.) that Esperanto has one all-purpose title for all ranks and offices: **Via reĝa moŝto**, Your Royal Highness; **Via juĝista moŝto**, Your Honor; **Ŝia reĝina moŝto**, Her Majesty; etc. **Moŝto** applies to any person of importance, in fact: **Li tre moŝte kondutas hodiaŭ**, He’s acting very high and mighty today; **Du moŝtaspektaj sinjoroj atendas en la oficejo**, There are two important-looking gentlemen waiting in the office.

-END

The suffix **end** marks a thing that must be done (compare **ind**, denoting a thing that is worthy of being done): **La pruntita mono estas tuj repagenda**, The borrowed money must be paid back immediately; **Ĉiuj novaĵoj estas raportendaj al la ĵurnaloficejo**, All news items are to be reported to the newspaper office; **Mi havas multajn farendajojn**, I have many tasks that have to be done. (But: **Mi havas multajn farindaĵojn**, I have many tasks that ought to be done.)

-OBL

The suffix **obl** denotes the multiple of a number: **duobla**, double; **triobla**, three-fold, treble; **kvaroble du**, four times two; **Li havas kvinoble pli da mono, ol mi**, He has five times more money than I do; **duobligi**, to double; **multobligi**, to multiply (in quantity); **multobligilo**, a duplicator (office machine).

28. Barbro kaj Eriko—X

Rud en la 2-a de februaro

Amiko, kara amiko,

Pardonu, ke mi dumlonge ne skribis! Mi tamen tre ofte pensis pri vi, kaj kelkfoje mi estis komenconta leteron, sed ĉiam min io malhelpis.

Multon interesan vi rakontis. Per mia imago mi ofte estis ĉe vi, admirante vian belegan regionon kaj partoprenante en viaj plezuroj. Sed, verdire,¹ mi ne scias, ĉu mi kuraĝus konfidi mian vivon al via veturileto.² Ho, kiaj kapturnigaj³ deklivoj! Ĉu vi scipovas⁴ lerte direkti? Ĉu estas tute certe? Mia kateto, kiu nun sidas antaŭ mi sur la blanka skribtablo, deklaras sin preta donaci al mi unu el siaj (laŭdire⁵) naŭ vivoj, sed fidante al via lerteco mi, ĝentile sed nee,⁶ dankas.

Ĝoje mi rimarkas, ke la vintraj plezuroj de via lando tute similas al la svedaj. Ankaŭ ĉi tie la infanoj formas neĝhomojn kaj per neĝbuloj interbatalas. Ankaŭ ni skias, glitveturas (tamen, ne ofte), kaj sur la glacio de niaj multaj riveroj kaj lagoj ni ofte glitkuras.

Kompreneble ni ordinare veturas per aŭto, sed kelkfoje ni glitveturile faras ekskurson—tian, ekzemple, faris mi kaj kelkaj gejunuloj lastan dimanĉon. Gaje ni glitrapidegis sur la landstrato,⁷ tirataj de du ĉevaloj; unu el ili estis nia propra Svarten ("Nigrulo"). La kampoj proksime, la altaĵoj ĉe la horizonto estis de la plej pura blankeco. Arboj rigidis aeren.⁸ Estis malvarme sed refreŝige.⁹

Alveninte ĉe bienulo konata, kaj varmiginte nin bone, ni komencis babili kaj manĝi. Junulo poste ludis violonon kaj ni dancis.

Hejmenveturado¹⁰ dumnokta. Tranĉa malvarmo, sed ĉio bela, belega.
Miaj pensoj flugis. Ankaŭ al vi. Ĉu vi sentis?

Ĉu vi nun estas kontenta kaj pardonas, ke mi tiel longe silentis?
Certe jes, vi pardonis.

Tutkore salutas vin
Barbro

Terura p.s.¹¹ Ĵus la kato faligis¹² de sur la tablo florujojn!¹³ En mil
pecojn ĝi rompiĝis. Ĉimomente¹⁴ mi ne sentas min tiom bestama,¹⁵ kiom
laŭ mia konvinko estas la aŭstroj....

¹**ver/dir/e**, to tell the truth ²**vetur/il/et/o**, little vehicle (refers to the toboggan in 26.) ³**kap/turn/ig/a**, dizzying ⁴**sci/pov/i**, to know how
⁵**laŭ/dir/e**, alleged, according to what people say ⁶**ne/e**, negatively
⁷**land/strat/o**, a major highway below the status of a freeway ⁸**rigid/is aer/e/n**, rose stiffly into the air ⁹**re/freŝ/ig/i**, to refresh ¹⁰= **veturado hejmen** ¹¹**p.s. = post/skrib/o**, postscript ¹²**fal/ig/is**, knocked off
¹³**flor/uj/o**, flower pot, vase ¹⁴**ĉi/moment/e**, at this moment ¹⁵**best/am/a**, animal loving



ajlatan / Shutterstock, Inc.

FORMULA PHRASES

Particularly in rapid conversation, speakers of any language rely very much on set phrases for such purposes as getting attention, introducing a new thought or reasserting an old one, linking or “piggy-backing” their ideas, agreeing or disagreeing with what has been said, etc. A handy, ready supply of these formula phrases will prove invaluable in Esperanto “bull sessions.” The following are adapted, with thanks, from a list published by the American Association of Teachers of Esperanto.

OPENERS (Getting the floor):

Momenton! Just a minute, hold on there!

Ŝajnas al mi, ke... It seems to me that...

Mi opinias, ke... I think that...

Miaopinie,... In my opinion...

Laŭ mi... As far as I’m concerned...

Nu, se vi volas mian konsilon... Well if you want my advice...

ADDING ON (to what has been said):

Mi volus aldoni, ke... I’d like to add that...

Necesas ankaŭ diri, ke... It must also be said that...

Finfine,... When all’s said and done,...

Kiel oni scias,... As you know,...

Evidente,... It’s obvious that...

Male,... Quite the contrary,...

Sed tamen,... However,...

Aliflanke,... On the other hand,...

Kontraŭe,... On the contrary,...

Sekve, do... It follows, then, that...

Nome,... To be precise,...

Efektive,... As a matter of fact,...

Tio estas,... That is,...

Cetere,... Aside from that,...

Krome,... Besides,...

Kio plu estas,... What's more,...

Fakte,... In fact,...

Ekzemple,... For example,...

Malkaŝe, mi kredas, ke... Frankly, I think...

La afero estas, ke... The thing is that...

Plejparte,... For the most part,...

Fundamente,... Basically,...

KEEPING ON (Repeating yourself):

Kiel mi ĵus diris,... As I just said,...

Mi jam rimarkigis, ke... I've already pointed out that...

Mi volas diri,... I mean,...

Indas ripeti, ke... It bears repeating that...

Alivorte,... In other words,...

Mi ankoraŭ kredas, ke... I still think...

Mi nur ripetu, ke... Let me just say again that...

QUESTIONING:

Kion? Kion vi diris? What? What did you say?

Ĉu vi estas certa, ke... Are you sure that...

Kion vi opinias pri... What do you think about...

Pri kio temas? What's this about? What's the point?

Kion vi volas diri? What do you mean?

Kion signifas...? What does...mean?

Ĉu vi ne kredas, ke... Don't you think that...

Ĉu vi iam konsideris... Have you ever considered...

Ĉu vi neniam pripensis... Haven't you ever thought about...

De kie vi havas tiun ideon? Where did you get that idea?

LINKING (to another's statement):

Se mi ĝuste komprenas,... If I understand correctly,...

En tiu rilato, mi supozus... In that connection I would suppose...

En tiu senco oni povus diri... In that sense you could say...

Tio pruvas, ke... That proves (that)...

Simile,... Similarly, by the same token,...

La demando estas... The question is...

Laŭ tiu vidpunkto... According to that point of view...

Parolante pri... Speaking of...

En tiu kazo,... In that case...

En ĉiu kazo... In any case...

DISBELIEF:

Kio(n)?! What?!

Ĉu vere? Really?

Vi ŝercas! You're joking!

Kia blago! You're pulling my leg! You've got to be kidding!

Ridinde! Ridiculous!

Mi dubas pri tio. I doubt that.

AGREEMENT:

Vi (tute) pravas. You're (entirely) right.

Mi konsentas. I agree.

Certe. Certainly.

Ĝuste! Exactly! Right on!

Prave! Right!

Bone. Fine, OK, all right.

Vere. Really.

Kompreneble. Of course.

Konsentite. Agreed.

Mi opinias same. I'm of the same opinion.

Tre povas esti, ke... It's very possible that...

Verŝajne jes. Probably so.

Jes, ja! Yes, indeed!

Tio estas ĝuste kion mi... That's exactly what I...

DISAGREEMENT:

Absolute ne! Absolutely not!

Tute ne! Not at all!

Tio estas idiota (ridinda, sensenca, stulta). That's stupid (ridiculous, nonsense, foolish).

Ne temas pri tio. That's not the point.

Temas pri tio, ke... The point is that...

Ne estas vere, ke... It's not true that...

Eble, sed... Maybe so, but...

La malfacilaĵo estas, ke... The trouble is that...

Vi eraras. You're wrong.

Tio dependas. That depends.

Dependas de tio, ĉu... It depends on whether...

Tio dependas de via vidpunkto. That depends on your viewpoint.

Ne parolu al mi pri... Don't talk to me about...

Ne troigu. Don't exaggerate.

Ne ridigu min. Don't make me laugh.

Kia sensencaĵo! What a bunch of baloney!

Ne eble! Impossible!

Ĉu vi perdis la saĝon? Have you lost your mind?

CHANGING THE SUBJECT:

Parenteze,... By the way,...

Tio memorigas min pri tio, ke... That reminds me that...

29. Pri la Deveno¹ de la Verda Stelo

(From a letter by Dr. Zamenhof to *The British Esperantist* in 1911.)

Karaj sinjoroj! —Pri la deveno de nia verda stelo mi nun jam ne memoras bone. Ŝajnas al mi, ke pri la verda k o l o r² iam atentigis min³ s-ro Geoghegan* kaj de tiu tempo mi komencis eldonadi miajn verkojn kun verda kovrilo (la atentigo estis tute senintenc⁴). Pri unu broŝuro, kiun mi tute hazarde eldonis kun verda kovrilo, li rimarkigis⁵ al mi, ke tio estas la koloro de lia hejmo, Irlando; tiam venis al mi en la kapon,⁶ ke ni povas ja rigardi tiun koloron kiel simbolon de E s p e r o. Pri la kvinpinta stelo, ŝajnas al mi, ke unue ĝin presigis sur sia gramatiko s-ro de Beaufront. Tio plaĉis al mi kaj mi prenis tion kiel signon. Poste per asociado de la ideoj aperis la stelo kun verda koloro.

*R. H. Geoghegan, 1866-1943, the first English-speaking Esperantist

¹de/ven/o, origin ²In some countries, spacing between letters is equivalent to underlining or italicizing words for emphasis. ³atent/ig/is mi/n, brought to my attention ⁴sen/intenc/a, unintentional ⁵rimark/ig/is al mi, made me notice, pointed out ⁶ven/is al mi en la kap/o/n, it came to me

D-ro Zamenhof en 1911 ĉe la Universala Kongreso de Esperanto,
Antwerp, Belgujo



30. Donu al Mi Tempon

(From *Kien la Poezio*, by Brendan Clark)

Donu al mi tempon, ĉionpova¹ Dio,
Por la revon de l' juneco rememori;²
Por inspiri min per freŝa energio,
Por elpensi³ kaj labori—
Aŭ, perdinte ĉiun fidon, novan por ricevi;
Por la revon realigi, kaj denove revii.

Donu al mi tempon, ĉionpova Dio,
Por la virtojn de la homoj elproklami;⁴
Por ĝiskore⁵ koni min, sen iluzio;
Por la malamikon ami.
Antaŭ tiu pordo kiu kaŝas la eternon,
Tempon al mi donu—por lumigi la lucernon.

¹ĉio/n/pov/a, almighty ²Por...rememori = Por rememori la revon de l' juneco ³el/pens/i, to think up, invent (see below) ⁴el/proklam/i, to proclaim to the world ⁵ĝis/kor/e, right to the heart, thoroughly

“EL” AS A PREFIX

Besides its ordinary meaning of “motion outward,” **el-** is used to denote thoroughness: **elpensi**, to think all the way through to a solution, to invent; **ellabori**, to work out (in all details); **eluzi**, to use up, wear out; **ellerni**, to learn thoroughly, to master; **elproklami**, to proclaim to everyone; **Eltrinku!** Bottoms up!

31. Barbro kaj Eriko—XI

Hohenberg, la 16an de februaro

Amikino mia,

Jes, mi estis iomete malgaja, ĉar vi tiel longe ne skribis, sed nun mi ĝojas denove.

Estas tiel bele, havi fidelan amikinon en malproksima lando, al kiu oni pensas oftege kaj kiu same pensas al ni. Amikeco, vera amikeco estas bela, ankaŭ se amikoj estas malkunigitaj de mil kilometroj, se neniam ili povas sin vidi: la spiritoj, la animoj ofte sin trovas. Via korespondado estas senfine ĉarma kaj mi bedaŭregus, se vi finus ĝin iam. Ĉu la nordlandaninoj estas fidelaj?

En la lasta tempo mi ĝojis senbride¹—vi divenas eble la kaŭzon: okazis karnavalo, la festo de l' danco, de la petolemo, de la gajeco.

Mi, transformita en turkon kun kaftano kaj fezo, vizitis balon kaj dancis kun ĉiuj belaj knabinoj. Petolulinoj² tre klopodis instigi min, ke mi rompu mian solenan promeson kaj trinku glason da vino; mi falis en malfavoron³ de kelkaj, ĉar mi obstine rifuzis. “Kiu ne amas vinon, virinon kaj kanton, restas stultulo por ĉiam,” diras germana proverbo. Ĉu mi devas des pli multe ami virinon kaj kanton?

Je la kvara matene la juna turko forlasis sian ĉarman haremon. Baldaŭ li dormis kaj songis, songis, ke li seninterrompe⁴ dancas kun bela juna svedino.

De post kelka tempo mi denove ĉiam⁵ estas en mia ĉambro, preparante min por nova ekzameno, studante precipe literaturon, mondhistorion, legante francajn kaj anglajn romanojn. Mi ŝategas legadon.

Mi tre ŝatus, ofte viziti la teatron. Bedaŭrinde mi havas nek tempon, nek monon, por veturi Vienon, kie estas tre bonaj, mondfamaj aktoroj. Mi devas kontentigi min, aŭskultante en radio teatraĵojn, operojn, koncertojn. Kaj certe ni estas multe pli feliĉaj ol niaj geavoj, kiuj tiun ĝuon, tiun gajigon ne konis. Mi kredas, ke la homaro ĉiam progresas malgraŭ ĉiuj iutempaj⁶ reakcioj, malgraŭ ĉiu mizero. Mi estas optimisto kaj pensas, ke pesimismo ne povas esti eco de esperantisto. Espero estas optimismo, optimismo estas konfido al niaj fortoj, tiu konfido estas savo, progreso.

Mi revas pri la estonteco, mi revas pri la malproksimeco, mi revas pri vi.

Por ĉiam mi restas via

Eriko

¹sen/brid/e, unrestrainedly ²petol/ul/in/o/j, mischievous girls,
 “imps” ³mal/favor/o, disfavor ⁴sen/inter/romp/e, uninterruptedly
 (inter/romp/i, to break in, interrupt) ⁵ĉiam, here: all the time
⁶iu/temp/a, sometime, temporary

PENI, KLOPODI, PROVI

All these words mean “to try” but each has a distinct connotation. **Peni** means “to make an effort.” In **La knabo penas movi la ŝtonegon**, we see him with his shoulder to the boulder, sweating and straining to move it. **Provi** means “to try a thing out, to see if a thing can be done.” In **La knabo provas movi la ŝtonegon**, we see him making a tentative effort to move it, and wonder if he will succeed or fail. **Klopodi** means “to take steps to do a thing,” and **La knabo klopodas movi la ŝtonegon** causes us to imagine him arranging a lever and fulcrum, hiring a crane, petitioning his congressman or taking up a collection to get the job done.

32. Letero pri la Deveno de Esperanto—I

(This 1895 letter from Dr. Zamenhof to N. Borovko tells of the origins of Esperanto.)

Vi demandis min, kiel aperis ĉe mi la ideo krei lingvon internacian kaj kia estis la historio de la lingvo Esperanto de l’¹ momento de ĝia naskiĝo ĝis tiu ĉi tago? La tuta publika historio de la lingvo, t.e.,² komencante de la tago, kiam mi malkaŝe³ eliris⁴ kun ĝi, estas al vi pli-malpli⁵ konata; mi rakontos al vi tial en ĝeneralaj trajtoj sole la historion de la naskiĝo de la lingvo.

¹de l’ = de la ²t.e. = tio estas ³mal/kaŝ/e, openly ⁴el/ir/i, here: to come out, make one’s debut ⁵pli-malpli, more or less

Mi naskiĝis en Bjelistoko, gubernio de Grodno. Tiu ĉi loko de mia naskiĝo kaj de miaj infanaj jaroj donis la direkton al ĉiuj miaj estontaj celadoj. En Bjelistoko la loĝantaro konsistas el kvar diversaj elementoj: Rusoj, Poloj, Germanoj kaj Hebreoj; ĉiu el tiuj ĉi elementoj parolas apartan lingvon kaj neamike rilatas⁶ la aliajn elementojn. En tia urbo pli ol ie la impresema⁷ naturo sentas la multepezan⁸ malfeliĉon de diverslingveco kaj konvinkiĝas ĉe ĉiu paŝo, ke la diverseco de lingvoj estas la sola, aŭ almenaŭ la ĉefa kaŭzo, kiu disigas⁹ la homan familion kaj dividas ĝin en malamikajn partojn. Oni edukadis min kiel idealiston; oni min instruis, ke ĉiuj homoj estas fratoj, kaj dume¹⁰ sur la strato kaj sur la korto, ĉio ĉe ĉiu paŝo igis min senti, ke homoj ne ekzistas: ekzistas sole Rusoj, Poloj, Germanoj, Hebreoj, k.t.p. Tio ĉi ĉiam forte turmentis mian infanan animon, kvankam multaj eble ridetos pri tiu ĉi “doloro pro la mondo” ĉe la infano. Ĉar al mi tiam ŝajnis, ke la “grandaĝaj”¹¹ posedas ian ĉiopovan forton, mi ripetadis al mi, ke kiam mi estos grandaĝa, mi nepre forigos ĉi tiun malbonon.

Iom post iom mi konvinkiĝis, kompreneble, ke ĉio ne fariĝas tiel facile, kiel ĝi prezentiĝas al infano; unu post la alia mi forĵetadis diversajn infanajn utopiojn, kaj nur la revon pri unu homa lingvo mi neniam povis forĵeti. Malklare mi iel min tiris al ĝi kvankam, kompreneble, sen iaj difinitaj¹² planoj. Mi ne memoras kiam, sed en ĉiu okazo¹³ sufiĉe frue, ĉe mi formiĝis la konscio, ke la sola lingvo internacia povas esti nur ia neŭtrala, apartenanta al neniuj el la nun vivantaj nacioj. Kiam el la Bjelistoka reala lernejo¹⁴ (tiam ĝi estis ankoraŭ gimnazio¹⁵) mi transiris¹⁶ en la Varsovian duan klasikan gimnazion, mi dum kelka tempo estis forlogata de¹⁷ la lingvoj antikvaj kaj revis pri tio, ke mi iam veturados¹⁸ en la tuta mondo kaj per flamaj paroloj inklinados la homojn revivigi¹⁹ unu el tiuj ĉi lingvoj por komuna uzado. Poste, mi ne memoras jam kiamaniere, mi venis al firma konvinko, ke tio ĉi estas neebla, kaj mi komencis malklare revi pri nova, arta²⁰ lingvo. Mi ofte tiam komencadis iajn provojn, elpensadis riĉegajn deklinaciojn kaj konjugaciojn, k.t.p. Sed homa lingvo kun sia, kiel ŝajnis al mi, senfina amaso da gramatikaj formoj, kun siaj centoj da miloj da vortoj, per kiuj min timigis la dikaj vortaroj, ŝajnis al mi tiel artifika²¹ kaj kolosa maŝino, ke mi ne unufoje²² diradis al mi: “for la²³ revojn! tiu ĉi laboro ne estas laŭ homaj fortoj,”—kaj tamen mi ĉiam revenadis al mia revo.

Germanan kaj francan lingvojn mi ellernadis en la infaneco, kiam oni ne povas ankoraŭ kompari kaj fari konkludojn; sed kiam, estante en la 5-a klaso de gimnazio, mi komencis ellernadi la lingvon anglan, la sim-

pleco de la gramatiko ĵetiĝis en miajn okulojn, precipe dank' al²⁴ la kruta transiro al ĝi de²⁵ la gramatikoj latina kaj greka. Mi rimarkis tiam, ke la riĉeco de gramatikaj formoj estas nur blinda historia okazo, sed ne estas necesa por la lingvo. Sub tia influo mi komencis serĉi en la lingvo kaj forĵetadi la senbezonaĵojn²⁶ formojn, kaj mi rimarkis, ke la gramatiko ĉiam pli kaj pli degelas en miaj manoj, kaj baldaŭ mi venis al la gramatiko malgranda, kiu okupis sen malutilo²⁷ por la lingvo ne pli ol kelkajn paĝojn. Tiam mi komencis pli serioze fordoniĝadi min²⁸ al mia revo. Sed la grandegulaĵoj²⁹ vortaroj ne lasadis min trankvila.

Unu fojon, kiam mi estis en la 6-a aŭ 7-a klaso de la gimnazio, mi okaze turnis la atenton al la surskribo *Ŝvejcarskaja* (drinkejo), kiun mi jam multajn fojojn vidis, kaj poste al la elpendaĵo³⁰ *Konditorskaja* (Sukeraĵejo). Tiu ĉi *skaja* ekinteresis min kaj montris al mi, ke la sufiksoj donas la eblon el unu vorto fari aliajn vortojn, kiujn oni ne devas aparte ellernadi. Tiu ĉi penso ekposedis min tute, kaj mi subite eksentis la teron sub la piedoj. Sur la terurajn grandegulajn vortarojn falis radio de lumo, kaj ili komencis rapide malgrandiĝi antaŭ miaj okuloj.

“La problemo estas solvita!” diris mi tiam. Mi kaptis la ideon pri sufiksoj kaj komencis multe laboradi en tiu ĉi direkto. Mi komprenis, kian grandan signifon povas havi por la lingvo konscie kreata la plena uzado de tiu forto, kiu en lingvoj naturaj efikas nur parte, blinde, neregule kaj neplene. Mi komencis komparadi vortojn, serĉadi inter ili konstantajn, difinitajn rilatojn, kaj ĉiutage mi forĵetadis el la vortaro novan grandegan serion da vortoj, anstataŭigante³¹ tiun ĉi per unu sufikso, kiu signifas certan

⁶neamike rilatas = havas neamikajn rilatojn al ⁷impres/em/a, impressionable, sensitive ⁸mult/e/pez/a, weighty ⁹dis/ig/as, separates ¹⁰dum/e, meanwhile ¹¹grand/aĝ/a/j, grownups ¹²difinita, definite ¹³en ĉiu okazo, in all events, at any rate ¹⁴reala lernejo, a kind of junior high school (see below) ¹⁵gimnazio, high school (see below) ¹⁶trans/ir/i, to transfer ¹⁷for/log/at/a de, lured away by ¹⁸pri tio, ke mi iam veturados, about sometime traveling (see below) ¹⁹re/viv/ig/i, to revive ²⁰art/a, artificial ²¹artifik/a, sophisticated, complex, “tricky” ²²ne unu/foj/e, more than once (see below) ²³for la, away with ²⁴dank' al, thanks to ²⁵la kruta...de, the steep (i.e., abrupt) transition to it from ²⁶sen/bezon/a, needless ²⁷mal/util/o, detriment ²⁸for/don/iĝ/ad/i mi/n, = fordonadi min ²⁹grand/eg/ul/a, giant ³⁰el/pend/aĵ/o, here: a hanging shop sign ³¹anstataŭ/ig/i, replace

rilaton. Mi rimarkis tiam, ke tre granda amaso da vortoj pure “radikaj”³² (ekzemple “patrino,” “mallarĝa,” “tranĉilo,” k.t.p.) povas esti facile transformitaj en vortojn “formitajn” kaj malaperi el la vortaro. La meĥaniko de la lingvo estis antaŭ mi kvazaŭ sur la manplato,³³ kaj mi nun komencis jam laboradi regule, kun amo kaj espero. Baldaŭ post tio mi jam havis skribitan la tutan gramatikon kaj malgrandan vortaron.

Multe pli frue, kiam mi serĉis kaj elĵetadis ĉion senbezonan el la gramatiko, mi simple “elpensadis” vortojn, penante, ke ili estu kiel eble plej mallongaj kaj ne havu senbezonan nombron da literoj. Sed la provoj montris al mi, ke tiaj elpensitaj vortoj estas tre malfacile ellerneblaj kaj ankoraŭ pli malfacile memoreblaj. Jam tiam mi konvinkiĝis, ke la materialo por la vortaro devas esti romana-germana, ŝanĝita nur tiom, kiom ĝin postulas la reguleco kaj aliaj gravaj kondiĉoj de la lingvo. Estante jam sur tiu ĉi tero, mi baldaŭ rimarkis, ke la nunaj lingvoj posedas grandegan provizon da pretaj vortoj jam internaciaj, kiuj estas konataj al ĉiuj popoloj kaj faras trezoron por estonta lingvo internacia,—kaj mi kompreneble utiligis³⁴ tiun ĉi trezoron.

³²**radik/a**, basic (**radiko**, root) ³³**kvazaŭ sur la manplato**, as though (I held it) on the palm of my hand (**man/plat/o**, palm) ³⁴**util/ig/is**, made use of

REALLERNEJO—GIMNAZIO

The European **gimnazio** is roughly equivalent to American junior and senior high school combined, i.e., grades 6 or 7 through 12. The **klasika gimnazio** in Zamenhof’s day stressed classical languages, art, literature, etc., in preparation for university and an academic career; while the **realgimnazio** prepared one to take up “real” careers in medicine, law, science and the like.

One must be careful about words designating schools as these vary widely from country to country. For example, in some places the “alta lernejo” is not a “high school” at all, but any higher level school for adults; while a “meza lernejo” is generally a high school (and/or middle school) as we know it.

NE UNUFOJE

Be wary of this expression! In *some* countries its meaning is “not (even) once,” but in others it has the opposite meaning: “not (just) once,” that is, many times, “more than once.” You shouldn’t use this expression without making sure the context explains it: **eĉ ne unufoje**, for example, or **pli ol unufoje; ne unufoje, sed ofte**; etc.

PRI TIO, KE....

In English a subordinate clause is often used as the object of a preposition: She asked *about whether I was going to the dance*; I was frightened *by what she told me*. In Esperanto, such construction is not usual and should be avoided by supplying the word **tio** as grammatical object of the preposition, with the subordinate clause explaining what **tio** stands for: **Ŝi demandis pri tio, ĉu mi iros al la balo. Mi ektimis pri tio, kion ŝi diris al mi.**

GERUND PHRASES

In English, a short phrase containing an “-ing” form of a verb is often used much like a subordinate clause or as the subject of a sentence:

1. I dreamt of *traveling about in the world*.
2. Never eat candy after *brushing your teeth*.
3. He questioned me about *talking to that stranger*.
4. *Learning Esperanto* is a good idea.

Technically these “-ing” words are *gerunds*, i.e., verbs used as though they were nouns. There are no gerunds in Esperanto and such sentences must be recast using subordinate clauses:

1. **Mi revis pri tio, ke mi veturados en la mondo.**
2. **Neniam manĝu dolĉaĵojn, post kiam vi brosis la dentojn.**
3. **Li pridemandis min pri tio, ke mi parolis kun tiu fremdulo.**
4. **Lerni Esperanton estas bona ideo.**

33. Letero pri la Deveno de Esperanto—II

En la jaro 1878 la lingvo estis jam pli-malpli preta, kvankam inter la tiama “lingwe uniwersala” kaj la nuna Esperanto estis ankoraŭ granda diferenco. Mi komunikis pri ĝi al miaj kolegoj (mi estis tiam en la 8-a klaso de la gimnazio). La plimulto da ili estis forlogitaj de la ideo kaj de la frapinta¹ ilin neordinara² facileco de la lingvo, kaj komencis ĝin ellernadi. La 5-an de decembro 1878 ni ĉiuj kune solene festis la ekvivigon de la lingvo. Dum tiu ĉi festo estis paroloj en la nova lingvo, kaj ni entuziasme kantis la himnon, kies komencaj vortoj estis la sekvantaj:

*Malamikete de las nacjes
Kadó, kadó, jam temp' está!
La tot' homoze in familje
Konunigare so debá.*

(En la nuna Esperanto tio ĉi signifas: “Malamikeco de la nacioj falu, falu, jam tempo estas! La tuta homaro en familion unuiĝi devas.”)

Sur la tablo, krom la gramatiko kaj vortaro, kuŝis kelkaj tradukoj en la nova lingvo.

Tiel finiĝis la unua periodo de la lingvo. Mi estis tiam ankoraŭ tro juna por eliri publike kun mia laboro, kaj mi decidis atendi ankoraŭ 5-6 jarojn³ kaj dum tiu ĉi tempo zorgeme⁴ elprovi la lingvon kaj plene prilabori ĝin praktike.⁵ Post duonjaro post la festo de la 5-a de decembro ni finis la gimnazian kurson kaj disiris. La estontaj apostoloj de la lingvo provis paroleti pri “nova lingvo” kaj, renkontinte la mokojn de homoj maturaj, ili tuj rapidis malkonfesi⁶ la lingvon, kaj mi restis tute sola. Antaŭvidante⁷ nur mokojn kaj persekutojn, mi decidis kaŝi antaŭ ĉiuj mian laboron. Dum 5 1/2 jaroj de mia estado en la universitato, mi neniam parolis kun iu pri mia afero. Tiu ĉi tempo estis por mi tre malfacila. La kaŝeco turmentis min; devigita zorgeme kaŝadi miajn pensojn kaj planojn, mi preskaŭ nenie estadis, en nenio partoprenis, kaj la plej bela tempo de mia vivo—la jaroj de studento—pasis por mi plej malgaje. Mi provis iafoje⁸ min distri en la societo,⁹ sed sentis min ia fremdulo kaj foriradis, kaj de tempo al tempo faciligadis mian koron per ia versaĵo¹⁰ en la lingvo prilaborata de mi.

Dum ses jaroj mi laboris perfektigante kaj provante la lingvon,—kaj mi havis sufiĉe da laboro, kvankam en la jaro 1878 al mi jam ŝajnis, ke la lingvo estas tute preta. Mi multe tradukadis en mian lingvon, skribis en ĝi verkojn originalajn, kaj vastaj provoj montris al mi, ke tio, kio ŝajnis al mi tute preta teorie, estas ankoraŭ ne preta praktike. Multon mi devis ĉirkaŭhaki,¹¹ anstataŭigi, korekti kaj radike transformi. Vortoj kaj formoj, principoj kaj postuloj puŝis kaj malhelpis¹² unu la alian. Kelkaj formoj, kiuj ŝajnis al mi riĉaĵo, montriĝis¹³ nun en la praktiko senbezona balasto; tiel ekz.¹⁴ mi devis forĵeti kelkajn nebezonaĵojn sufiksojn. En la jaro 1878 al mi ŝajnis, ke estas por la lingvo sufiĉe havi gramatikon kaj vortaron; la multpezecon kaj malgraciecon¹⁵ de la lingvo mi alskribadis¹⁶ nur al tio, ke mi ankoraŭ ne sufiĉe bone ĝin posedas,¹⁷ sed la praktiko ĉiam pli kaj pli konvinkadis min, ke la lingvo bezonas ankoraŭ ian nekapteblan¹⁸ ion, la kunligantan elementon, donantan al la lingvo vivon kaj difinitan, tute formitan spiriton. Mi komencis tiam evitadi laŭvortajn¹⁹ tradukojn el tiu aŭ alia lingvo kaj penis rekte pensi en la lingvo neŭtrala. Poste mi rimarkis, ke la lingvo en miaj manoj ĉesas jam esti senfundamenta ombro de tiu aŭ alia lingvo, kun kiu mi havas la aferon²⁰ en tiu aŭ alia minuto,²¹ kaj ricevas sian propran spiriton, sian propran vivon, la propran difinitan kaj klare esprimitan fizionomion, ne dependantan²² jam de iaj influoj. La parolo fluis jam mem, flekseble,²³ gracie kaj tute libere, kiel la viva patra lingvo.

Mi finis la universitaton kaj komencis mian medicinan praktikon. Nun mi ekpensis jam pri la publika eliro kun mia laboro. Mi pretigis la man-

¹la frapinta...la lingvo = la neordinara facileco de la lingvo (kiu estis) frapinta ilin ²ne/ordinar/a, unusual, out of the ordinary

³ankoraŭ 5-6 jarojn, 5 or 6 more years ⁴zorg/em/e, carefully

⁵praktik/e, in practice ⁶mal/konfes/i, to renounce, disavow

⁷antaŭ/vid/i, to foresee ⁸ia/foj/e, sometimes ⁹soci/et/o, here: social life

¹⁰vers/aj/o, bit of verse ¹¹ĉirkaŭ/hak/i, to trim (shape by cutting around the edges) ¹²mal/help/i, here: conflict with ¹³montr/iĝ/is, showed themselves, turned out to be ¹⁴ekz. = ekzemple, for example

¹⁵mal/graci/ec/o, awkwardness ¹⁶al/skrib/i, to ascribe ¹⁷al tio,

ke...posedas, to my not yet possessing (mastering) it well enough

¹⁸ne/kapt/abl/a, uncapturable, elusive ¹⁹laŭ/vort/a, word-for-word

²⁰havi aferon, to have to do (with) ²¹tiu aŭ alia momento, one moment or another, in any given moment ²²de/pend/i, to depend ²³fleks/abl/e, flexibly

uskripton de mia unua broŝuro (“D-ro Esperanto, Lingvo Internacia, Antaŭparolo kaj Plena Lernolibro”), kaj komencis serĉadi eldonanton. Sed tie ĉi mi la unuan fojon renkontis la maldolĉan praktikon de la vivo, la financan demandon, kun kiu mi poste ankoraŭ multe devis kaj devas forte batali. Dum du jaroj mi vane serĉis eldonanton. Kiam mi jam trovis unu, li dum duonjaro pretigis mian broŝuron por eldono kaj laste²⁴—rifuzis. Fine, post longaj klopodoj, mi prosperis mem eldoni mian unuan broŝuron en julio de la jaro 1887. Mi estis tre ekscitita antaŭ tio ĉi; mi sentis, ke mi staras antaŭ Rubikono kaj ek de la tago, kiam aperos mia broŝuro, mi ne havos plu la eblon reiri; mi sciis, kia sorto atendas kuraciston,²⁵ kiu dependas de la publiko, se tiu ĉi publiko vidas en li fantaziulon,²⁶ homon, kiu sin okupas je “flankaj aferoj”; mi sentis, ke mi metas sur la karton²⁷ la tutan estontan trankvilecon kaj ekzistadon mian kaj de mia familio; sed mi ne povis forlasi la ideon, kiu eniris mian korpon kaj sangon, kaj—mi transiris Rubikonon.

²⁴last/e, at the last ²⁵kurac/ist/o, physician ²⁶fantazi/ul/o, a visionary,
“crank” ²⁷meti sur la karton, to put (risk) on the (turn of a) card

34. Trans la Lingvaj Barilojn—VII

Lisbono, Portugalio, 14 februaro

Ni renkontis esperantiston, hazarde, en la urbo Badajoz, ĉe la landlimo¹ inter Hispanujo kaj Portugalio. Por sciiĝi pri la foriro de la vagonaro al Lisbono, mi eniris hispanan turist-oficejon. Mi alproksimiĝis al viro kaj post rigardo al la verda stelo sur mia jaketo li demandis, “Ĉu vi parolas Esperanton?” Tiam ni interparolis kaj mi demandis pri la vagonaro.

Ni atingis Lisbonon noktmeze kaj iris rekte al la Internacia Hotelo, en la centra parto de la urbo. Oni reklamas ĉi tiun hotelon en la UEA-Jarlibro, kaj ĝi estis bona, komforta restloko por la unua tago de nia restado. La sekvantan tagon mi telefonis al S-ro H. Ferreira, kiu laboras ĉe aŭtomobila firmao, kaj post kelkaj horoj ni renkontiĝis en lia oficejo. Ĉar la hotelo estis tro multekosta por pli ol ununokta restado, laŭ nia buĝeto, ni serĉis novan lokon. Per helpo de S-ano Ferreira kiel interpretisto, ni trovis bonan ĉambron en pensiono kie ni povis dormi kaj manĝi por malalta sumo.

Vespere ni renkontiĝis kun S-ano Ferreira, kaj li montris al ni placon de Komerco, ĉe la rivero, kaj la placon de Pedro la Kvara, en la centra parto de la urbo. Li diris ke antaŭ ducent jaroj okazis granda tertremo,² kiu detruis la plejparton de la urbo, kaj tiam oni rekonstruis ĝin laŭ la sama stilo tra la tuta urbo. Pro tio, Lisbono estas unikaspekta³ urbo en la malnova kvartalo, tre bela kaj vidinda. Kompreneble ankaŭ estas moderna parto, pli granda ol la malnova, kun grandaj, larĝaj avenuoj flankataj de belaj arboj kaj modernaj konstruaĵoj.

Dimanĉe ni renkontiĝis kun José Antunes, ĉefdelegito de UEA en Portugalio. Kun sia ĉarma edzino, li kondukis nin al la urbo Estoril, ĉe la marbordo proksime al Lisbono, kaj al la urbeto Sintra, en la montaro, kie ni vidis kastelojn kaj aliajn interesajn konstruaĵojn, kaj gustumis tipajn lokajn kukojn.

Merkredon vespere okazis kunveno de la geesperantistoj en kafejo nomata “Martinho” ĉe la centra placo de la urbo. Kiam ni alvenis oni kunigis kelkajn tablojn kaj tuj komenciĝis la kunveno. Denove ni renkontis S-anojn Ferreira kaj Martins. Ĉeestis ĉirkaŭ dudek samideanoj, inter ili José dos Reis, malnova kaj bona esperantisto, kaj João Pereira, afabla sinjoro kiu invitis nin viziti la akvarion kie li laboras. Ni interparolis ĝis noktomezo pri la Esperanto-movado en Portugalio kaj Usono.

Madrido, Hispanujo, 20 februaro

La granda ĉefurbo de Hispanujo bonvenigis nin per la esperantistaro kiu gastigis⁴ nin dum kvintaga restado. Tuj post nia alveno ĉe la Hotel Norte mi telefonis S-ron Florencio Enfedaque, la UEA-delegito, kiu venis ĉe ni, kaj ni interparolis dum du horoj en la ripozejo de la hotelo. Ĉar li devis reiri al sia oficejo por labori, ni adiaŭis ĝis la sekvonta tago.

Sabaton S-ano Enfedaque kondukis nin al la hejmo de la prezidanto de la Esperanto-klubo en Madrido, S-ro Angel Figuerola. Li estas blindulo, sed li vivas tute normalan vivon, kun sia familio, kiu konsistas el ses infanoj kaj ĉarma edzino. Li ankaŭ estas profesoro de klaso en la blindlernejo, proksime de lia hejmo. Ni iris kune tien, al granda moderna konstruaĵo kie kvincent blindaj gejunuloj loĝas kaj studas. Por la unua fojo en mia vivo mi vidis la internon de blinda lernejo, la metodojn de instruado kaj vivo de la blindaj gestudentoj, kaj dum la vizito ni renkontis la lernejestron, ankaŭ blindulo, kaj kelkajn instruistojn. Ĉe la

¹land/lim/o, border ²ter/trem/o, earthquake ³unik/aspekt/a unique in appearance ⁴gast/ig/is, entertained

lernejo ankaŭ S-ano Figuerola gvidas Esperanto-kurson, kaj ni renkontis ok komencantojn kiuj aŭskultis malrapidan paroladeton de li.

Post la vizito al la blindlernejo, je la naŭa vespere, ni iris, subterfervoje,⁵ al la klubejo de la Madrida grupo. Tie ĉeestis ĉirkaŭ dudek kvin geesperantistoj kaj dum la tuta kunveno ili faris demandojn al mi kaj Bonnie, pri San Diego kaj nia vivo en Usono.

Oni aranĝis specialan kunvenon mardon, por ke mi povu fari paroladon al la gesamideanoj en Madrido. Ĉeestis la kunvenon proksimume kvindek personoj, inter ili la estro de la oficiala turist-oficejo en Madrido. Li ne estas esperantisto sed li diris ke li venis por aŭdi eksterlandanon paroli Esperanton.

Post la prelego la adiaŭado komenciĝis denove, al multaj Esperantaj geamikoj kiujn ni eble neniam revidos. Feliĉe, neniuj scias pri la estonteco kaj ĝiaj okazaĵoj. Eble ĝi kunportos la eblecon de vojaĝo por ĉiuj kaj tiamaniere niaj multaj amikoj povos viziti nin en San Diego.

FINO

⁵**sub/ter/fer/voj/o**, subway (**fer/voj/o**, railway)

La urbo Madrido, Hispanujo



35. Barbro kaj Eriko—XII

Rud la 7-an de Marto

Amiko,

Nia korespondado donas al mi multan ĝojon, kaj ankaŭ mi forte esperas, ke ĝi daŭros por ĉiam. “Ĉu nordlandaj virinoj estas fidelaj?” vi demandis. Mi kredas, ke jes!¹ Oni ofte laŭdas tion kiel ilian virton, sed ili ofte estas ankaŭ tro kredemaj,² kaj tio certe estas malsaĝa. Pri la sudlandanoj oni diras, ke iliaj sentoj estas fajraj sed ne tre konstantaj. Ĉu vi estas tipa sudlandano?

Kiom gaja devis esti la maskobalo, pri kiu vi rakontis! Se mi nur... Sed, inter tiuj elegante maskitaj belulinoj vi eble ne estus eĉ rimarkinta etan vermlandaninon,³ vestitan per la popolvesto⁴ de nia regiono. (Tiajn vestojn ni tute ne portas ĉiutage, kiel oni kredus laŭ kelkaj turismaj propagandiloj!) Nu, mi devas konfesi, ke pli feliĉa mi legis pri la sonĝo ol pri la balo!

Antaŭ kelkaj tagoj ankaŭ mi dancis. Tri grupoj de esperantistoj kune aranĝis festan kunvenon en Karlstad por soleni la finiĝon de la daŭrigaj kursoj. Estis agrable: oni muzikis, kantis, deklamis spritajn poemojn en Esperanto kaj dancis. “Ĉu oni vere ne manĝis?” vi certe demandas. Jes, maliculo,⁵ ni ankaŭ vespermanĝis.

Vian sopiron je la belbrila Vieno mi bone komprenas. —Nur malofte mi vidas teatraĵon, sed *Peer Gynt* mi vidis. Tre forte ĝi impresis.

Ĉar mi vidas vin tiel diligente leganta por la ekzameno, mi ne plu volas malhelpi vian laboron. Cetere, hodiaŭ mi vidis en la ĉambro de paĉjo—tineon! La printempan militon kontraŭ ĉi tiuj malamikoj mi do tuj komencu!

Tial manpremon kaj—ĝis baldaŭ!

Salutas vin

Barbro

¹**Mi kredas, ke jes**, I think so ²**kred/em/a**, credulous, naive

³**Vermland/o**, Värmland, a district of Sweden ⁴**popol/vest/o**, folk costume ⁵**malic/ul/o**, trouble-maker, rascal

36. Reformo de la Skribado de la Ĉina Lingvo

(By Hujucz, in *El Popola Ĉinio*)

La ĉina ideografio havas historion de pli ol 3300 jaroj. Ĝi ludis gravan rolon en la disvolviĝo¹ de la ĉina kaj eĉ de la orientaziaj kulturoj. Tamen, en la moderna tempo, ĝi montriĝas pli kaj pli maloportuna por respondi al la bezonoj de la epoko. La ĉinaj ideografiaĵoj,² kiuj estas malfacile lerneblaj kaj maloportune uzeblaj, certgrade³ malhelpas al la disvastigo de legscio⁴ kaj la mekanikigo⁵ de skribado (ekzemple, en presarto, maŝinskribado,⁶ telegrafo, ktp.). Dum la lastaj sepdek jaroj, multaj homoj pledis por reformado de la ĉina skriba lingvo, kaj la realigo de tiu ĉi celado komenciĝis nur lastatempe.⁷

Ekzistas du opinioj pri la demando, kiamaniere oni devas reformi la ĉinan skribadon:

Unu estas simpligi la formon de ĉinaj ideografiaĵoj kaj redukti maksimume⁸ la nombron de tiuj ĝenerale uzataj.

La alia estas substitui la nefonetikan ĉinan ideografion per sistemo de fonetika skribo.

Tiuj ĉi du opinioj ne estas reciproke ekskluzivaj, sed devas efektiviĝi paralele. Ĉar en mallonga tempo, la ĉina ideografio kun tiom longa tradicio ne povos esti tuj forĵetita, nek la fonetika skribo de hanlingvo⁹ povos evolui en maturan kaj ĝenerale uzeblan literaturan lingvon. Tial, la taskoj de nia skriba reformo estas: unuflanke la simpligo de la formoj de ideografiaĵoj por fari ilin pli facile uzeblaj surbaze de¹⁰ ilia nuna uzebleco, kaj aliflanke ellabori sistemon de fonetika signado de la hana lingvo, disvastigi ĝin iom post iom de la pozicio de helpilo de la ideografio en estontan ĝenerale uzatan skriban lingvon.

En 1956, la Ŝtata Konsilo¹¹ de Ĉinio publikigis la *Projekton de Simpligo de Ĉinaj Ideografiaĵoj*, kiu simpligis 515 ofte uzatajn ideografiaĵojn kun malsimpla strekaro,¹² kaj 54 bazajn signojn (plejparte tiuj de ideoj uzataj kiel elementoj por konstrui ĉinajn ideografiaĵojn).

Fakte, la formoj de tiuj simpligoj estas plejparte jam longe aplikataj en la manskribado, nur ne rigardataj kiel oficiala skribmaniero. Nun, tiuj simpligitaj skribmanieroj akiris sian "laŭleĝecon."¹³

En 1958, la Tutlanda Kongreso de Popolaj Reprezentantoj sankciis la *Projekton de Fonetika Signado de la Hana Lingvo*, prezentitan de la Ŝtata

Konsilo. Tiu ĉi projekto adoptis latinajn literojn kiel fonetikajn signojn, difinis ilian sonvaloron por signi hanlingvan sonaron, manieron de son-signado kaj la signojn por montri “tonojn.”*

Dum la pasintaj jaroj, en la laboro de likvido de analfabeteco oni utiligis la fonetikan alfabeton en certaj regionoj, por signi la sonon de la ĉinaj ideografiaĵoj, indikante ĝin super la respektivaj ideografiaĵoj.

Krom la hannacio,¹⁴ en Ĉinio vivas ankoraŭ pli ol kvindek nacimalplimultoj.¹⁵ Ili aŭ ne havas skriban lingvon, aŭ¹⁶ havas nur tian kiu ne respondas al la modernaj bezonoj de la epoko. Tial, la *Sistemo de Fonetika Signado de la Hana Lingvo* fariĝis la bazo kaj normo por ellaboro aŭ reformado de ilia skriba lingvo. Pli ol dek nacimalplimultoj jam ellaboris por si projekton de nova skribo en latinaj literoj.

*Laŭ la normo de prononco ekzistas kvar “tonoj,” kiujn oni montras respektive per kvar signoj donitaj sur la vokaloj. Ekzemple: ā (unua tono), á (dua tono), ǎ (tria tono) kaj à (kvara tono).

¹dis/volv/iĝ/o, development (lit., unrolling) ²ideografi/aj/o, a written Chinese character (ideogram) ³cert/grad/e, to a certain degree
⁴leg/sci/o, ability to read ⁵mekanik/ig/o, mechanization
⁶maŝin/skrib/ad/o, typewriting ⁷last/a/temp/e, lately ⁸maksimum/e, here: to the maximum ⁹han/lingv/o, Mandarin, the principle language of China ¹⁰sur/baz/e de = sur la bazo de ¹¹Ŝtata Konsilo, State Council
¹²strek/ar/o, set of strokes ¹³laŭ/leĝ/ec/o, legality
¹⁴han/naci/o, the principal ethnic group of China ¹⁵naci/mal/pli/mult/o, national minority ¹⁶aŭ...aŭ..., either...or... (see below)

AŬ... AŬ..., KAJ... KAJ..., NEK... NEK...

Aŭ... aŭ... means “either... or...”: **Ŝi volas vidi aŭ min aŭ vin en la oficejo tuj**, She wants to see either you or me in the office right away. Similarly, kaj... kaj... means “both... and...”: **Mi promesis, ke kaj mi kaj vi estos tie post kvin minutoj**, I promised both you and I would be there in five minutes. And in the same manner, nek... nek... means “neither... nor...”: **Nek li nek mi scias, kion ŝi celas**, Neither he nor I knows what she’s after.

37. Barbro kaj Eriko—XIII

Hohenberg, la 2-an de Aprilo

Karega amikino,

De longe mi ne skribis, mi estis iomete malsana. Mi havis gripon kiel multaj aliaj.

Marto ne estas agrabla monato en nia montaro. Neĝas, degelas, neĝas denove. Kelkfoje la vetero estas tre bela, kelkfoje frostas sufiĉe. Nur malofte ni povas promenadi, ekskursi.

Sed de post ok tagoj hela suno brilas, hirundoj revenas, kreskas la unuaj floroj. Apud niaj riveroj multaj miozotoj estas troveblaj, kiuj laŭ la germana traduko “Ne-forgesu-min” nomiĝas. Mi sendas al vi tian floron ĉarmetan.

Antaŭ kelkaj tagoj ni festis Paskon.

En Sankta Ĵaŭdo¹ oni finas sonorigi la sonorilojn kaj rakontas al malgrandaj infanoj, ke ĉi tiuj Romon estas flugintaj. Kiam mi estis knabo, mi sidis longtempe sur sojlo de la pordo, por ke mi povu vidi la sonorilojn flugantajn.

Ĝis Sankta Sabato posttagmeze, ĝis la reviviĝo,² klakiloj³ invitas al preĝo. Matene, posttagmeze, vespere knaboj klakante trairas la vilaĝon, dirante samtempe malnovajn kantetojn.

Estas kutimo, kolorigi ovojn dum Pasko. Ruĝaj, bluaj, flavaj kaj verdaj ovoj ĝojigas niajn geknabojn. La etuloj, kiuj kredas, ke Paskoleporo⁴ demetas⁵ la ovojn, serĉas en la ĝardeno nestojn kaŝitajn.

“Eriko, vi ricevis leteron el Svedujo,” diris hieraŭ mia malgranda nevino. —“Kie ĝi estas?”—“Aprilstultulo,⁶ Aprilstultulo!” ŝi kriis.

La unuan Aprilon vi ĉiam devas havi singardon.⁷ Tiam ne fidu al la plej bona amiko—la unua de Aprilo estas la plej granda mokulo.

Tial mi ne skribis la unuan, mi skribis la duan—dum la dua ni denove estas seriozaj.

Adiaŭ, kara amikino, adiaŭ!

Eriko

¹**Sankta Ĵaŭdo**, Maundy Thursday ²**re/viv/iĝ/o**, resurrection (of Jesus on Easter Sunday) ³**klak/il/o/j**, rattles (wooden noisemakers)
⁴**Pask/o/lepor/o**, Easter bunny ⁵**de/met/i**, to lay (eggs)
⁶**April/stult/ul/o**, April fool ⁷**hav/i si/n/gard/o/n**, to take care, look out

38. Pri la “Interna Ideo”

(By L. L. Zamenhof. Excerpts from an address to the Second World Convention of Esperanto, Geneva, 1906.)

Ni ne estas tiel naivaj, kiel pensas pri ni kelkaj personoj: ni ne kredas, ke neŭtrala fundamento faros el la homoj anĝeloj; ni scias tre bone, ke la homoj malbonaj ankaŭ poste restos malbonaj; sed ni kredas, ke komunikiĝado kaj konatiĝado sur neŭtrala fundamento forigos almenaŭ la grandan amason de *tiu*j bestaĵoj¹ kaj krimoj, kiuj estas kaŭzataj ne de malbona volo, sed simple de sinnekonado² kaj de devigata³ sinaltudado.⁴

Nun, kiam en diversaj lokoj de la mondo la batalado inter la gentoj fariĝis tiel kruela, ni, esperantistoj, devas labori pli energie ol iam. Sed por ke nia laborado estu fruktoporta,⁵ ni devas antaŭ ĉio bone klarigi al ni la *internan ideon* de la esperantismo.

Ni ĉiuj scias, kiom estas la esperantismo en rilato *praktika*; ni ankaŭ scias, ke “esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu uzas la lingvon Esperanto, tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas.” Esperantisto sekve estas ne sole tiu persono, kiu revas unuigi per Esperanto la homaron, esperantisto estas ankaŭ tiu persono, kiu uzas Esperanton ekskluzive por celoj praktikaj, esperantisto estas ankaŭ persono, kiu uzas Esperanton por gajni per ĝi monon, esperantisto estas persono, kiu uzas Esperanton nur por amuziĝadi, esperantisto fine⁶ estas eĉ tiu persono, kiu uzas Esperanton

¹**best/aĵ/o**, bestiality ²**si/n/ne/kon/ad/o**, not knowing one another, mutual ignorance ³**dev/ig/at/a**, here: compulsive (**dev/ig/i**, to compel)
⁴**si/n/al/trud/ad/o**, imposing on one another ⁵**frukt/o/port/a**, fruitful
⁶**fin/e**, here: in the final analysis, when all’s said and done

por celoj plej malnoblaj kaj hommalamaj. Sed krom la flanko *praktika*, la esperantismo havas ankoraŭ alian flankon, ne devigan, sed multe pli gravan, flankon *idean*.⁷

Se ni, batalantoj por Esperanto, propravole⁸ donis al la vasta mondo plenan rajton rigardadi Esperanton nur de ĝia flanko praktika kaj uzadi ĝin nur por nia utilo, tio ĉi kompreneble al neniuj donas la rajton postuli, ke ni *ĉiuj* vidu en Esperanto nur aferon praktikan. Bedaŭrinde en la lasta tempo inter la esperantistoj aperis tiaj voĉoj, kiuj diras: "Esperanto estas *nur* lingvo; evitu ligi eĉ tute private la esperantismon kun ia *ideo*, ĉar alie oni pensos, ke ni ĉiuj havas tiun ideon!" Ho, kiaj vortoj! El la timo, ke ni eble ne plaĉos al tiuj personoj, kiuj mem volas uzi Esperanton nur por aferoj praktikaj por ili, ni devas *ĉiuj* elŝiri el nia koro tiun parton de la esperantismo, kiu estas la plej grava, la plej sankta, tiun ideon, kiu estis la ĉefa celo de la afero de Esperanto, kiu estis la stelo, kiu ĉiam gvidadis ĉiujn batalantojn por Esperanto! Ho, ne, ne, neniam! Kun energia protesto ni forĵetas tiun ĉi postulon. Se nin, la unuajn batalantojn por Esperanto, oni devigos, ke ni evitu en nia agado ĉion idean, ni indigne disŝiros kaj bruligos ĉion, kion ni skribis por Esperanto, ni neniigos⁹ kun doloro la laborojn kaj oferojn de nia tuta vivo, ni forĵetos malproksimen la verdan stelon, kiu sidas sur nia brusto, kaj ni ekkrios kun abomeno:

Portretoj de D-ro Zamenhof kun
ekzempleroj de la unua revuo
kaj de la unuaj lernolibroj
(en tri lingvoj)



“Kun *tia* Esperanto, kiu devas servi ekskluzive nur al celoj de komerco kaj praktika utileco, ni volas havi nenion komunan!”

Venos iam la tempo, kiam Esperanto, fariĝinte posedaĵo¹⁰ de la tuta homaro, perdos sian karakteron idean; tiam ĝi fariĝos jam nur lingvo, oni jam ne batalados por ĝi, oni nur tirados el ĝi profiton. Sed nun, kiam preskaŭ ĉiuj esperantistoj estas ankoraŭ ne profitantoj, sed nur batalantoj, ni ĉiuj konscias tre bone, ke al laborado por Esperanto instigas nin ne la penso pri praktika utileco, sed nur la penso pri la sankta, granda kaj grava *ideo*, kiun lingvo internacia en si enhavas. Tiu ĉi ideo—vi ĉiuj sentas ĝin tre bone—estas *frateco* kaj *justeco inter ĉiuj popoloj*.

Se mi la tutan pli bonan parton de mia vivo memvole¹¹ pasigis en grandaj suferoj kaj oferoj kaj ne rezervis por mi eĉ ian rajton de aŭtoreco—ĉu mi faris tion ĉi pro ia praktika utileco? Se la unuaj esperantistoj pacience elmetadis sin¹² ne sole al konstanta mokado, sed eĉ al grandaj oferoj, kaj ekzemple unu malriĉa instruistino longan tempon suferis malsaton, nur por ke ŝi povu ŝpari iom da mono por la propagando de Esperanto—ĉu ili ĉiuj faris tion ĉi pro ia praktika utileco? Ho, ne, ne, ne! Ĉiuj memoris nur pri la interna *ideo* entenata en la esperantismo; ĉiuj ŝatis Esperanton ne tial, ke ĝi alproksimigas¹³ reciproke la *korpojn* de la homoj, eĉ ne tial, ke ĝi alproksimigas la *cerbojn* de la homoj, sed nur tial, ke ĝi alproksimigas iliajn *korojn*.

⁷*ide/a* = *ideala* ⁸*propr/a/vol/e*, voluntarily ⁹*neni/ig/i*, to annihilate
¹⁰*posed/aĵ/o*, property ¹¹*mem/vol/e* = *propravole* ¹²*el/met/ad/is si/n*,
exposed themselves ¹³*al/proksim/ig/i*, to bring close together

SIDI

This word is sometimes used in a figurative sense not found in English: **La deziro al paco sidas en ĉiu homa koro**, The desire for peace lives in every human heart. **La verda stelo sidanta sur via jako identigas vin kiel esperantiston**, The green star you wear on your coat identifies you as an Esperantist. **Via nova kostumo sidas tre bele**, Your new suit hangs very nicely.

39. Barbro kaj Eriko—XIV

Rud la 20-an de la 4-a

Mia frato tre kara,

Ĉu vi volas esti mia bona, malproksima frato? Hodiaŭ du jaroj estas pasintaj de post la morto de Gösta. Dum tiu tempo mi ofte malĝojis, mi perdis tiel bonan kunulon. Zorgema, cedema¹ li estis, kaj ĉiam li volis min protekti. Ni estis tiel forte korligitaj² unu al la alia, kaj nun mi sentas min sola. Estu mia bona frato, kaj ne enuu ĉar hodiaŭ mi skribas kun larmoj.

22.4. Mi devis rompi la skribadon, ĉar neatendite³ venis parencoj el Göteborg, kiuj tranoktis⁴ ĉe ni. Kiom ekĝojis mia parencama paĉjo! Kaj preskaŭ perforte⁵ li volis igi ilin pli longe resti.

Dankon pro la “Ne-forgesu-min”! Ankaŭ ni tiel nomas la miozotojn, kaj—ĉu ne interese?—ankaŭ en nia lando oni trompetas⁶ la 1-an de aprilo.

En la lasta tempo degelis, la neĝo transformiĝis en akvon, kelkfoje



petratrollgrafik / Shutterstock, Inc.

neĝis denove. Aprilo estas tre kaprica monato: pluvos, ridas la suno, pluvos denove. Antaŭ kelkaj tagoj la vera Printempo alvenis. Ho, se mi povus ĝin priskribi al vi, la svedan printempon kun ties delikata ĉarmo! Ĝi vekis tiom da pensoj, tiom da revoj.—

Hieraŭ promenante kun niaj gastoj, mi la unuan fojon ĉijare⁷ aŭdis kukolon. Mi demandis: “Kiam mi edziniĝos?” La respondo estis kvin “ku-ku”-oj; do post kvin jaroj? La direkto de kie aŭdiĝis la krio, indikas kie loĝas la estonta edzo.

Ankaŭ la kokcinelo, la eta, ruĝa skarabo kun nigraj punktoj, servas por doni similajn oraklojn. Knabinoj kaj knaboj metas ĝin sur la mandorson, dirante:

Flugu, forflugu, kokcineleto!

Kie loĝas do mia amat(in)eto?

Longe mi ankoraŭ volus babili, sed estas malfrue, kaj jam frumatene mi devas eklabori. —Ĉu vi nun tute resaniĝis? Mi malĝojis pro via longa silento, kaj paĉjo iom ŝercis pri tio. “La aŭstra knabo certe forgesis vin,” li diris. Mi petas vin, ne donu al li okazon por denove tiel ŝerci!

Korajn salutojn sendas via fratino (?)

Barbro

¹ced/em/a, yielding, accommodating ²kor/lig/it/a, attached, close
³ne/atend/it/e, unexpectedly ⁴tra/nokt/i, to spend the night ⁵per/fort/e,
by force ⁶tromp/et/i, to play little tricks ⁷ĉi/jar/e, this year

40. Lukto Inter Homo kaj Serpento

(By Tibor Sekelj in *Amazonio*, excerpted from *Heroldo de Esperanto*)

Iun posttagmezon, dum ripozo apud rivereto, nur tri kilometrojn for de la indiĝena vilaĝo, mi aŭdis terurajn vekiojn¹ de Mary. Kiam mi alkuris al la loko, kie ŝi estis, mi vidis ŝin plori kun esprimo de granda doloro sur la vizaĝo, kaj teni inter la manoj sian maldekstran piedon, sur kies supra parto estis videbla malgranda, freŝa vundo.

Al la doktorino Rosa kaj mi, kiuj ĉeestis la scenon, ĉio estis klara. Mary volis nudpiede vadi en la rivereto kaj surtretis rajon. Tio estas rombforma² fiŝo, je grandeco de telero, kun longa vosto, kiu finiĝas per venena



injektilo.³ Tiu fiŝo naĝas ne en vertikala pozicio, kiel la ceteraj fiŝoj, sed en horizontala. Tiel ĝi kaŝas sin sur la fundo de la rivero, sub tavolo de koto aŭ sablo, kaj se iu hazarde surtretas ĝin, ĝi kurbigas sian voston kaj injektas sian venenon per ĝi. Tia piko estas ege dolora, kaj multaj kamparanoj, kiuj ne ĝustatempe kuracas la vundon, portas dum la tuta vivo malbelan absceson sur la piedo.

Do estis necese, rapide entrepreni ion. Dum Rosa restis kun Mary, mi kuris ĝis la vilaĝo por alporti iun kontraŭvenenan⁴ serumon el nia portebla apoteko. Alveninte al la vilaĝo, pro la kurado mi estis tiel laca, ke mi devis sendi la serumon per indiana knabo, kaj mi nur poste reiris. Dum unu semajno ni flegis la pacientinon, ĝis ŝi resaniĝis.

Renkonton kun serpentoj ni havis preskaŭ ĉiutage, kaj ni al kutimiĝis esti tre zorgemaj. Eĉ sen pensi ion, la esploristo al kutimiĝas matene, antaŭ ol surmeti la ŝuojn, forte skui ilin, por eligi el ili skorpion aŭ serpenton, kiu tie serĉis tranoktejon. Kiam oni marŝas tra arbaro, samtempe oni devas serĉi serpentojn sur la tero kaj sur la proksimaj branĉoj, kaj havi la tranĉilegon preta por frapo. Plurfoje estis ĝuste tia rapida bato, kiu liberigis nin de danĝero.

Foje mi sidis en la komuna domo de la tuparioj,⁵ kiam alkuris knabo kaj diris, ke mi iru rapide kun li en la arbaron, kie la tribestro Abaito luktas kontraŭ granda serpento. Kune kun la knabo mi alkuris tien, kaj fakte tie staris Abaito, tenante longan bastonon per ambaŭ manoj, luktante kontraŭ boao preskaŭ kvar metrojn longa. La monstro furioze sin ĵetis kontraŭ la indianon, sed ĉi tiu⁶ flankenpuŝis la kapon de la serpento per unu flanko de la bastono, kaj tuj poste per ĝia alia flanko potencan baton li lokis sur la mezan parton de la reptilio. Sed la bastono resaltis, kvazaŭ ĝi estus tuŝinta kaŭĉukon. Nun la serpento realigis rapidan zigzagan movon kaj sukcesis volvi sian voston ĉirkaŭ unu kruron de Abaito, dum ĝia kapo leviĝis alten kaj kun eligita lango minace eksiblis. Estis evidente, ke la bestaĉo⁷ tuj saltos sur sian malamikon.

¹ve/kri/o, wail ²romb-form/a, rhomboid, diamond-shaped ³injekt/il/o, injector (usually: hypodermic syringe) ⁴kontraŭ/venen/a, antivenin

⁵tupari/o/j, tribe of Amazon indians ⁶ĉi tiu, the latter ⁷best/aĉ/o, horrid creature (see -AĈ below)

Mi komprenis, ke vivo aŭ morto estis afero de sekundoj. Mi elprenis mian revolveron el la leda ujo kaj celis la kapon de la serpento. Sed en tiu momento mi aŭdis krion de Abaito:

“Ne enmiksi vin!”

Liaj vortoj vere surprizis min. Mi opiniis, ke li estos feliĉa, kiam mi helpos lin savi sin el tia danĝero. Sed ne estis tiel. La lukto kun la serpento estis afero de lia ĉasista honoro, kiun li tutsole devis finaranĝi⁸ kun la besto.

Kaj nun la serpento saltis. Ĝia malfermita buŝo flugis rekte al la vizaĝo de la homo, kiu ne povis moviĝi, ĉar lian kruron firmtenis la vosto de la serpento. Nur sekundon daŭris la salto; sed ĝi estis sufiĉa, por ke Abaito levu la bastonon kaj enŝovu⁹ en la malfermitan faŭkon.

La bestaĉo mordis la bastonon, kaj Abaito, profitante la momenton premis ĝian kapon per ambaŭ manoj, forlasante la bastonon. La serpento faris grandan fortostreĉon¹⁰ por liberigi sin. Ĝi sukcesis, per sia meza parto ĉirkaŭi la kolon de la indiano kaj, tirante lian kaptitan kruron, faligi lin teren. Nun homo kaj besto ruliĝis konfuze intermiksita. Per lerta movo Abaito sukcesis eltiri sian kapon el la fatala ĉirkaŭpreno.¹¹ Kaj dum la serpento klopodis rehavi sian pozicion, la tribestro glitigis siajn manojn iom pli malsupren kaj nun firme premis ĝian kolon, ĝuste sub la kapo, per ambaŭ manoj.

La reptilio nun forlasis siajn klopodojn sufoki sian viktimon per la maŝo de sia korpo kaj koncentris siajn fortojn en la provo kapti ankaŭ la alian kruron de Abaito per sia vosto. Sed ĉi tiu ne disigis la krurojn kaj poste surtretis ĝian voston.

Raŭka kaj senespera susuro eliĝis el la malfermita buŝego. Sed Abaito, kuŝante surdorse, ŝvitanta kaj malpura, kun sango sur la gambo, alte tenis la kapon de la serpento, premante ĝin per sia tuta forto.

Tiel li kuŝis kelkajn minutojn. La movoj de la reptilio fariĝis pli kaj pli malrapidaj. Subite Abaito leviĝis kaj lasis fali surteren la kadavron de sia malamiko.

Ne ĵetante plu eĉ rigardon sur ĝin, li diris al la junulo, kiu akompanis min: “Senhaŭtigu¹² ĝin! Ĝi estos bona manĝaĵo!”

Efektive ĝi estis bongusta. Sed la lukto estis spektaklo, kiun mi neniam forgesos.

⁸**fin/aranĝ/i**, settle ⁹**en/ŝov/i**, to shove in ¹⁰**fort/o/streĉ/o**, exertion

¹¹**ĉirkaŭ/pren/o**, embrace ¹²**sen/haŭt/ig/i**, to skin

-AĈ

The suffix **aĉ** indicates contempt. It says something is bad—awful, in fact—with respect to its appearance or performance, etc. (If you want to bad-mouth anything, this is the suffix to use.) **Tiu knabaĉo denove ĵetas ŝtonojn**, That brat's throwing stones again. **Bonvenon al mia domaĉo**, Welcome to my hovel. **La bestaĉo saltis sur sian malamikon**, The horrid creature jumped upon its enemy. **Kia virinaĉo ŝi estas!** What a hag she is! **Li nur havis tempon por skribaĉi kelkajn vortojn**, He only had time to scribble a few words. **Nia teamo ludis aĉe hieraŭ vespere**, Our team was (=played) lousy last night.

FI-

Closely related to **aĉ** in meaning is the prefix **fi**, which signifies shame. It says something is bad for moral reasons: **fidomo**, a house of ill repute; **fivirino**, a slut; **fikomercisto**, an unscrupulous businessman; **fiskribo**, graffiti; **fimaljunulo**, a dirty old man.

Fi is also used as an independent word: **Fi al vi**, Shame on you. **Fi! Fi!** Shame! Shame!

GAMBO—KRURO

Both of these words mean “leg.” **Gambo** is the entire leg of a human; **kruro** is the leg of humans or animals, but when applied to humans, correctly refers to the part below the knee. Many Esperantists ignore the distinction, however, and use **kruro** in all cases.


ABOUT PROPER NAMES IN ESPERANTO

There are no hard and fast rules: you can use names in their original form or use the Esperanto versions. And sometimes, you will see names written with Esperanto spelling to reproduce the original form’s approximate pronunciation. In general, Esperanto forms are likely to be used for common first names and the names of well-known places: **Mario**, **Roberto**, **Parizo**, **Nov-Jorko**, **Londono**, etc.

In the selection by Sekelĵ we find several examples. **Amazonio** is Esperanto for Amazonas, the large state in northwestern Brazil. **Mary** is, obviously, the girl’s name in its original form. We can presume that **Abaito**, pronounced according to Esperanto spelling rules, conveys the approximate sound of the chieftain’s name in his native tongue.

In spite of the **a** ending, **Rosa** could be either an original or an Esperanto form. This is because of a growing trend to spell feminine names with **a** endings, to distinguish them from masculine equivalents: **Paŭlo**, Paul; **Paŭla**, Pauline, Paula; or simply because **a** endings for feminine names are very common in Western languages and perhaps “sound” more feminine than **o** endings. In any case both forms are quite common: Eve, **Evo**, **Eva**; Mary, **Mario**, **Maria**; Ann, **Anno**, **Anna**; Martha, **Marto**, **Marta**; Rose, **Rozo**, **Roza**; etc.

There is a complicated grammatical reasoning behind this apparent breach of the rule for noun endings. But it is easier just to think of proper names as somehow exempt from the usual rules. On the other hand, for good comprehension, certain endings—such as the accusative and plural—should be used when called for, even if some device like the hyphen must be resorted to: **La rajo pikis Mary-on**, The ray stung Mary. **Oni kuiris la fiŝosupon laŭ la Manhattan-a maniero**, The chowder was cooked in the Manhattan style. **Kiom da Anna-oj estas en la lernejo?** How many Anna’s are there in the school?



41. Barbro kaj Eriko—XV

Hohenberg, la 5-an de majo

Fratineto tre kara,

Jes, ni estu tre bonaj gefratoj, gefratoj, disigitaj de pli ol mil kilometroj, sed ligitaj per niaj leteroj, per niaj pensoj kaj koroj.

Kiel mi sopiras, ankaŭ vidi iam vian landon, ĝui viajn longegajn tagojn, babili kun vi, fratineto.

Hodiaŭ mi rakontos al vi pri montekskursoj, kiujn mi somere tre ofte faras. Preskaŭ ĉiumonate mi grimpas sur monton. Frumatene mi foriras, kiam la steloj paliĝas, ekvivigante la arbaron. Birdoj kantetas. Floroj ĉirkaŭe sub abioj, pinoj, larikoj kaj fagoj. Alpfloroj sur la tero de la arbaro. Inter ĉiu arbeto en junarbaro¹ mil aranretoj² kun brilantaj rosgutoj.

Maldense nun staras la arboj, baldaŭ sur montherbejoj ni marŝas. Inter rokoj, kriplitaj pinoj, tie kaj tie³ pli granda arbo, distaŭzita de ventegoj. Poste nur rokoj, ŝtonoj—malvarmo, neĝo. Glacio komenciĝas, singarde mi marŝas, ĉar danĝera estas la vojo—la fendoj al multaj personoj jam estis pereoj.

Atinginte la pinton post ege pena grimpado, ni havas mirindan perspektivon trans montojn kaj valojn sur arbarojn, riverojn, stratojn, vilaĝojn kaj urbojn—super ni la blua ĉielo, nuboj malsupre. La plej bela spektaklo en la montaroj estas fulmotondro,⁴ kiun unufoje mi jam povis travivi. Mi ŝategas fulmon kaj tondron. Estas iomete danĝere, sed ĝuste tion mi iom ŝatas.

Mi havas fraton, dek ses jarojn pli aĝa, kiu iam travivis en la montaro aventuron teruran. Veninte kiel juna instruisto el la ebena en la



montaron, li ekskursis, grimpis sola, ludante kun la danĝeroj en juneca facilanimeco.⁵ Venis nebulo, li perdis la vojon. Longajn erarvojojn⁶ irinte, lacega, gratvundita⁷ li klopodis grimpi de roko altega. —Jen falante, jen ĵetiĝante,⁸ rulante dudek aŭ tridek metrojn—arbusto, malgranda arbusto estis la savo. Li ĝin kaptis, ekhaltis—furioza doloro en la piedoj —sango sur la ŝtonoj. Frostotremiga⁹ vidaĵo: unu piedo estis rompita, el la kalkano de la alia la tuta haŭto estis ŝirita. Antaŭ li kapturniga abismo, malantaŭe oblikva ŝtonmuro. Li reen sin trenis unu metron aŭ du, li komencis kriegi. Li kriegis la tutan posttagmezon, la tutan vesperon, sed tro malproksimaj estis homaj loĝejoj. Nur eĥo respondis kaj krioj de cervoj kaj ĉamoj. Ŝtonoj deiĝis¹⁰ sub iliaj paŝoj, falante en kurbo super la malfeliĉulo.

Komenciĝis pluvego. Pluvigis la tutan nokton. Li ĉesigis la kriadon, skribis kelkajn vortojn al la gepatroj, por la morto sin preparante, preskaŭ submetiĝinte¹¹ al sia sorto. Sed la lumo de la mateno denove vekis esperon, denove per ĉiuj fortoj li kriis, multajn horojn li kriis. Dudek horojn post la akcidento ĉasisto aŭdis tiujn helpkriojn, savekspedicio venis. Per ŝnuregoj oni alportis lin en la valon. Longe li ŝvebis inter vivo kaj morto, konstante malpermesante, ke oni amputu la kruron rompitan. Kaj dank' al sia fortega naturo, dank' al sia dudekjara juneco li estis savita, post du operacioj la terura rompiĝo malrapide saniĝis, post unu jaro li marŝis denove. Nun li nur malofte grimpas sur montojn, sed li restis riskema,¹² sentrankvila, ekstravaganca. Li estas nune instruisto en meza lernejo kaj multe vojaĝas dum sia libertempo.

Estas nokto. Mi rigardas la stelojn de la ĉielo kaj kun ĝojo mi pensas, ke ili samtempe lumas ankaŭ super vi, ke vi samtempe ilin vidas. Oni diras, se meteorito falas, oni devas elparoli¹³ deziron kaj tiu realiĝos. Mi ĉiam deziras, ke mi iam povu vin vidi.

Restu mia fidela fratino!

Eriko

¹jun/arb/ar/o, forest of young trees ²arane/ret/o, cobweb ³tie kaj tie, here and there ⁴fulm/o/tondr/o, thunder-and-lightning storm
⁵facil/anim/a, light-hearted ⁶erar/voj/o, the wrong way ⁷grat/vund/o, abrasion (scraping wound) ⁸jet/iĝ/ant/e, plunging ⁹frost/o/trem/ig/a, chilling
¹⁰de/iĝ/is, became dislodged ¹¹sub/met/iĝ/i, to give in
¹²risk/em/a, venturesome, daring ¹³el/parol/i, to pronounce

42. La Postsignoj

(By Julian Kawalec, in *Pola Esperantisto*)

Li arestis ilin sur malriĉa placeto, kie paŝtis sin¹ kaprinoj. Li arestis ilin laŭ modelaj principoj de la arestarto. Li ekkriis: Haltu! Manojn supren! Turnu vin malantaŭen! Falu!...

Tenante la pafilon pafpreta li alpaŝis ilin, ĵetis malŝatan rigardon sur iliajn dorsojn kaj komencis ligi la manojn de la arestitoj per flava kupra drato. La drato ne sufiĉis por ĉiuj, do la manoj de Ludvika li kunligis per forta, nigra laĉo. Poste li kaptadis ĉiun je kolumo² kaj starigadis.³ Li ekkriis: Marŝu! La kapojn malsupren!

Li kondukis la arestitojn antaŭ si en direkto al la konstruoplaco.⁴ La pafilon li havis ĉiam pafpreta. Kondukante la arestitojn tra la senhomigita⁵ laborplaco, li serĉis konvenan lokon. Li trovis ĝin en la angulo apud la ruĝa muro. Li starigis ĉiujn ĉe tiu muro. Li estas pafonta en dorsojn.

Ludvika eluzis⁶ disnodiĝon⁷ de la laĉo, liberigis siajn manojn kaj ekmanĝis elpoŝigitan⁸ bulkon.



Ludvika, ĉesu manĝi!—ekkriis la pafonto kaj minace skuis la pafilon. Ludvika rapidmove enpoŝigis la ekmorditan bulkon, la manojn apogis sur la dorso kaj mallevis la kapon.

—Atenton! Mi komencas⁹ de Kubalski—li elvokis kaj direktis la pafilon al la dorso de la arestito staranta maldekstre. Mallaŭta pafklako. Kubalski kurbiĝis kaj falis sur la flavan sablon. Ree aŭdiĝis la pafsono kaj la sekva arestito falis ĉe la muro. La pafilo klakis la trian fojon, sed la arestito ne falis.

—Gapulo¹⁰—ekkriis la pafanto.

Sekvis silento. Devis sekvi plua, sed la pafo ne sekvis. Anstataŭ la pafsono la arestitoj ekaŭdis la malpaciencon voĉon de la ekzekutanto: la pafilo malfunkciiĝis.¹¹

—Malfunkciiĝis?—ripetis unu el la mortigotoj—domaĝe....

—Kaj kio okazis?—demandis la alia zorgavoĉe—sed eble oni sukcesos ripari ĝin.

Post momento ĉiuj starantaj ĉe la muro proksimiĝis al la ekzekutanto. Ekestis vigla interparolo, ŝutiĝis¹² saĝaj konsiloj, tiel ke post nelonge oni sukcesis ripari la pafilon. Ludvika, kiu ne supozis, ke tiel rapide oni sukcesos refunkciiĝi la pafilon, denove ekmanĝis la bulkon.

Ludvika, ĉesu manĝi!—ekkriis la ekzekutanto—ĉiuj al la muro!

Ree klakadis pafoj. Starantoj ĉe la muro kuŝigis sin sur la sablo. De la lasta pafo pereis Ludvika, antaŭ la morto ŝi ne sukcesis formanĝi¹³ la bulkon.

Mi estis preteriranta. Kaj min atingis kuglo el ligna pafilo de la lernanto de la unua klaso. La kuglon mi portas ĝis hodiaŭ en la koro.

—Tradukis Walery Wiećko

¹paŝt/is si/n, grazed ²kol/um/o, collar ³star/ig/ad/is, made (them) stand up ⁴konstru/plac/o, a plaza where construction was going on ⁵sen/hom/ig/it/a, emptied of people ⁶el/uz/is, here: made full use of, took advantage of ⁷dis/nod/iĝ/o, the knot's coming undone ⁸el/poŝ/ig/i, to take from the pocket ⁹komencas de, start with ¹⁰gap/ul/o, simpleton, gawk ¹¹mal/funkci/iĝ/i = panei ¹²ŝut/iĝ/i, to be poured, "pour in" ¹³for/manĝ/i, to eat up, finish eating

43. Kelkaj Ŝercoj

En la kazerno

La soldato plendis, ke en la supo estis sablo kaj tero.¹ Nun li staras antaŭ la komandanto.

—Vi plendis pri la manĝaĵoj, ĉu ne? Ĉu vi estas en la armeo por frandi aŭ por servi vian patrujon?

—Jes, komandanto, por servi ĝin, sed ne por manĝi ĝin!

En frizejo

Frizisto: Ĉu vi volas tute mallongajn harojn² aŭ duone longajn?

Kampano: Fortranĉu por kvindek centimoj.³

Inter geedzoj

—Aj!—kriis sinjoro Jansen,—nun vi denove batis miajn fingrojn per tiu martelo.

—Mi bedaŭras,—respondis la edzino.

—Bedaŭri, bedaŭri,...vi faris ĝin intence!—koleris la edzo.

—Sensencaĵo!⁴—estis la respondo,—tiam mi estus batinta multe pli forte!

Furor-libro⁵

A.: Ĉu vi legis mian novan libron?

B.: Ne. Ĉu ĝi havas sukceson?

A.: Sukceson? Jam vendiĝis dumil ekzempleroj.

B.: Gratulon! Mi devas ĝin aĉeti.

A.: Do venu al mia loĝejo. Mi havas tie dumil ekzemplerojn.

Saĝaj vortoj

Edukante knabon, oni edukas viron. Edukante knabinon, oni edukas familion.

Feliĉa geedzeco estas tiu, en kiu la edzino estas iom blinda kaj la edzo iom surda.

¹tero, here: dirt ²har/o, a single hair (a head of hair is **har/ar/o**)

³por kvindek centimoj, 50 centimes worth ⁴sen/senc/aĵ/o, nonsense

⁵furor/libr/o, best-seller

KOPIO—EKZEMPLERO

Kopii means to copy or imitate something: **Petu vian sekretariinon fari por mi tri kopiojn de tiu ĉi letero**, Ask your secretary to make me three copies of this letter. **Tiu pentraĵo estas nur kopio, kaj ne originalaĵo**, That painting is just a copy, not an original.

Ekzemplero is one of a number of similar objects, printed or manufactured: **Mi ricevis du ekzemplerojn de la hodiaŭa ĵurnalo kaj eĉ ne unu ekzempleron de la hieraŭa**, I received two copies of today's paper and not even one copy of yesterday's. **Faru tri kopiojn de tiu ĉi letero, kaj sendu unu ekzempleron al la prezidanto, unu ekzempleron al la ŝtatestro, kaj metu la trian ekzempleron en nian arhivon**. Make three copies of this letter and send one copy to the President, one copy to the Governor, and put the third copy in our files. **Petu al la Jones-Ludilo-Fabriko tuj sendi dek ekzemplerojn de ilia modelo numero 56-B**, Ask the Jones Toy Factory to send ten of their model number 56-B right away.

44. Barbro kaj Eriko—XVI

Rud 18.5.

Plej bona frato,

Mi ĝojas kaj dankas pro viaj vortoj, mi dankas pro via konfido. Mi dankas vian amikecon, vian fratecon. Mi volus vin vidi, sed mi restos al vi fidela, eĉ se neniam tio estos realigebla.¹

Denove somero venis Svedlandon, denove la suno brilegas. La tagoj estas longaj. Je la tria jam la suno leviĝas, je la 8-a vespere ĝi staras ĉe la okcidenta horizonto, kolorigante la nubojn purpuraj. Krepusko daŭras de la naŭa ĝis la dekunua.

La popolĝardeno estas denove renkontejo de la junularo. Lunnokto, steloj—knaboj, knabinoj kun mano en mano; dancado, teatraĵoj, amuzado kaj flirto. Nordlandanoj estas malvarmaj, sed ne tiom malvarmaj, kiom kredas la sudlandanoj.

Ho, se mi havus la okazon vojaĝi, migri de lando al lando, rigardi, esplori, admiri! Mia mondo ekstera ŝajnas al mi kelkfoje tiom malvasta, kvazaŭ ĝi estus—malliberejo².... Ho ve,³ kiel honte al mi,⁴ diri tiel! Tiu eta mondo ja enhavas la plej karan, kion mi havas: mian patron kaj la tombon de panjo kaj Gösta. Do, nur la pensojn mi kelkfoje lasos flugi malproksimen, sed mi restos ĉi tie, kaj tre danka mi estu, ĉar mi ankoraŭ havas hejmon. Multaj ne havas....

Sed vi—vi estas junulo, al vi sin malfermas la mondo. Vizitu do iam Svedujon! Mi tre ĝojus, se mi povus vidi vin iam en nia dometo.

Rakontu multe al mi. Via lando tre interesas min.

Varmajn nordlandajn salutojn de via

Barbro

¹est/os real/ig/eb/a, can be brought to pass, will be able to come true

²mal/liber/ej/o, prison ³ho ve, alas ⁴hont/e al, shameful of



En la montaro de norda Svedlando

INTERESI

Interesi, “to interest,” is transitive: **Via lando tre interesas min**, Your country interests me very much. In English we would probably say “I’m very interested in your country,” which means the same thing. We could say in Esperanto: **Mi estas tre interesata pri via lando**. But this sounds awkward. The best way to say you’re interested in X is to say X interests you: **La lingvoj ĉiam interesis min**, I’ve always been interested in languages. **Ŝi ne plu interesas min**, I’m not interested in her anymore. Or you can use **interesiĝi**: **Mi tre interesigas pri via lando**; **Mi ĉiam interesigis pri lingvoj**, etc. Avoid using **interesulo** for “someone interested” (a common error) rather than “someone interesting.”

THE PREDICATE NOMINATIVE

Consider these sentences:

1. **La suno kolorigas la nubojn purpurajn**, The sun colors the purple clouds. (Remember, **nubojn purpurajn** and **purpurajn nubojn** mean the same thing.)

2. **La suno kolorigas la nubojn purpuraj**, The sun colors the clouds purple.

The first sentence tells us something that is happening to some purple clouds. **Purpurajn** has the accusative ending because it “modifies” (describes, identifies) **nubojn**, the object upon which the verb is acting.

The second sentence tells us something that is happening to some clouds: the sun is coloring them purple. **Nubojn** is still the object of the verb, but **purpuraj** now has a different function—to describe the result of the verb’s action.

A noun or adjective, therefore, that tells the result of a verb’s action on its object, or the condition in which the verb’s object is perceived to be, is a *predicate nominative* and does not have the accusative ending: **La juĝisto trovis la malliberulon kulpa**, The judge found the prisoner guilty. **Ni elektis lin prezidanto**, We elected him president. **Mi sentis min falonta**, I felt myself about to fall.



artsmela / Shutterstock, Inc.

45. Du Humuraj Poemoj

Tre Malrapida Trajno

(From *Kontralte*, by Marjorie Boulton. Note the use of “poeziaj vortoj,” special words rarely found outside of poetry, which duplicate longer combined forms. Not all dictionaries list poetic words, so they are often defined by footnotes or, as in this case, in a special list. Notice also the imaginative use of words with a switch on their uniform endings to give them new meanings, e.g., **lacas** for **estas laca**, and **buŝu** for **parolu**.)

Vagonaro, vagonaro,
Kun la laca, lanta knaro,
Ĉu vi nun sub narkotiko
Kredas vin, ho ve, heliko,
Aŭ testudo karapaca,
Vagonar' senverve laca?
Ankaŭ triste lacas mi,
Vi lantiĝas pli kaj pli,
Vi min skuas, vi malfruas,
Miaj pensoj malkongruas,
Plipeziĝas mia koro
En la morna koridoro
Kaj malplenas la stomako,
Vagonaro, ho limako—
Ho, mi ne plu aĉe buŝu,
Mi elrampu kaj vin puŝu!

Glosoj:

lanta = malrapida

triste = malgaje

morna = malĝojiga

Ebrio

(By William Auld, in *Kvaropo*. This clever poem takes the form of a monologue depicting the speaker's progressive inebriation. As he gets drunker and drunker, his speech becomes slurred and he mixes non-words with novel adaptations of real Esperanto forms.)

La boteloj staras vice,
kamarade kaj komplice,
sur la altaj murobretoj—
botelegoj, boteletoj,
verdaj, flavaj,
grasaj, kavaj,
palpebrume en la lumo
min invitas al konsumo,
gluta, tuta,
ĉes-refuta¹
forkonsumo de l' enhavo,
de la verdo, de la flavo,
de likvoro glate glita
svate ŝvita
kvate kvita
strate strita
streta
struta
mi rimarkas: en angulo
sidas ia ina ulo
kiu ridas ĉevaldente²
kaj rikanas sento-tente,
sin ekmovas,
kison blovas,
krurojn ŝovas:
kaj mi povas

super ŝtrumpo vidi blankon,
sangomankan³ gamboflankon.

Mi vin amas, bela ino,
mi adoras vin sen limo,

volas tuŝi,

kune kuŝi,

kaj karesi,

kaj forgesi,

pri la griza ver' forgesi

grila priva vorgeresi

vira vorga pivaresi

vipareŝi

mi neŝeŝi

neŝeŝi

ŝuvi puvi povi-povaŝ⁴

diri kie ŝiŝ ŝin trovaŝ⁵

la ne

la ne-ŝe

ne-ŝeŝ

seŝ⁶

dako danto danko dankon

dankon

padonu mineŝtaŝ bria⁷

padon'

padon'

'kon

'kon⁸

paŭzo

naŭzo

¹ĉes-refuta, refuting any inclination to stop ²ĉeval/dent/e = kun

ĉevalaj dentoj ³sang/o/mank/a, bloodless, pale ⁴= ĉu vi povas

⁵kie sin trovas = kie estas (si/n trov/i = trov/iĝ/i, to be located)

⁶= la necesejo ⁷= pardonu, mi ne estas ebria ⁸= dankon

46. Barbro kaj Eriko—XVII

Hohenberg, la 29-an de junio

Malproksima fratino,

Vi invitas min—mi preskaŭ dubas, ke tio estas via serioza intenco, sed tamen mi venos baldaŭ Svedujon. Jes, Barbro mi nepre ne ŝercas —mi venos.

Estas stranga la vivo. En granda deziro estas forto grandega, kaj mem la sorto ŝajnas kelkfoje cedi al nia volo.

Jam longe mi volis viziti Svedujon, sed estis preskaŭ nur revo, nevenkeblaj¹ neebloj² staris kiel murego antaŭ miaj deziroj. De kie preni la monon por tiu longa vojaĝo?

En mia lasta letero mi rakontis al vi pri mia frato migrema³ kaj kiel lupo en la fabelo li venis la sekvan tagon. Mi parolis pri mia korespondado kaj li invitis min, vojaĝi kun li dum lia dumonata libertempo en la lando de noktomeza suno. Ni vojaĝos simplege—per biciklo kaj tendo, sed vojaĝi tiamaniere certe estas interese, tiamaniere oni plej bone konatiĝas kun sia patrujo kaj fremdaj landoj, kutimoj kaj moroj. Mia frato ŝategas similajn vojaĝojn kaj ĉiam dum sia longa libertempo li biciklas en iu lando eŭropa. Jam multajn esperantistojn li vizitis kaj kiel entuziasma esperantisto ĉie li trovas amikojn, ĉiam Esperanto por li estas fonto de ĝojoj plej belaj kaj de granda utilo.

En tiu ĉi jaro mi biciklos kun li.

Kiel mi antaŭĝojas, kiel mi estas feliĉa. Mi vidos vin, mi parolos kun vi, mi estos kelktempe en stranga, revbela⁴ mondo.

Kordezirojn de⁵

Eriko

¹ne/venk/eb/a, invincible, insurmountable ²ne/eb/o, impossibility
³migr/em/a, fond of traveling, “rolling-stone” ⁴rev-bela = tiel bela,
kiel en revo ⁵= korajn dezirojn de

DISDE, FARE DE

Because **de** has several meanings, there are sometimes opportunities for misunderstanding, as illustrated in the sentence: **Oni devas priplori la izolemon de la registaro de la popolo.** Is it the aloofness of the government from the people, or the aloofness of the people from the government that is to be deplored? Obviously, some means is needed to distinguish between the two meanings of **de**. The combined word **dis/de**, “apart from,” is therefore useful: **...la izolemon de la registaro disde la popolo.**

The difference between **de** = “from” and **de** = “by” can be even more confusing: **La brakhorloĝo estis ŝtelita de la edzino de la barbisto de la ŝoforo de la urbestro.** Was the watch stolen by the barber’s wife from the mayor’s driver? Or vice-versa? Or did the driver’s barber’s wife steal it from the mayor? And so on. To clear up the mystery we use a modifier, such as **fare** (by the doing) with **de** to mean “by”: **La brakhorloĝo estis ŝtelita de la edzino de la barbisto fare de la ŝoforo de la urbestro.**

Alternative expressions for **fare de** are occasionally seen, including **deper**, **far’ de**, and even **far’** or **far**; but no one of these forms is very widely preferred over the others.

47. Siberia Epizodo

(From Chapter One of *Sur Sanga Tero*, by Julio Baghy. The novel is based on the Hungarian author's experiences as a prisoner-of-war in Siberia during the Russian Revolution. The book was originally written in Esperanto.)

La matena simfonio de la kazernoj vekadis la svene dormantan urbon. Ĝi restis senmova. Spleno, inertece, timo riglis la pordojn. Malantaŭ la fenestroj, tegitaj per lignotabuloj, silentis la homoj kun tremanta koro. Muta demando baraktis sur la fundo de la animoj. Kion la nova tago alportos?... Stranga demando. Tion, kion ĉiu antaŭa tago: teroron kaj teruron, sangon venĝon. Denove malaperos kelkaj familioj, hejmoj restos sen panakirantoj kaj pli da orfoj ploros ĉirkaŭ la samovaroj.

La ĥaosa fanfaro de trumpetoj vane anoncis tagiĝon. La trumpetoj mensogis. En la animoj regis nokto, kies fantomoj teruris la pacemulojn. La rusa popolo puŝis pordon en sian korpon. Sango! Sango! La akcipitroj kaj vulturoj jam krosis super la buĉejo. La japana armeo okupis la garnizonojn de orienta Siberio ĝis la *Bajkalo*.^{*} La transsiberian fervojan linion la ĉefaj legioj tenis en sia potenco. La politikaj interesoj de la Entento² plenstopis³ la kazernojn per amerika, angla, franca, itala armeoj. Ĥina regimento demonstraciis en la ĥina kvartalo de ĉiu urbo. La fremdaj potencoj provizore statistis al la tragedia heroo: al la rusa popolo.

Je la matena simfonio la kazernoj, ringe ĉirkaŭantaj la urbon, malfermis siajn pordegojn. El unu sur ĉevaloj 25-30 oficiroj galope ekiris al la nordaj montetoj. Ĉu taĉmento? Ne. Tuta regimento de la Rajdĉasistoj.⁴ El iu alia kazerno sekvis ilin la Inĝeniera Regimento, konsistanta el 50-60 oficiroj, parte sur ĉevaloj, parte sur ŝarĝveturiloj.⁵ Imponan aplombon provis doni al la armeeto du kanonoj, kiuj formis la finan punkton de la militirantoj.

La bruo de la kanonradoj tremigis la koron de la civila loĝantaro. Kien denove? Scivolaj okuloj spionadis tra la kurtenoj. La manoj pugnigis ĉe la ekvido de la unua rajdanto. La lipoj malame flustre ripetadis nomon: Vladimir Smirnov, la ŝakalo. Li estis la kapitano de la Rajdĉasistoj. Kruele, sangavida⁶ rabbesto⁷ en homformo. Multaj el liaj oficiroj abomenis lin, tamen neniu kuraĝis kontraŭstari⁸ al liaj ordonoj. Kiu estis Vladimir Smirnov? Neniu sciis, de kie li venis. Neniu konis lin antaŭ

^{*}Lake Baikal in Central Siberia

la kontraŭrevolucio.⁹ La marĉa ondo de la politika perturbo suprenĵetis¹⁰ lin kaj tuj post la falo de la unua ruĝa reĝimo li organizis la regimenton de la Rajdĉasisitoj. Ĉu li organizis ĝin?¹¹ En oficira uniformo li varbis bandon kaj proklamis sin bandestro. Per elektitaj torturoj li liveris viktimojn al la transtera mondo. La teruro kaj abomeno, semitaj de li, fruktis¹² sekretan malamon kaj senpardonan¹³ revenĝon,¹⁴ sed nun...nun neniu kuraĝis levi la manon al li.

Ankaŭ Demetrio Podenko, la kolonelo de la Inĝeniera Regimento, sentis ekboli la sangan, kiam li vidis lian friponan vizaĝon. Tio ĉi estis mirinda el certa vidpunkto,¹⁵ ĉar Demetrio Podenko ne apartenis al la temperamentaj karakteroj. Onidire¹⁶ nenio povus renversi lian bone ekvilibritan indiferecon. Li estis homo nek bona, nek malbona. Kiel rezervoficiro li partoprenis en la milito, sed en la paca tempo lia sola zorgo estis la administrado de kolbasfabriko, heredaĵo de la patro. Dum la unuaj jaroj de la milito lia fabriko produktis ĉefe por la armeo kaj ĝi akiris ĝeneralan malbonan famon inter la soldatoj kaj subitan riĉecon por la posedanto. Li neniam vidis batalfronton, neniam flaris pulvodoron. Malantaŭ la tranĉejoj singarde li servis kiel komandanto al la interesoj de la armestomako. Pri tio vive atestis liaj ruĝaj pomvangoj¹⁷ kaj ampleksa talio. La falo de la carismo, la unua revolucio trovis lin en lia hejmo. Kiam lia edzino kun terurstreĉitaj¹⁸ okuloj laŭtleĝis la raportojn de gazetoj pri la surprizaj okazaĵoj, li sidis ĉe la tagmanĝo kaj senemocie klopodis elkulerigi¹⁹ teleron da barĉo, poste stoike li rimarkis: “Kion fari?” La komisaroj de la unua ruĝa reĝimo neinvitite gastroladis²⁰ en lia fabriko kaj Demetrio Podenko samkviete respondis al la edzinaj lamentoj: “Kion fari?”

¹pan/akir/ant/o, breadwinner ²Entent, Allied side in World War I

³plen/ŝtop/is, stuffed, crammed ⁴rajd/ĉas/ist/o, light-cavalryman

⁵ŝarĝ/vetur/il/o, wagon for hauling freight ⁶sang/avid/a, blood-thirsty

⁷rab/best/o, beast of prey ⁸kontraŭ/star/i, to stand up against, resist

⁹kontraŭ/revoluci/o, counter-revolution ¹⁰supr/e/n/ĵet/is, propelled (him) up (to the surface) ¹¹Ĉu li organizis ĝin? Organized it?

¹²frukt/is, yielded (bore as its fruit) ¹³sen/pardon/a, unforgiving

¹⁴re/veng/o, counter-vengeance ¹⁵vid/punkt/o, viewpoint

¹⁶oni/dir/o, a rumor ¹⁷pom/vang/o/j, cheeks like apples

¹⁸terur/streĉ/it/a/j okul/o/j, eyes stretched wide in terror

¹⁹el/kuler/ig/i, spoon out ²⁰gast/rol/ad/is, played the guest

La venko de la kontraŭrevolucio, kvankam la novaj homoj deklaris lin martiro, ne sukcesis stimuli lin je venĝokrioj. Tute simple li kapitulacis al la tasko, altrudita²¹ de la urbkomandanto Lukjanov al li, kaj li organizis Inĝenieran Regimenton, kies kolonelo fariĝis li mem. Verdire li havis nur kapitanan rangon en la cara armeo, tamen li cedis al la persvado de sia edzino kaj li donacis al si la laŭmodan²² rangon. Kion fari? Li varbis kelkdekojn da oficiroj, el kiuj neniuj estis inĝeniero, dungiĝis kvar ĉinojn por purigi la kanonojn, postlasitajn de la ruĝa armeo, komandigis dek-kvin militkaptitojn al la kazerna kuirejo por havigi servistojn al siaj oficiroj kaj plenumis senproteste la ordonojn de la stabo.

Jes, kion fari? Vole-nevole²³ li akompanis la Rajdĉasistojn al la kruelaj ekskursoj, pli senriskaj ol vivdanĝeraj kaj post ĉiu reveno li kraĉis por esprimi abomenon pri la tuta afero. La homĉasado de Vladimir Smirnov vekis en li ribelan indignon kaj ne unufoje eliĝis el li la demando “kion fari?” kun tia tono, kiu perfidis lian kaŝitan malamon kaj lasis konjekti, ke li cerbumas pri rimedoj, eltordontaj²⁴ la kolon de la ŝakalo. La plej efika rimedo estus mortpafi tiun rabian hundon. Sed kiu riskus ektiri la ĉanon? Eĉ momenton li ne pensis pri si. Li neniam soifis je homa sango kaj plene kontentigis lian batalemon la kolektado de rekviraĵoj.²⁵ La kanonoj de la Inĝeniera Regimento nur mute statistis kiel impona dekoraĵo ĉe la ekskursoj, kies celo estis prirabi²⁶ la senarmilan²⁷ loĝantaron de iu vilaĝo por akiri nutraĵon al la armeo. La ekzekutistan laboron plenumis la Rajdĉasistoj. La Inĝeniera Regimento mezuris nur la longecon de la rekviritaj kolbasoj, pesis la sakojn da terpomoj, pizoj, faboj. Ofte dum reveno la sendanĝeraj kanonoj servis kiel veturiloj por brasikoj. Demetrio Podenko por venki la ribelan indignon en si kaj restarigi la minacatan ekvilibron ŝultrolevalante²⁸ kraĉis: “Milito estas milito, revolucio estas revolucio. Kion fari?”

La hufoj ritme klakadis, kirlis pulvonubon. En la apudvoja fosaĵo²⁹ ĉe la fina tombejo bojis raŭke granda hundo. Gorĝŝire³⁰ kolere ĝi bojis, tamen vidante la proksimiĝon de la rajdantoj ĝi retiris sin kaj de certa distanco plenumis sian solan devon: la bojadon. Vladimir Smirnov prenis sian revolveron, celis, ekpafis. La hundo dolore ekbojis, renversiĝis, baraktis, plende ve-blekadis.³¹ Kun laŭta ekrido kaj blasfemado Smirnov sekvata de siaj oficiroj galopis plu.

El inter la tomboj aperis infanmiena³² ĥino kun korbo sur la brako. Li rigardis post la forgalopantoj, minace skuis la liberan pugnon al ili, poste metinte la korbon sur la teron li rampis singarde al la hundo, konvulsie baraktanta pro la doloro. La kuglo rompis unu el ĝiaj kruroj. La ĥino

demetis sian jakon, deŝiris longan pecon el sia terkolora ĉemizo kaj senhalte parolante al la besto li komencis bandaĝi la sangantan kruron.

Denove aŭdiĝis hufklakado de proksimiĝantaj rajdistoj. La ĥino timigite volis retiri sin en la tombejon, sed li malfruis. Nur kelkmetra distanco disigis lin de la unua oficiro, sidanta kiel senforma plenŝtopita terpomsako sur sia ĉevalo. La ĥino kun pli da timo ol respekto salutis lin. Demetrio Podenko haltigis sian ĉevalon.

—Nu, kio okazis? Ĉu vi vundiĝis?— Podenko komencis interesiĝi pensante pri la bone ekipita ĥina regimento, kiun la Manĝuria registaro komandis por protekti la ĥinajn loĝantojn. Estus malagrabla havi konflikton kun la ĥinoj. —Kie vi vundiĝis?

La ĥino nee skuis la kapon, senvorte montris al la hundo.

—Ĉu via hundo?

—Ne!...Hundo...hundo boji, kaptano pafi. Hundo ne apalteni³³ al Lio Fu Peng. Lio Fu Peng estis ĉe la patlo kaj polti manĝaĵo al li. Kapitano veni, pafi, hundo molti.

La ĥino infanmiene rigardis al Podenko. La hundo tirtone bojis, deŝiris la bandaĝon, ankoraŭ ne alfiksit. Podenko ŝultrolevis kaj kraĉis.

—Kion fari? Milito estas milito?... Unu hundo pli aŭ malpli. Ne grave! Unu homo pli aŭ malpli. Ne grave!... Cetere hundosto rapide saniĝas... Tiu ĉifono aspektas abomene malpura—kaj Podenko elpoŝigis blankan poŝtukon, ĵetis ĝin al la ĥino. —Ĉu via patro loĝas en la tombejo? Ĉu li estas tombgardisto?

La ĥino ŝajne ne bone komprenis aŭ tute ne komprenis liajn vortojn, ĉar li senresponde gapis al Podenko, kiu subite rememoris, ke la ĥinoj povas kompreni nur la ĥinmaniere parolatan rusan lingvon. Liaj oficiroj jam atingis lin, ankaŭ la kanonoj preterbruis kaj Podenko ne havis tempon por kontentigi sian scivolon. Li ekspronis la ĉevalon, galopis

²¹al/trud/it/a...al, forced on ²²laŭ/mod/a, fashionable ²³vol/e/ne/vol/e, willy-nilly, like it or not ²⁴el/tord/i, to twist off ²⁵rekvir/i, to seize peremptorily, requisition ²⁶pri/rab/i, to rob (see PRI- below)

²⁷sen/arm/il/a, unarmed ²⁸ŝultr/o/lev/i, to shrug ²⁹apud/voj/a fos/aĵ/o, roadside ditch ³⁰gorĝ-ŝir/e, throat-splittingly ³¹ve-blek/ad/is, yelled (see below) ³²infan/mien/a, with a childish expression ³³apalteni = apartenas, boji = bojas, etc. (the errors indicate unfamiliarity with the language being spoken)

for. Tamen la kompatinda hundo kaj tiu mizera fino incitis lian anemian fantazion. Eble pro tio, ĉar³⁴ li abomenis Vladimiron Smirnov. Lia rigardo trafis leŭtenanton Petroff, kiu dormeme balancis sin en la selo.

—He, Petroff, vi estis dentkuracisto³⁵ en Petrograd. Ĉu?

—Jes, sinjoro Kolonelo³⁶—revekiĝis Petroff je la aŭdo de sia nomo.

—Nu, leŭtenanto Petroff iru kaj bandaĝu tiun hundon!

—Kion mi faru?

—Bandaĝu tiun hundkruron! Finfine vi estas ja kuracisto. Ĉu ne?

—Nu, jes, sed ne veterinaro, precipe ne por hundkruroj.... Mi estas dentkuracisto.

—Nu bone! Tamen vi povus pli bone bandaĝi ol tiu fino—kaj Demetrio Podenko sentis, ke la neplenumo de lia deziro iom tuŝus la militan disciplinon. —Intertempe pro prestiĝo vi povos eltiri ankaŭ unu denton de la hundo, se estos necese.



Leŭtenanto Petroff ne sciis, ĉu la sinjoro kolonelo bonvolas³⁷ ŝerci aŭ li serioze parolas. Li daŭrigis la galopadon apud sia kolonelo.

—Hehe! Bona ŝerco, sinjoro kolonelo! De mia infanaĝo³⁸ mi revadis fariĝi dentkuracisto de vagantaj hundoj. Hehe!

La rideto incitis la kolonelan dignon kaj Demetrio Podenko ne plu pensis pri la hundo, nek pri la ĥino. Li indigniĝis. En sia leŭtenanteco li devis plenumi multe pli stultajn ordonojn de siaj superuloj³⁹ ol tiu ĉi humanista ekflamiĝo de sia koro. Li neniam kuraĝis protesti, precipe ne per tia impertinenta rideto. Milito estas milito. Sed leŭtenanto ne estas kolonelo, regimentestro. Li sentis, ke de nun temas ne pri ĥino, pri hundo, nek pri humanista sentimento. (La diablo prenu ĉion ĉi! Tian malsaĝan deziron li neniam havis. Prefere li estus mordinta sian langon.) Nun temas pri la disciplino. Subite li ekflamiĝis.

—Leŭtenanto Petroff, ĉu vi ne aŭdis mian ordonon? Iru kaj bandaĝu la kruron de tiu hundo, poste—se plaĉos al vi—vi povos eltordi ĝian kolonon, sed mi ne toleros maldisciplinaĵon. Ĉu komprenite?

Leŭtenanto Petroff, iom pala, poste ruĝa pro la retenita kolero kaj englutita sakrado, soldate salutis la kolonelon. Returninte sian ĉevalon li forgalopis por plenumi la kaprican ordonon. La ekflamiĝinta kolero de Podenko tuj cindriĝis. Li ŝultrolevis kaj lignomiene filozofadis.

—Hja, milito estas milito. Kion fari?

Petroff furioze galopis, sakradis, deziris galkrevon⁴⁰ al la “kolbaskolonelo” kaj enpense decidis doni dek vangfrapojn al sia servisto Miĥaelo Mihok. Vere, la malfeliĉa militkaptito estis ja tute senkulpa pri la okazaĵo, sed iamaniere li devos retransviligi sin. Feliĉe la rajdado, la metafore poluritaj blasfemesprimoj iom post iom absorbis la venen-ŝaŭmon de lia kolero kaj kiam li aperis antaŭ la surprizita ĥino kaj vidis ties simplenan palpebrumon, li tuj pensis pri ŝerca rebato⁴¹ de la ordono.

La ĥino, kaŭranta en la fosaĵo, jam lertamane bandaĝis la rompitan kruron per la poŝtuko de la kolonelo. La besto danke rigardis la mig-

³⁴pro tio, ĉar, for the reason that ³⁵dent/kurac/ist/o = dentisto

³⁶Jes, sinjoro kolonelo, Yes, sir ³⁷bon/vol/as, is pleased to

³⁸infan/aĝ/o, childhood ³⁹super/ul/o, a superior ⁴⁰gal/krev/i, to burst for biliousness ⁴¹re/bat/i, to hit back, “get even”

dalokulan samaritanon, sed ekvidante la uniformon de Petroff ĝi kolere ekbojis, minace montris siajn dentojn. Petroff nevole ekridis.

—Sanajn dentojn ĝi havas. Certe ĝi estas bolŝevika hundo, ĉar ĝi abomenas la oficiran uniformon. Des pli bone! Laŭ la militaj reguloj la vunditoj devas esti portataj en la hospitalon—kaj Petroff saltante de sur la selo imagis al si la mienon de la kolonelo, kiam li raportos al li, ke la vunditan bolŝevikan hundon bandaĝita li eskortis al la milita hospitalo. —Nu, homo, helpu!— Li turnis sin al la ĥino kaj preninte botelon da sublimato,* paketon da bandaĝo el sia selosako li komencis ekzameni la rompitan kruron. La ideo pri la bona ŝerco stimulis lin je senvoĉa rido kaj volonte li oferis sian krajonon por fari el ĝi firmigilon.⁴² Per tranĉilo li disduigis ĝin.

La ĥino ne komprenis la celon de tiuj preparoj, sed la rido ĉe liaj lipoj trankviligis lin. Certe tiu ĉi oficiro ne volas ion malbonan. Petroff paŝis al la hundo. Ĝi minace montrante sian dentaron murmuris.

Ho, ĥino, tenu forte la beston, ĉar se ĝi mordos min, mi mortpafos vin. Ĉu komprenite? Kunpremu forte ĝian buŝon!... Se la homoj havus tiajn dentojn, ĉiu dentisto mortus pro malsato.... Hahaha! Sinjoro kolonelo, la ŝerco nun komenciĝas.... —De kie vi prenis tiun ĉi delikatan poŝtukon?

—Bona kapitano doni al Lio Fu Peng. Malbona kapitano pafi la hundo, bona kapitano doni blanka ĉifono.

Petroff devolvis la poŝtukon. Stranga kaprico, li pensis. La senpove⁴³ pendanta kruro de la hundo, la elstarantaj ostoj naŭze efikis. Lia rigardo ĵetiĝis al la mieno de la ĥino, kiu plenforte tenis la buŝon de la besto. Petroff sentis forvaporigi sian bonhumoron. Kiel emociite⁴⁴ rigardas tiu ĉi flavvizaĝulo? Iom pli zorge ol li mem volis, li prenis la sublimaton, lavis la vundon, kunmetis la rompitan kruron, bandaĝis ĝin alfiksante la krajonduonojn, intertempe blasfeme li esprimis sian opinion pri la mondo, en kiu la homoj havas pli da kompato al la besto ol al siaj fratoj.

—Nu, ni estas pretaj. Ĉio en ordo...kaj nun, estimata bolŝevika hundo, ci⁴⁵ estos portata al la milita hospitalo. Hahaha!

Petroff rigardis la beston. Ĝi ŝajnis esti fortika grizfela domgardanto. La ĥino jam ne kunpremis ĝian buŝon. Ĝia lango inerte pendis kiel longa ruĝa ĉifono kaj ĝiaj okuloj kun danko esprimis ripozis ĉe Petroff. Tiu besta dankemo malagrabla tuŝis lin. Tiel ĝi rigardas, kiel suferanta homo. Jes,

*Mercuric chloride, a dangerous poison and disinfectant

tiu ĉi hundo havas okulojn, similajn al tiuj de homo. Subite Petroff sentis skrupulojn pri la bonkora akcepto de la vundita besto en la milita hospitalo.

—Al la diablo la sentemecon!⁴⁶... Hm, homajn okulojn ĝi havas.... Nu kaj kio? La homo havas... la homo havas... Kion la homo havas? Hahaha! La homo havas hundan koron... aŭ eĉ ne hundan... He, ci flavvizaĝa, portu for cian hundaĉon, ĉar tuj mi sendos kuglon en ĝian kapon!

La ĥino larĝe ridetis. Tiu ĉi rido esprimis koran dubon, tamen li fervore kapjesadis.⁴⁷

—Kien Lio Fu Peng polti hundo? Hundo ne apalteni al Lio Fu Peng. Hundo apalteni al neni.

—Portu ĝin en la inferon al la diablo!— Leŭtenanto Petroff surseliĝis. La brava hufulo⁴⁸ ekgalopis, sed la buŝumilo⁴⁹ haltigis ĝin ĉe la angulo de la tombejo. De tie Petroff rekriadis al la ĥino. —He, ĥino, portu tiun malbenitan hundon al Puŝkinskaja⁵⁰ n-ro 15 kaj transdonu al mia servisto.... Espereble ĝi mortaĉos⁵¹ baldaŭ.... Nu kaj nun post la rolo de la molkora veterinaro ni iru por ĉasadi—homojn. Pro diablo!

⁴²**firm/ig/il/o**, splint ⁴³**sen/pov/e**, helplessly ⁴⁴**emoci/it/e**, moved, touched ⁴⁵**ci**, thou (see below) ⁴⁶**sent/em/ec/o**, sentimentality

⁴⁷**kap/jes/i**, to nod “yes” ⁴⁸**huf/ul/o**, steed ⁴⁹**buŝ/um/il/o**, bit

⁵⁰**Puŝkinskaja n-ro 15**, 15 Pushkinskaya (St.) ⁵¹**mort/aĉ/i**, to “croak”

PRI-

Used as a prefix, **pri** may have its usual meaning, “about, concerning”: **priparoli**, to talk about, discuss; **pripensi**, to think about, ponder; **priplori**, to cry about, deplore; **priridi**, to poke fun at; **prijuĝi**, to criticize; **prisilenti**, to keep quiet about; **priskribi**, to describe; etc.

Sometimes, prefixing **pri** widens the scope of an action, and/or shifts the focus of the action to a different—but concerned—object: **lumi**, to give off light, **prilumi**, to illuminate; **demandi**, to ask a question, **pridemandi krimulon**, to interrogate a criminal; **planti florojn**, to plant flowers, but **priplanti ĝardenon**, to put in a garden; **serĉi armilojn**, to look for weapons, but **priserĉi kaptiton**, to search a prisoner; **rabi monon**, to take money by force, but **prirabi la loĝantaron**, to rob the populace.

BLEKI

Bleki is a general word for the cry of any animal: **ŝafbleki**, to baa; **bleki ĉevale**, to neigh like a horse; **la blekado de bovino**, the mooing of a cow. **La vundita hundo veblekis**; the injured dog yelped.

CI

Ci (thou), **cia** (thy, thine), and **cin** (thee) are not much used in Esperanto. As in English, they may be used in addressing deity or in poetry, but sound rather affected when they are. In some countries, people regularly use “thou” in addressing children, servants, animals, close friends, and relatives; and occasionally this practice is imitated in Esperanto. For example, in the selection above, Lt. Petroff’s use of **ci** to the wounded dog is a form of endearment.

ESPERANTO SLANG

Slang is colorful but informal language not found in a normal dictionary. Slang expressions come and go, and not everyone understands them. As such, they obviously are no asset in a language that strives for universality.

On the other hand, slang serves to freshen up a language with expressions that are new and imaginative, zesty and often insightful. Without them, language would be bland as a meal with no spices.

In Esperanto, this positive function of slang is filled by the creative use of the language’s limitless word-building possibilities. Accomplished Esperantists sprinkle their speech and writings with new-coined expressions that are fresh, witty, and striking, and yet logical and comprehensible.

We’ve seen examples of this earlier, as in the poems beginning on page 289. In the Baghy story above, notice his innovative use of **statisti** and **frukti** as verbs, and such tongue-in-cheek inventions as **armestomako**, **elkulerigi**, and **hufulo**.

48. Barbro kaj Eriko—XVIII

Rud 1.7.19..

Kara,

Pro ĝojo mi ne scias, kion diri. Kia surprizo! Dum longe mi ne estis tiel feliĉa. Vi do venos en mian landon.... Ho, mi preskaŭ timas, ke ĉio estas nur sonĝo. Sed ne, mi relegas vian leteron, estas vero: vi venos.

Senlime mi ĝojas, sed samtempe timetas. Ĉu vi ne elreviĝos¹ pri mi? Nur simpla knabino kampara, nesperta, malsaĝa mi estas.

Kiam, proksimume, vi venos? Certe vi survoje sendos vivsignojn² al via fratino, kiu tiel streĉe atendas vin. Mi antaŭĝojas³ la belajn tagojn de nia kunesto, de nia babilado,—sed la grizan tagon de via foriro mi ne volas pripensi. Ne, ne! Nur ĝojo nun! Ŝajnas al mi, ke miaj kaktaj komencas entiri siajn dornojn por pli amikaj aspektoj....

Mi ne forgesu diri, ke mia patro sendas bonvensalutojn al vi ambaŭ. “Nun mi ja tuj devas ekstudi Esperanton, alie mi ja staros kiel surdmutulo antaŭ la aŭstroj,” li ridetante diris. Mi klinis min,⁴ proponante min mem kiel instruonton, kaj jam ĉivespere la unua leciono okazos. Certe ni multe ridos, paĉjo estas tiom ŝercema.

Ĉar ni baldaŭ havos okazon, buŝe interparoli, mi nur aldonas salutojn plej korajn por vi kaj via frato. Sincere kaj varme mi diras:

BONVENON!

Ĝis la unua renkonto!

Via

Barbro

¹el/rev/iĝ/i, to become disillusioned, “come to” after a daydream

²sendi viv/sign/o/j/n, to let someone hear from you

³antaŭ/ĝoj/i, to look forward to ⁴klini sin, to bow

A Key to the Lesson Dialogues

Lesson One

Charles: Hi, Mary. **Mary:** Hi, Charles. How are you? **Charles:** Very well, thanks. What's that? **Mary:** What's that? It's a long letter from my father. It came in the mail just today, from Paris. **Charles:** From Paris! Really? Your father is in Paris? **Mary:** Yes, he's there for a big international conference. **Charles:** Your father is a lawyer, isn't he? **Mary:** No, my mother's a lawyer. My father's a teacher of languages at the university. **Charles:** Oh yes, I remember now. And he's an Esperantist, too, isn't he? **Mary:** Yes, he's president of the local Esperanto club. **Charles:** Oh, that's a great honor! **Mary:** Honor? Yes, but it's also a lot of work! **Charles:** Yes, of course. Well, I have to hurry now. So long, Mary. **Mary:** So long, Charles.

Lesson Two

Cab Driver: Where to? **Prof. Miller:** I want to go to the café *Smeraldo*, on the street Bourbon. **Cabby:** OK, I know the place. **Miller:** The Esperantists are having a meeting there. **Cabby:** Esperantists! Do you speak Esperanto? **Miller:** Oh, yes. I speak it. I also teach it. **Cabby:** In a school? **Miller:** No, in a university. In the United States. **Cabby:** What are you doing in Paris, Sir? **Miller:** I gave a report at an international conference of linguists. **Cabby:** Do you like Paris? **Miller:** Oh yes, but the weather is very warm now. Have you ever been in the United States? **Cabby:** No, I've never been there. **Miller:** Too bad. **Cabby:** Well, where's your café? Didn't you say on Bourbon Street? Oh, now I see it. It's right there. Will I see you tomorrow, Sir? **Miller:** No. Tomorrow I have to fly to the U.S.A. **Cabby:** Too bad! Well, good night, Sir. And thank you.

Lesson Three

Passenger: Pardon me, Sir. Is anyone sitting there? **Prof. Miller:** No, Sir. Sit down, please. **Passenger:** Thank you. Are you a Parisian? **Miller:** No. I'm an American. I come from Chicago. **Passenger:** Oh, a Chicagoan! I was in Chicago, once. **Miller:** What were you doing there? **Passenger:** I went there after the war, and worked for my brother. He has a store there. **Miller:** What does he sell? **Passenger:** Oh, he sells everything. Whatever you want to buy, he has it. It is a huge store. A beautiful store! But I came back to Paris. **Miller:** Why? I don't understand. Didn't you like Chicago? **Passenger:** Oh, I liked it, but I hated the wind there. I was very unhappy. And I'm a real Parisian, who loves only Paris. **Miller:** And where are you going now? **Passenger:** I'm flying to New York for a visit. My other brother is a worker there. **Miller:** Well, we'll take off soon. Are you ready? **Passenger:** No, I can't find my belt. Where the dickens is it? **Miller:** Excuse me, Sir, but you're sitting on it, aren't you? **Passenger:** Ah, yes! Thank you. There it is. Now I'm ready. But what an embarrassment! Just think, I was a flyer myself, during the war! **Miller:** It doesn't matter. We're taking off now. Goodbye Paris! Soon we'll be arriving in New York.

Lesson Four

Prof. Miller: Oh, how happy I am to be home again! When I was in Paris— **Mrs. Miller:** Wait a little bit, dear. I'm preparing the dinner (literally: evening meal). **Miller:** Yes, but I only wanted to say that in my hotel— **Mary:** Father, George took my new comb and doesn't want to give it back! **Mrs. Miller:** Give your sister her comb, George. **George:** I don't have it. **Mary:** Of course he has it. He's always taking my things! **Miller:** Listen, something funny happened in the taxi, when I— **George:** When are we going to eat? **Mrs. Miller:** The meal is almost ready. Are your hands clean? **Mary:** No, they aren't clean! Look how dirty they are. They were dirty during lunch, too! **Mrs. Miller:** Go and wash your hands, George. And hurry, do you understand? We're going to start to eat now. **Miller:** That reminds me of something. After my report to the conference— **Mrs. Miller:** Sit down, dear. You can tell us all about Paris later on. **Mary:** Oh, I almost forgot. Right after dinner I have to go visit a girlfriend. We have a very important exam at the university tomorrow, and we have to study for it. **Mrs. Miller:** Fine. But come back early. Where is your brother? Ge-orrr-ge! Where are you? **George:** I'm coming. But I'm not hungry. I already ate at Henry's house. Can I go in the living room? I want to watch an important soccer game on TV. **Miller:** But don't you want to hear about my flight in a big jet plane, and about the pretty parks, and— **George:** Later on, Father, they're already starting to play. **Miller:** Well, dear, at least you'll get a kick out of (literally: burst out laughing about) the man who sat next to me in the jet. Just think, he was a flyer himself during the war, but— **Mrs. Miller:** Oh, I'm very sorry, but I have to go out now. I promised to help a client correct legal papers. I'm already late. You'll find some cake in the refrigerator. So long!

Lesson Five

Mrs. Miller: Good morning, Mary. How are you? **Mary:** In fact, not very well. I'm afraid I'm a little bit sick. My throat hurts like everything. **Mrs. Miller:** Too bad. I'm sorry. Do you want to see (literally: visit) the doctor? **Mary:** No, no. I think it's not important. If I don't go to the exam, they'll certainly think I didn't study, and wasn't ready for it. **Mrs. Miller:** Maybe you're right, but good health is more important than a hundred exams. **George:** I know why she's sick. Yesterday, when it was raining cats and dogs, she was out walking without a coat. She always does that, even when it's snowing! **Mary:** George! Do you have to tell the whole world everything about me? **George:** She was smoking cigarettes with Henry's sister, too. **Mary:** You— you— bad boy! Just wait, I'll teach you how to act! **Mrs. Miller:** Mary, you go to Doctor Smith right after the exam. He's very capable, and he knows your father well. He won't be angry if you visit him in his home after school hours. He'll certainly make you well again very quickly. **Mary:** If you insist. But I don't know his address. Where does he live? **Mrs. Miller:** He lives on the hill by 37th Street, in the beautiful house on the left side. **Mary:** Ah yes, I know. **George:** Ask him to examine your head, too. There must be a brain in it, somewhere. **Mary:** I'll examine *your* head, if you don't watch out! **Mrs. Miller:** (That's) enough! I advise you both to watch your tongues. George, isn't there something good on television? **George:** It's broken down. **Mrs. Miller:** Broken down? What's the problem? **George:** I don't know. I just opened the cover a little bit, and hid my new knife in it. There was a big flash, and now it doesn't work. **Mrs. Miller:** Oh, no! Now I think I'm going to be sick, too!

Lesson Six

Mary: What a pretty car! Whose is it? **Charles:** Actually, my father bought it just yesterday. Get in! Let's drive around a little bit and then I'll drive you home. **Mary:** Do we have time? What time is it? **Charles:** Just 5:45. Let's go! I'll even hold the door for you. **Mary:** Well, OK. Wait, I'll put my books in the trunk. But Charles, I didn't know you knew how to drive! **Charles:** Oh, it's easy to drive a car. You just have to sit behind the wheel, turn the key, and steer. **Mary:** I very (much) like the smell of a new car. Look, even the ash trays are empty. I hope you have enough gas? **Charles:** Of course. I just filled the gas tank. Oh, there's the freeway. Let's see how fast it will go! **Mary:** Watch out, there's a lot of traffic there. Not too fast. Charles, be more careful! **Charles:** Man! We've already got a policeman behind us! He wants me to stop. **Policeman:** Good evening, young man. Will you please show (me) your license? **Charles:** My— er, I mean— **Policeman:** That you don't have a license? Well, that's an important offense. Did you know you were driving 72 miles an hour while the speed limit is 55? Well? Why don't you answer? Don't you speak English? **Mary:** Don't worry, Charles. I'll visit you every week and send you a cake with a saw in it.

Lesson Seven

